

# Spiritismo: 150 Jaroj

Historia kaj Doktrina Panoramo de la  
Spiritisma Kodigado

ORGANIZADO:

**AME**

UBERLÂNDIA - MG

Kopirajto: Aliança Municipal Espírita de Uberlândia

**AME**

El la portugala lingvo tradukis Esperanten:

*Said Pontes de Albuquerque*

Revizio:

Paulo Sérgio Viana

Elektronika Kompostado:

Eldonejo Oportuno

Presado kaj bindo:

Presejo Oportuno

1-a eldono en Esperanto

aŭgusto 2007

Uberlândia/MG - Brazilo

---

*La vendprofitoj de ĉi tiu verko estos destinataj al la laboragado de  
Aliança Municipal Espírita de Uberlândia*

**Mendoj al:**

*Aliança Municipal Espírita de Uberlândia*

Av. Getúlio Vargas, 1727 Bairro Tabajaras

CEP 38400-299 – Uberlândia – MG, Telefono: (34) – 3235-0856

Retadreso: [amespirita@amespirita.org.br](mailto:amespirita@amespirita.org.br) Retpaĝo: [www.amespirita.org.br](http://www.amespirita.org.br)

# Spiritismo: 150 Jaroj

Historia kaj Doktrina Panoramo de la  
Spiritisma Kodigado



Aliança Municipal Espírita de Uberlândia

Uberlândia – MG

2007



Ĉi tiu verko signifas plian klopodon de **Aliança Municipal Espírita de Uberlândia – AME** - (Spiritisma Municipa Alianco de Uberlândia) disvastigi Spiritismon, samtempe omaĝante la misiulon kiu dediĉis sian vivon al la edukado.

Ĉe la 43 jaroj da publikigado de la ĵurnalo **Vida Espírita** (Spiritisma Vivo), kiam pluraj temoj estas disvolvigitaj en kunlaboro kun loĝantoj de Uberlândia kaj ĝia ĉirkaŭa regiono; alkalkulante la sukcesan eldonadon de la libro **Terra Fértil, Semente Lançada – a história do Espiritismo em Uberlândia** (Fruktodona Grundo, Ĵetita Semo – la Historio de Spiritismo en Uberlândia), veninta al la lumo en la jaro 2000; organizite kaj finstarigite de la **Clube do Livro Espírita** (Klubo de la Spiritisma Libro), kiu disponebligas spiritismajn librojn al ĉiuj interesitoj; per ĉi tiu nova libro, kiu priskribas la **historian kaj doktrinan panoramon de la Spiritisma Kodigado**, kaj per la nuna kaj signifoplena paŝo ĝin eldoni en Esperanto, ampleksigante ĝian diskonigadon, plifirmiĝas en nia AME la konvinko, ke ĉi tiu regiono el Minas Gerais ja kalkulas je valoraj homoj kiuj deziras partopreni kaj kontribui en la plifortigo de la spiritismaj idealoj.

La Direktoraro

[www.amespirita.org.br](http://www.amespirita.org.br)



[...]

*La deviga kaj dia ordonvorto ankoraŭfoje kaj ĉiame estas AMO!*

*Kaj la neforgesebla rekomendo por la protekto de la movado kiu renovigas la animojn estas INSTRUADO!*

*Amo, kiu koncentras fortojn kaj unuigas korojn ĉirkaŭ tiu grandioza verko de la homa evangelizado.*

*Instruado, kiu malkaŝas komunajn interesojn ĉe la samaj idealoj, frukto de la nobliga studado ĉiam celanta la sanktajn valorojn de la VERO!...*

*Urĝas la tempoj ...*

*Ĉiuj profetaĵoj plenumiĝos!*

*La bonvolemaj homoj heredos la Teron!*

[...]

Allan Kardec

(Fragmento el teksto de la medio Júlio César Grandi Ribeiro, ricevita vespere en 2-1-1984, en la Brazila Spiritisma Federacio, en Braziljo - DF, ĉe la memoriĝaj solenaĵoj de la I-a Centjariĝo de FEB, ĉeforganizacio de Spiritismo en Brazilo, kaj okaze de la translokiĝo de ĝia ĉefsidejo al Braziljo.)





# Enhavo

Noto de la tradukinto.....	11
Heroldo de la Transtombo.....	13
Kardec kaj la Nova Erao.....	15

## **Spiritismo: 150 jaroj**

<b>Historia kaj Doktrina Panoramo de la Spiritisma Kodigado.....</b>	<b>17</b>
--	-----------

## **De Rivail a Kardec: biografia sintezo**

I – Enkonduko .....	19
II – La Metodo de Pestalozzi kaj la Verko de Rivail .....	21
III – La Verko pri Matematiko kaj la Patrinoj .....	23
IV – La Antropononimo Hippolyte-Léon Denizard Rivail .....	24
V – Kardec, la Demiurgo .....	26
VI – Bibliografiaj Referencoj.....	27

## **La Libro de la Spiritoj**

I – Historio de la Verko .....	28
II – Helpaj Verkoj por la Studo de <i>La Libro de la Spiritoj</i> .....	31
III – Sugestoj pri Gvidilo por Studoj de <i>La Libro de la Spiritoj</i> ..	33
IV – Sugestoj pri Gvidilo por Prelego.....	35
V – Konkludo: La Graveco de la Studado de <i>La Libro de La Spiritoj</i> .....	40
VI – Bibliografiaj Referencoj.....	41

## **La Libro de la Mediumoj: Gvidilo por mediuma sekura praktikado**

I – Historio de la Verko .....	45
II – Helpverkoj por la Studo de <i>La Libro de la Mediumoj</i> .....	54
III – Sugesto por Studgvidilo de <i>La Libro de la Mediumoj</i> .....	57
IV – Sugesto pri Gviplano por Prelego .....	62
V– Konkludo: La Graveco de la Studado de <i>La Libro de la Mediumoj</i> .....	65
VI – Bibliografiaj Referencoj.....	69

## **La Evangelio laŭ Spiritismo:140 jaroj post la publikigo**

I – Historio de la Verko.....	71
II – Helpaj Verkoj por la Studo de <i>La Evangelio Laŭ Spiritismo</i> ...	74
III – Sugesto de Gvidilo por Studo de <i>La Evangelio Laŭ Spiritismo</i> .....	75
IV – Sugesto por Gvidilo por Prelego.....	77
V – Konkludo: La Graveco de la Studo de <i>La Evangelio Laŭ Spiritismo</i> .....	80

VI – Bibliografiaj Referencoj.....	81
<b>La Ĉielo kaj la Infero</b>	
I – Historio de la Verko.....	84
II – Helpoverkoj por la Studo de <i>La Ĉielo kaj la Infero</i> .....	91
III – Sugesto pri Gvidilo por Studo de <i>La Ĉielo kaj la Infero</i> .....	91
IV – Sugesto pri Gvidilo por Prelego.....	93
V – Konkludo: La Graveco de la Studo de <i>La Ĉielo kaj la Infero</i> ..	95
<b>La Genezo</b>	
I – Historio de la Verko.....	98
II – Helpoverkoj por la Studo de <i>La Genezo</i> .....	100
III – Sugesto de Gvidilo por la Studo de <i>La Genezo</i> .....	103
IV – Sugesto de Temo el <i>La Genezo</i> por Studo.....	109
V – Konkludo: La graveco de la Studo de <i>La Genezo</i> .....	114

## **Noto de la tradukinto**

Ĉi tiu verko estas rekte tradukita el la portugala originalo. Ĉar ĝi temas pri la historia panoramo de la Spiritisma Doktrino, ĉe kiu diversaj aŭtoroj priskribas la mirindan laboron de Kardec, kompreneble oni ne malofte trovas citaĵojn eltiritajn el la portugala tradukoj de la kvin fundamentaj verkoj de Kardec. Ĉiokaze, same kiel la ceteraj partoj, ili devus esti tradukitaj en Esperanton. Tamen, oni scias, ke tiuj verkoj de Kardec, la bazo de la Spiritisma Kodigado, estas mirinde tradukitaj de eminentaj Esperantistoj, spertuloj pri la tradukarto, el kiuj elstariĝas L. C. Porto Carreiro Neto, la “senkompara konanto de la Zamenhofa lingvo”, laŭ la vortoj de Gaston Waringhien. Petinte permeson al la eldonfako de la Brazilia Spiritisma Federacio, mi transkopiis, kiam oportune, la koncernajn citaĵojn laŭ la originalaj Esperantaj versioj, por riĉigi ĉi tiun senpretendan tradukon.

Mi volas tiel omaĝi la karajn samideanojn, kiuj per fruktodona traduklaboro, surbaze de la franclingvaj originaloj, internacilingve disponigis al la tuta mondo la “Pentateŭkon” de Kardec, nome:

- L. C. Porto Carreiro Neto – tradukinto de *La Libro de la Spiritoj* kaj *La Libro de la Mediumoj*;

- Ismael Gomes Braga – tradukinto de *La Evangelio laŭ Spiritismo*;

- A. K. Afonso Costa kaj Benedicto Silva – tradukintoj de *La Ĉielo kaj la Infero*;

- Affonso Soares – tradukinto de *La Genezo*.

Mi laste volas esprimi grandan dankon al la klera samideano Paulo Sérgio Viana, kiu grandanime akceptis revizii la tradukitan tekston. Lia stimulo estis decida por ke mi, ankoraŭ ekpaŝanta sur la vojo de la Esperanta tradukado, kuraĝu plenumi la taskon al mi donita de la karaj amikoj el Uberlândia.

*Said Pontes de Albuquerque*



## Heroldo de la Transtombo

Kardec, fasko ĉielluma  
Kiu al tero radiis,  
Lia doktrino klarigis  
Evangelion Jesuan.

Racio miksitaj al am`  
Jen forbatis necertecon  
Kiu blindigis belecon  
De la viv` supera tiam.

Majstro ĉiele sendita  
Pri homa reenkarriĝo  
Pruvis, ke evoluiĝo  
Estas sur Justec' bazita.

Li pri dolor` kaj liber`  
Donis novan lecionon,  
Montris elaĉetan bonon,  
Frukton de Karit` kaj ver`.

La Supro pere de li  
Alvokis al l` egaleco,  
kiu ĉe la senmorteco  
Kunligas frate al ni.

Ho Disendito, Saluton!  
Kondukas vi, de ducent jaroj,  
Al Jesuo la homaron  
Por la gloro de la bon`.

**Camilo Chaves**

*Mesaĝo mediume ricevita de Giva de Freitas Teixeira Oliveira, dum la SPIRITISMA KUNVENO KUN PSIKOGRAFIA PRAKTIKO, realigita ĉe la laborperiodo de Studoj pri Mediumeco - 2004. Ĉi tiu kunveno okazis en la vespero de la 27/7/2004, en la Spiritisma Grupo Bezerra de Menezes, en Uberlândia - MG -, realigita de la Departamento pri Mediuma Orientado de la Spiritisma Municipala Alianco de Uberlândia.*



## **Kardec kaj la Nova Erao**

Miaj amataj, kiel humila servisto de ĉi tiu templo de amo, ni salutas vin ĉiujn, en la nomo de Jesuo.

La sublima Kodiginto de la Doktrino de la Spiritoj komentarias en la mirinda verko “A Gênese” (*La Genezo*) la evangelian tekston, per kiu la Majstro Jesuo antaŭvidis la finon de la tempoj. Se ĝis antaŭ du jarcentoj tiu aserto de Kristo signifis la finon, la disruiniĝon de la terglobo al ni ŝirmanta la surterajn migradojn, hodiaŭ kaj ekde la komenco de nia doktrino de amo kaj espero, la Krista dirado akiras sian veran signifon: alvenis al sia fino la tempoj de timegigaj doloroj kaj de miskompreno pri la dia Vero, ĉar nova erao el lumo kaj paco jam sentiĝas ĉe la sojlo de la tria jarmilo, en kiu Jesuo prezidas la apartigon de la lolo kaj de la tritiko, por ke la animoj minimume instruitaj je la lumo de amo ekposedu la regeneritan Teron.

Alvenis la erao de pli granda respondeco de tiuj kiuj edukiĝas en la vicoj de Spiritismo. Jen la prirespondeco havas la amplekson de la kono.

Kiam sennombraj regionoj niamondaj baraktas en sangverŝaj bataloj celantaj la pasemajn materiajn valorojn, al kiu koncernos do uzi la armilojn de amo, de konkordo, de frateco kaj de bonvolo, por ke la globo kiu faciligas al ni la evoluadon atingu pli superan esprimon en la dia koncerto de la senfina progreso?

Amataj filoj, ni do provu enmemigi la instruojn kaj de la diaj leĝoj kaj de la Evangelio de la Kristo, tiel ke la doktrino de la Konsolanto elstaru per agoj de amo kaj boneco, kaj ke la leĝoj de justeco, amo kaj karito ne estu ia neatingebla utopio, sed realo al ni proksima, profitodona kaj harmonia kun la fundamento de la doktrino kiun ni amas kaj sekvas.

La Kristo de Dio vin benu kaj la paco kaj la espero ekloĝu interne de vi nun kaj ĉiam.

### **Bezerra de Menezes**

*Mesaĝo mediume ricevita de Giva de Freitas Teixeira Oliveira, dum la SPIRITISMA KUNVENO KUN PSIKOGRAFIA PRAKTIKO, realigita ĉe la laborperiodo de Studoj pri Mediumeco - 2004. Ĉi tiu kunveno okazis en la vespero de la 27/7/2004, en la Spiritisma Grupo Bezerra de Menezes, en Uberlândia - MG -, realigita de la Departamento pri Mediuma Orientado de la Spiritisma Municipa Alianco de Uberlândia.*



# Spiritismo: 150 jaroj

## Historia kaj Doktrina Panoramo de la Spiritisma Kodigado

*Mi deziras koni la Doktrinon organizitan de Allan Kardec ...*

*Mi ŝatus scii pri Spiritismo ...*

El tiaj observoj originis la ideo pri ĉi tiu libro, idealigita kaj organizita de Spiritisma Municipa Alianco de Uberlândia, kunlabore kun spiritistaj kunuloj el nia urbo kaj ties regiono.

Destinata ĝenerale al komencantoj, simpatiantoj, prelegantoj kaj studemuloj, ĉi tiu verko ankaŭ celas:

- memorfesti la Cent-kvindek-jariĝon de la Libro de la Spiritoj;
- stimuli la individuan aŭ grupan studadon de la Kvinlibra Kodigado de Kardec;
- disponigi informojn por organizita kaj sistema studado de la instruoj de la Superaj Spiritoj.

Ni profitu ĉi tiun memorigan jaron por legi aŭ relegi la verkaron de Kardec kaj ni certe atingos la celon kompreni kaj travivi la Humanisman kaj Kristanan Spiritismon, kiun la franca majstro al ni postlasis, diktitan de la Superaj Spiritoj.

*Saluto al Parizo, Francujo, la 18an de oktobro 1857.*

*Uberlândia – MG, la 18an de aprilo 2007.*

### **Municipa Spiritisma Alianco de Uberlândia**

Sidejo de la Regiona Spiritisma Konsilantaro Nord-Zona  
de Triângulo Mineiro



# De Rivail al Kardec: biografia sintezo.

*Evandro Silva Martins*

## I. Enkonduko

Antaŭ ducent jaroj naskiĝis *Allan Kardec*, la sistemiginto de la Spiritisma Doktrino. Pri lia apostola vivo multon oni scias, sed restas nekonataj multaj el liaj biografiaj trajtoj de 1804 ĝis 1805, dato de lia “renkonto ĉe Damasko”.

Granda kvanto da informoj perdiĝis kiam la nazioj terenfaligis la Domon de la Spiritistoj, post la konkero de Parizo, dum la Dua Mondmilito. Se oni ne povus interalie kalkuli je *Canuto Abreu*, *André Moreil* kaj je la detala esploro entreprenita de *Wantuil* kaj *Thiesen* (1979), ni malmulte scius pri la etapoj de la vivo de profesoro Rivail en la kvin jardekoj antaŭantaj lian vokadon al la misia laboro.

Laŭeble li kreskis sub la atenta kaj karesa rigardo de Sinjorino Jeanne Louise Duhamel kaj de Sinjoro Jean-Baptiste Antoine Rivail. De 1804 ĝis 1814, la knabo Hippolyte-Léon certe plurfoje ludis, kiel iu ajn infano liaaĝe, ĉe la sablaj kaj ŝtonhavaj bordoj de la malnova rivero Saône, kiu fluas tra la jarmila Liono, lia naskiĝurbo.

En 1814, la juna Rivail translokiĝis al Yverdon por eniri la Instituton Pestalozzi. Ĝis 1818, sub la ama protekto de Johan Heinrich Pestalozzi, la fama svisa edukisto, la junulo enprofundiĝas en la tiutempajn sciencajn kaj lingvajn konojn, preparante sian spiriton por la al li konfidita misio. Li revenas al Francujo en 1824 kaj ekloĝas Parizon. De tiu dato ĝis la jaro 1848, la estonta kodiganto de Spiritismo sin prezentas en la vestoj de pedagogo-verkisto.

Tiu estas la epoko, kiun ni pritraktos. Oni malmulte parolas pri la literaturaj-lingvistikaj verkoj de tiu fazo. Kvankam li skribis dekojn da libroj, kiel: 1824 – *Praktika kaj Teoria Kurso de Aritmetiko*; 1828 – *Plano por la Plibonigado de la Publika Instruo*; 1831 – *Klasika Franca Gramatiko, Naciaj Solvoj de la Demandoj, Problemo de Aritmetiko kaj Geometrio, Manlibro de la Ekzamenoj por la Kapablo-atestaj Titoloj*; 1846 – *Programo de la Ordinara Kursoj de Kemio, Fiziko, Astronomio kaj Fiziologio*; 1848 – *Gramatika Katekismo de la Franca Lingvo por la Komencantaj Lernantoj de la Idiomo, Specialaj Diktaĵoj pri la Ortografiaj Malfacilaĵoj – temoj por ekzamenoj, Normalaj Diktaĵoj el la Ekzamenoj de Hotelo de Ville kaj el la Universitato Sorbonne*, ni ekzamenos la kovrilon de lia unua verko, publikigita en 1824.

Ni ne povis trafolumi liajn verkojn el tiu periodo, ĉar tute certe ili troviĝas en malfacile alireblaj francaj bibliotekoj kaj tial ni limigos nin al la kovrilo de la verko eldonita en 1824 kaj reproduktita de Wantuil kaj Thiesen, 1979. La vortoj de Rivail tien metitaj permesas al ni pripensadi pri la influo de Pestalozzi sur lia dikaktika verko, pri la praktikado de la Pestalozzi-Rivaila instruo kaj pri la notoj rilataj al lia baptonomo. Ni ekpaŝu do al la analizo.

Aĝanta nur dudek jarojn, kiam la plej multo el la junuloj eniras en la socion serĉe de emocioj, Rivail publikigas en Parizo la verkon *Praktika Kurso kaj Teorio pri Aritmetiko*.

Ni atentu al la kovrilo de la menciita libro, en du ĉapitroj, formato in-12, konsistigantaj entute 624 paĝojn, publikigita de la tipografio Pillet-âine. Oni legas tuj post la titolo: “d’après la méthode de Pestalozzi”.



## II. La Metodo de Pestalozzi kaj la Verko de Rivail

En Brazilo kaj precipe ĉe la spiritista familio estas plena nescio pri la verkoj de Pestalozzi. Kvankam pri ili ekzistas en la mondo, laŭ la studemuloj, pli ol dek du mil titoloj, inter libroj, tezoj kaj artikoloj, en la brazila universitata medio la nombro ne atingas seson da verkoj. La plejmulto el tiuj libroj nur supraĵetuŝas la penson de Pestalozzi, sen akproksimiĝo al ia akademia ekzegezo kiel okazas en Eŭropo.

Malgraŭ tio, ke ni ne dronigos nin en lian verkaron, pro la menciitaj kialoj, ni mallonge skizos kelkajn ideojn de la eminenta majstro de Kardec.

Dora Incontri (1996), respektata studemulino de la verkaro de Pestalozzi, diras, ke:

*Koni Pestalozzi laŭ la metodo estas koni la ŝelon de lia penso, ĉar tio signifas lin koncepti nur laŭ pedagogia vidpunkto, nesciante, ke li estas intime ligita al filozofio de edukado. (Incontri, 1996, p. 15.)*

La filozofio de edukado de Pestalozzi centriĝas en la plena disvolviĝo de la homo. Li reliefigas, ke la kultivado de ununura faceto de la homa karaktero malprofite por la ceteraj estas malutila kaj evitinda, ĉar ĝi ne kondukas al kompleta edukado. Pri tio konsentas Lopes (1981), kiam li citas diraĵojn el la verko de Pestalozzi nomata "La kanto de la Cigno":

*Iu ajn unudirekta disvolvado de niaj fortoj estas nenio pli ol ŝajno de edukado. Ĝi estas la sonanta metalo aŭ sonorileto de la edukado, tamen, ĝi ne vere estas edukado. La nekompleteco en la elvolviĝo de ĉi tiuj fortoj kondukas al la malkonstruo kaj al la morto de la tuto de la homa naturo, kiu nur devas disvolviĝi laŭ la adekvata maniero. Estas nediskuteble, ke tio vere eduka kaj kontribua por la homa karaktero troviĝas ekskluzive*

*en la afero kiu envolvas la tuton de la fortoj de la homa naturo, tio estas, koro, cerbo kaj mano. La praktikado de moralaj ekzercoj ekmovas la spiritajn kaj fizikajn fortojn de knabo; la vojo de intelekta kreskado ankaŭ disvolvas la koron kaj la korpajn organojn, samkiel la ekzercado de la korpo siavice plifortigas la homan kaj moralan naturon.*

Apogante nin sur la koro, metafora maniero laŭ kiu sin prezentas la amo, ni trovas serion da fragmentoj el liaj verkoj kiuj al ni donas la bazon por koni liajn ideojn pri ĉi tiu esenca sento por la edukado.

La giganto el Zuriko asertas al ni, ke:

*Sen amo la fizikaj kaj intelektaj fortoj ne atingas plenan disvolviĝon. Amo estas la nura kaj longedaŭra fundamento sur kiu ni povas eduki nian naturon por la homaro. Sennobraj infanoj liberigis sin el la tentado kiam ili ekpensis pri la amo de siaj gepatroj. La instruado mem estas neŭtrala. Ĝi starigas nek amon nek malamon. La motivo kuŝas en tio, ke en ĝi ne estas la esenco de edukado. Tiun konsistigas la amo. Nur amo estas la eterna fonto de la dieco, kiu enestas en nia interno. Ĝi estas la centro el kiu elradias tio esenca en la edukado. Amo ne agas tirane: ĝi kreas kaj konstruas. Same kiel la okuloj volas vidi, la oreloj volas aŭdi, la piedoj volas iri, kaj la manoj volas kapti, tiel same la koro volas kredi kaj la amo kaj la spirito volas pensi.*

Kiel oni povas rimarki, la unua el la verkoj de Rivail ricevis apogon en la ideoj de Pestalozzi, kiam li provis doni al ĝi didaktikan karakteron, alcelante tiel la instruistojn kiel la gepatrojn de la lernanto, precipe la patrinojn. Estas notinde, ke la libro ne estis ripetaĵo de la penso de la majstro, sed ankaŭ prezentis la geniecon de Kardec. Liaj pasintaj reenkarneĝoj, ĉu kiel druida sacerdoto, kies misio estis orienti la junularon, ĉu kiel Johano

Huss, la admirinda ĉeĥa edukisto, certe elmergigis la kondiĉojn por ke li tiel junaĝe estu produktinta tiajn multformajn verkojn, kiuj variis de Aritmetiko al Fiziko, de Literaturo al Lingvistiko.

### **III. La Verko pri Matematiko kaj la Patrinoj**

Al Pestalozzi estis eksternodirare valora la influo de la familio en la edukado de ties infanoj. Hodiaŭ la verkoj direktataj al la edukado de la junularo grandparte ignoras la gravecon de la patrineca fonto de edukado. La edukisto Rivail lernis en Yverdon, ĉe la multnombraj lecionoj kiujn li ĉeestis kaj ĉe multaj aliaj per kiuj li anstataŭis sian majstron, ke:

*La vivo edukas.*

*La hejmo estas la lernejo kie la homo plej bone trejniĝas por la vivo, ĉu publika aŭ privata.*

*Vi Tamen ne vivas surtere ekskluzive por vi.*

*La naturo vin edukas por la eksteraj kaj internaj rilatoj.*

*Estas dezirinde kaj konvene ke la infanoj lernu ion, sed al ili pli gravas esti io.*

*Por akiri saĝecon kaj trankvilecon la homa edukproceso devas esti simpla kaj univarsale aplikata.*

*La hejmo estas la bazo de ĉia morala edukado por la homaro.*

*La patra hejmo estas la lernejo de la kutimoj kaj de la publika vivo.*

*Nek la arto, nek la libroj, sed la vivo mem estas la fundamento de edukado kaj de instruado.*

*La vivo edukas; tio tamen ne temas pri nura parola aserto, sed pri agado. Ĝi signas aktivecon.*

*Estas utile instrui al infanoj legi, skribi kaj reciti, sed multe pli grave estas al ili instrui pensi. (Ĉe Lopes, 1981, p. 110-114.)*

Kiel oni vidas, la koncepto pri edukado estas dinamika. Ĝi ne estas jungita al nura instruado, al surmetitaj niveloj de informoj. Multe pli ol tio, edukadon oni konstruas en la hejmo, en la vivo, per uzo de la menso kaj de la manoj.

Nuntempe oni atribuas eksterordinaran valoron al la instrua agado. Ni vivas en jarcento, en kiu la kvanto da informoj kiujn oni povas serĉi estas nemezurebla. Sufiĉas disponi pri informadika servo kaj ni, kiel neniam antaŭe okazis, havas rektan perkomputilan aliron al reto de informoj. La homaro tamen neniam sin trovis tiel orfa de edukado. Tial, la konsideroj de Rivail, ke la patrinoj komprenos lian tekston pri Aritmetiko kaj povos tion transdoni al siaj gefiloj, estis io signifoplena kaj admirinda.

## **IV. La Antroponimo Hippolyte-Léon Denizard Rivail**

La kovrilo de la verko *Praktika kaj Teoria Kurso de Aritmetiko* portas la nomon de H. L. D. Rivail, kiu mem nomas sin “disciplo de Pestalozzi”. Ni studu do la etimologiajn bazojn de la baptonomo de Kardec. Por nia celo, ni helpas nin per la studoj de Antroponimio, ĉar per la antroponimoj, tio estas, la nomoj de la personoj, ni povas, laŭ tio kion *Albert Dauzat* informas, rekonstrui interesajn kaj reliefajn kulturajn faktojn. Ne nur Etimologio estas unu el la gravaj aspektoj de Antroponimio, sed per ĝia studo ni povas klarigi la kaŭzon aŭ la kaŭzojn de la unue elektita nomo.

Malmultaj personoj sin donadis al la studo de la bapta nomo de la eminenta kodiginto de Spiritismo. Tamen, la studo de la nomo *Hippolyte-Léon Denizard Rivail* kunportas al ni kuriozajn informojn.

Kiel oni scias, li naskiĝis je la 19a horo de la 3a tago de oktobro 1804, en la urbo Liono. Li estis filo de Jean-Baptiste Antoine Rivail, leĝlaboranto, juĝisto, kaj de Jeanne Louise Duhamel, admirinde bela, talenta, eleganta kaj afabla virino. Li heredis de



la patro la familian nomon Rivail; sed la nomo konsistas el la kunmetaĵo Denizard Rivail. El kie originis ĉi tiu nomo?

*Albert Dauzat*, brila franca studemulo de Antroponimio, klarigas al ni, ke estas tre komunuze doni al la infanoj nomojn kiuj por ili taŭgus kiel protektaĵo. En Brazilo, dum longa tempo la nomoj de multaj infanoj estis eltirataj el folietoj aŭ el almanakoj. Tiuj nomoj apartenis al sanktuloj de la katolika hagiografio. Nomi la infanojn per la sanktulaj nomoj ilin metus sub la dian protekon.

Ni vidu, kio okazas rilate al la baptonomo de Kardec. La konojn por nia klarigo ni alprenos de la eksterordinara spiritista filologo, Doktoro Canuto Abreu, eble la plej granda aŭtoritato pri la biografio de Kardec. En la artikolo aperinta en la revuo "Santa Aliança" (Sankta Alianco), de februaro 1956, li klarigas, ke la inversigo de la antaŭnomo Kardec trovata en kelkaj eldonoj ŝuldiĝas al la kunuloj de la *Société Parisienne des Études Spiritiques* (Pariza Societo de Spiritismaj Studoj). Liaj amikoj inversigis la unuajn kromnomojn, skribante Léon-Hippolyte anstataŭ Hippolyte-Léon.

Koncerne la etimologion de la nomo, ni akompanu la opinion de Doktoro Canuto Abreu. Tiu lerta studemulo de la Kardeka verkaro jene asertas:

*Laŭ mia opinio, la nomo Denizard originis el la malnova latina esprimo Dionysos Ardenae, koncernanta la Dion Dyonisio (Dionizo), de la arbaro Ardeno. En tiu grandega gaŭla arbaro, kies longo atingis pli ol 500 mejlojn, laŭ kalkulo de Julio Cezaro, la druidoĵo celebris la festajn alvokojn de la Nacia Dio de Galio, nomita Te-Te-Te, Plejaltulo, reprezentata per centjara kverko. Ĉe la ombro de la dia kverko, la romiaj legianoj, post la malvenko de Vercingetorix, levigis la statuon de la Dio Dionizo, ankaŭ konata laŭ la nomo Bacchus (Bakĥo), dio de la sovaĝarbaroj, de la ebenaĵoj, de la vinberoj, de la tritikplantejoj, amanto de rustikeco kaj de libereco.*

*Konforme al la kutimoj de la venkintoj, oni enskribis latinan surskribaĵon ĉe la monumento. Oni supozas, ke ĝi tiel tekstis: Dionysio Rústico Eleuthero, kun la signifo: Rustika Dionizo en Libero.*

Dionysius suferis evolu-simpligon al “Dionys-Denis”. *Ardenae*, latinigo de “ard-nae”, granda arbaro, simpliĝis al “ard”. Tiel oni venas al Denizard, kun la litero –z, kaj ne –s.

Estis prava la lingvisto Dauzat. La patro de la estonta kodiginto de la Spiritisma Doktrino, sinjoro Antoine Rivail, kreita en la katolika kredo, konsekris la infanon al Denis-ard, elvokiva kaj Spirita Protektanto de Francujo.

## **V. Kardec, la Demiurgo**

Laŭ tio, kion ni jam diris, de 1824 ĝis 1848 ni vidas profesoron Rivail kiel homon kaj majstron. Homo, kiu direktas sian vivon laŭ la etikaj devoj de la socio, kaj majstro, kiu instruas al la franca junularo la konojn de tiu epoko. Kun eklektika spirito, li laboras sur ĉiuj kampoj de scienco kaj enprofundiĝas en la lingvistikajn studojn. Laŭ Vianna de Carvalho “li ne predikas justecon – sed kultivas ĝin per la agoj; li ne parolas pri amo – sed elverŝas ĝin en la lernejo-sanktulejon.” (Vianna de Carvalho, 1983, 18.)

Ni konsideras tiun fazon kiel la preparan momenton de Allan Kardec. Por la homerecaj luktoj, kiujn li devus fronti, estus necese, ke lia spirito rememoru la hieraŭon pere de la edukaj laboroj, akirante respektindan nomon antaŭ siaj samtempuloj. Atinginte tiun etapon, venos la momento meti sur la podion la figuron de la druido. Estiĝis, ekde tiam, *Allan Kardec*, kies gloro, sen homaj aŭreoloj, restas neatingebla, neskuebla. Gloro, ĉar li forgesas sin mem por servi al la homaro, vivante laŭ la Jesua instruo.

Ĉio interligiĝas. De Rivail al Kardec ne estas interrompo, sed ja unuiga rilato. En *Rivail*, la semo; en *Kardec*, la elvolviĝo de la

fortika kverko, sub kies branĉoj la homaro trovos apogon por la longa vojirado al la zenito de sia evoluo.

## **VI. Bibliografiaj Referencoj**

ABREU, Canuto. *O Livro dos Espíritos e a sua tradição histórica e lendária*. São Paulo/SP: Lar da Família Universal, 1992.

AMORIM, Deolindo. *Allan Kardec*. Juiz de Fora / MG: Instituto de Maria, 1981.

CARVALHO, Vianna de (Spirito). *À Luz do Espiritismo*. Mediumice ricevita de Divaldo Pereira Franco. Salvador / Bahia: Livraria Espírita Alvorada, 1983.

IMBASSAHY, Carlos. *A Missão de Allan Kardec*. Curitiba/PR: Federação Espírita do Paraná, 1988.

INCONTRI, Dora. *Pestalozzi: educação e ética*. São Paulo/SP: Scipione, 1997.

LOPES, José Luciano. *Pestalozzi e a educação contemporânea*. Duque de Caxias / RJ: Rio de Janeiro: Centro de Editoração e Jornalismo da AFE, 1981.

MONTEIRO, Eduardo Carvalho. *Allan Kardec (o druída reencarnado)*. Capivari /SP: Editora EME, 1996.

MOREIL, André. *Vida e Obra de Allan Kardec*. Tradução de Miguel Maillat; revisão doutrinária de J. Herculano Pires. São Paulo/SP: Edicel, 1986.

WANTUIL, Zêus e THIESEN, Francisco. *Allan Kardec (detala bibliografia esploro)*. Rio de Janeiro/RJ: Federação Espírita Brasileira, 1979.

# La Libro de la Spiritoj

*Sílvio Divino de Oliveira*

## **I. Historio de la Verko**

La historio de Spiritismo iel ligiĝas al Hydesville, malgranda urbeto de Usono, kie en modesta domo vivis la familio Fox. Kiel sciante, tie okazis nekutimaj fenomenoj de fizikaj efikoj sub la pretervola mediuma agado de la junaj fratinoj Fox (Margaret, Kate kaj Leah). La nevidebla komunikiĝanto produktis frapojn tra la domo, timigante la tutan familion. Oni interkonsentis tiam uzi alfabeton ĉe kiu ĉiu aparta litero estis reprezentata de difinita nombro da frapoj, kaj en la *31<sup>a</sup> de marto 1848* estis starigata dialogo kun la “fantomo”. Lia historio fariĝis konata. Li estis kolportisto, mortigita de iamaj loĝantoj de tiu domo kaj enterigita en la interno de ĝia kelo. Tiu nekredebla okazaĵo estis poste konfirmita, kiam oni trovis la kadavron de la komunikiĝinto.

La knabinoj Fox vojaĝis kaj kie ili gastigadis okazis similaj fenomenoj. Alia interesa apartaĵo malkovriĝis. Oni rimarkis, ke ili posedis specialan kapablon, kio poste estis same observata ĉe aliaj personoj, tio estas: ĉe la kontakto de iliaj manoj malgranda tablo leviĝis kaj aŭdigis frapojn.

Ekestis la epoko de la *turniĝantaj tabloj*, kies famo rapide disvastiĝis. De Ameriko ĝi etendiĝis al Eŭropo, simile al ekbrulinta meĉo de pulvo, altiranta la atenton de la tuta mondo. La fenomeno fariĝis amuziĝo kaj tempopasigilo en la aristokrataj salonoj kaj hejmoj de la tiama socio.

La turniĝantaj tabloj kaj, poste, la “parolantaj”, vokis la atenton de la singardema instruisto Hippolyte-Léon Denizard Rivail al la spiritismaj fenomenoj en Parizo, Francujo.

Komence, la pli seriozaj observantoj, inter ili la eminenta instruisto Rivail, opiniis, ke ĉio estas konsekvenco de la agado de magneta emanaĵo, kies propraĵojn oni pli bone devus koni.

En la fino de 1854, S-ro Fortier, persona amiko de Rivail, portis al li la strangan novaĵon. La tabloj ne nur moviĝadis aŭ frapadis, sed ankaŭ respondis al inteligentaj demandoj pere de kurioza alfabeto, al kiu oni antaŭe difinis ioman nombron da frapoj. Ĝis tiam Denizard Rivail ne ĉeestis la fenomenon. Serioza persono, li ne interesiĝis pri la tiamaj frivolaĵoj aŭ laŭmodaĵoj. Li respondis al entuziasma amiko kiel vera scienc-racia homo: *Mi nur kredos, kiam mi tion vidos kaj kiam oni pruvos al mi, ke tablo havas cerbon por pensi, nervojn por senti kaj ke ĝi povos fariĝi somnambula. Ĝis tiam, permesu ke mi vidu en tio ne pli ol rakonton por igi nin dormi stare.*<sup>1</sup>

En majo de la jaro 1855, invitite por partopreni kunvenon en la domo de S-ino Plainemason, Rivail ĉeestis je la unua fojo la fenomenon de la turniĝantaj tabloj, en tiaj kondiĉoj, ke ne restis al li plej malgranda dubo pri ĝia aŭtentikeco.

La faktoj poste observitaj de Rivail, pere de pluraj medioj, estis tiel evidentaj, ke ili motivigis la kleran majstron aserti poste: *En tiuj ŝajnaj frivolaĵoj, en la tempopasigilo, kiu fariĝis tiuj fenomenoj, mi perceptis ion gravan, kvazaŭ la riveladon de ia nova leĝo, kiun mi funde devigis al mi studi.*<sup>2</sup>

Rivail plu vizitadis dum iom da tempo la kunsidojn en la domo de S-ino Plainemason, kie li efektivigis zorgajn observojn. Li poste estis invitata ĉeesti seancojn en la domo de la familio Baudin, kie li trovis adekvatan etoson por daŭrigi siajn esplorojn. En 1856, la mediumaj spertoj realigitaj ĉe tiu respektinda familio kalkulis je la ĉeesto de distinginda kaj multnombra rigardantaro. Tie la *Libro de la Spiritoj* estis komencata kaj grandparte verkata. Komence

---

<sup>1</sup> Allan Kardec: *POSTMORTAJ VERKOJ*, 25, eld. Rio de Janeiro: FEB, p. 265

<sup>2</sup> *Id.*, lb. p. 267.

de lia vizitado, la Instruisto Rivail konstatis la realigadon de vantaj kunvenoj, sen seriozaj celoj. Lia ĉeesto tamen ŝanĝis la celon de la eksperimentoj. Jen kiel procedis la Liona majstro, laŭ liaj propraj vortoj: *Mi kunportis al ĉiu sesio serion da antaŭpreparitaj kaj metode dispoziciitaj demandoj. Ili estis ĉiam respondataj kun precizeco, profundeco kaj logiko. (...) Mi, principe, nur zorgis instrui min; pli poste, kiam mi vidis, ke tio konsistigas tutecon kaj akiris konturon de iu doktrino, venis al mi la ideo publikigi la ricevitajn klarigojn por la ĝenerala instruado de la popoloj.*<sup>3</sup>

La kodiganto ankaŭ kalkulis je la kunlaboro de aliaj medioj, je kontribuaj senditaj de korespondantoj kaj, speciale, li havis la median kunhelpon de F-ino Japhet, ĉe la domo de S-ro Roustan. Tie, dum intimaj kunvenoj, estis farata la revizio de la verko, for de la antaŭtempaj prikomentoj de la publiko, kaj estis aparte laborantaj nur la kodiganto kaj la mediumino, en tagoj kaj horoj antaŭdifinitaj de la Spiritoj.

Malgraŭ tio, la misiisto, zorgema kaj sagaca, ne kontentiĝis per la revizio farita kunlabore kun la sindonema F-ino Japhet kaj tiele agis: *Ĉar mi estis en cirkonstanca rilato kun aliaj medioj, ĉiam kiam prezentiĝis oportuna okazo mi ĝin profitis celante proponi kelkajn demandojn kiuj laŭŝajne estis pli malfacilaj. Tiel estis, ke pli ol dek medioj donis helpon al ĉi tiu laboro. El la komparado kaj kunfandiĝo de ĉiuj respondoj, kunordigitaj, klasigitaj kaj ofte refaritaj en la silento de la meditado, mi ellaboris la unuan eldonon de “La Libro de la Spiritoj”, kiu aperis en la 18<sup>a</sup> de aprilo 1857.*<sup>4</sup>

Tiel estiĝis por la homaro nova tempo, la Erao de la Spirito.

Reliefa Historia fakto estas la nomo utiligita de la kodiginto por subskribi la verkon. Lia civila nomo estis tre konata kaj respektata en la kulturaj medioj de Francujo. Influite de sento de humileco kaj ankoraŭ konsiderante, ke la verko apartenas al la Spiritoj, la

---

<sup>3</sup> *Id., lb. p. 269/270.*

<sup>4</sup> *Id., lb. p. 270/271.*

majstro decidis subskribi ĝin sub la pseŭdonimo Allan Kardec, nomo kiun li havis en antaŭa reenkarnejo, en la epoko de la druidoj, laŭ informo al li donita de protektanta Spirito.

La unua eldono de *La Libro de la Spiritoj* konsistis nur el 501 demandoj, dividitaj en tri partoj. Ŝajnas al ni intenca la strategio propra de la Superaj Spiritoj kiuj orientis la kodiginton, ke ili oferas laŭgrade la novan revelacion, liverante tempon al la maturiĝo de la opinioj sur la vasta kampo de la ideoj.

Nur en marto de la jaro 1860 la *Spiritisma Revuo* anoncis la disvendon de la dua eldono de *La Libro de la Spiritoj*, tute refandita kaj konsiderinde ampleksigita, enhavanta 1019 demandojn, dividitajn en kvar partoj. Tiu dua eldono fariĝis definitiva kaj alvenis al la nuna tempo, adoptita en la tuta mondo. Krom la 1019 studpunktoj, ĝi enhavas la majestan “Enkondukon” de Allan Kardec, la “Antaŭparolon” kaj la “Konkludon”, dividitajn en 9 partoj.

## **II. Helpaj Verkoj por la Studo de La Libro de La Spirito**

Laŭ nia modesta opinio, antaŭ ol pritrakti la helpajn aŭ komplementajn verkojn, kiuj faciligas aŭ ampleksigas la komprenon de la principoj entenataj en *La Libro de la Spiritoj*, la intereso tutcerte devos entrepreni la studon de la ceteraj verkoj de Allan Kardec, precipe la kvar, kiuj kompletigas la Kodigadon: *LA LIBRO DE LA MEDIUMOJ*, *LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO*, *LA ĈIELO KAJ LA INFERO* kaj *LA GENEZO*.

Laŭ la valora opinio de la karmemora Profesoro Herculano Pires, en lia *Enkonduko alla Libro de la Spiritoj*, verkita por la eldono de li tradukita kaj publikigita de Livraria Allan Kardec Editora, tiuj kvar libroj verdire konsistigas disvolvojn aŭ ampleksigojn de la

konceptoj fiksitaj en *La Libro de la Spiritoj*. Pli saĝa analizo eĉ klare indikas la plurajn lokojn de la teksto, kiuj respondas al la kvar cititaj libroj.

Facile estas konkludi do, ke pli klara kaj profunda kompreno de *La Libro de la Spiritoj* nature postulas la studadon de la ceteraj verkoj de la kodigado.

Krom la menciitaj asertoj, kiuj emfazas la studon de la Kardeka Pentateŭko laŭ ĝia tuta establita strukturo, ni volas reliefigi, ke *La Libro de la Spiritoj* estas monumenta verko de kulturo kaj scio, eksterordinara sintezo de la Spiritisma Doktrino. En ĝi enteniĝas la tuto de la doktrinaj principoj. Oni aldone konkludas, ke ĉiuj kunhelpaj verkoj, skrupulaj kaj konstruaj, efike ampleksigas ĝian komprenon.

Malgraŭ tio, inter tiom da aliaj, ni sugestas la jenajn verkojn aparte oportunajn por helpi la studadon kaj komprenon de la menciita baza verko:

- A CONSTITUIÇÃO DIVINA (*LA DIA KONSTITUCIO*) – Richard Simonetti. Gráfica São João Ltda.

- AS DORES DA ALMA (*LA DOLOROJ DE LA ANIMO*) – Francisco do Espírito Santo Neto/Hammed. Boa Nova Editora.

- AS LEIS MORAIS (*LA MORALAJ LEĜOJ*) – Rodolfo Calligaris. FEB.

- AS LEIS MORAIS DA VIDA (*LA MORALAJ LEĜOJ DE LA VIVO*) – Divaldo P. Franco/Joanna de Ângelis. LEAL.

- A PRESENÇA DE DEUS (*LA ĈEESTO DE DIO*) – Richard Simonetti. Gráfica São João Ltda.

- ESTUDE E VIVA (*STUDU KAJ VIVU*) – F. C. Xavier e Waldo Vieira/Emmanuel e André Luiz. FEB.

- LIÇÕES PARA FELICIDADE (*LECIONOJ POR LA FELIÇO*) – Divaldo P. Franco/Joanna de Ângelis. LEAL.

- *O LIVRO DOS ESPÍRITOS PARA A JUVENTUDE (LA LIBRO DE LA SPIRITOJ POR LA JUNULARO)* – Eliseu Rignonatti. Editora Pensamento.



- QUEM TEM MEDO DOS ESPÍRITOS? (*KIU TIMAS LA SPIRITOJN?*) – Richard Simonetti. Gráfica São João Ltda.
- RELIGIÃO DOS ESPÍRITOS (*RELIGIO DE LA SPIRITOJ*) – F. C. Xavier/Emmanuel. FEB.
- SINOPSE DE O LIVRO DOS ESPÍRITOS (*SINOPTIKO DE LA LIBRO DE LA SPIRITOJ*) – Aulus Araújo. Gráfica e Editora Espírita Paulo de Tarso.
- UM JEITO DE SER FELIZ (*IU MANIERO ESTI FELIÇA*) – Richard Simonetti. Gráfica São João Ltda.
- VIVER EM PLENITUDE (*VIVI EN PLENECO*) – Richard Simonetti. Gráfica São João Ltda.

### **III. Sugestoj pri Gvidilo por Studoj de La Libro de la Spiritoj**

“Vi scios la veron, kaj la vero vin liberigos”. Tiuj estas vortoj de Jesuo, kiu saĝe instigas nin al liberigo el la nescio, sed studo fariĝas necesa por ke tio okazu. Tamen studi ne estas nur legi aŭ aŭdi. *Ĝi koncernas mensan aktivecon, pripensadon, analizon kaj, super ĉio, asimiladon de tio, kio estas studata.* Por ĉi tiu celo estas necese, ke la studo estu honesta, sistema, metoda kaj persista. Grupe aŭ individue, la efika lernado dependas de la intereso, bonvoleco kaj diligenteco, per kiuj ĉiu pretas lerni la lecionojn. Interalie, la profita rezulto de la studo estas la renovigo de ideoj, la intima klarigado, la altigo de la sentoj, la harmoniigo kun la pli noblaj Spiritoj, la scipovo kiu igas nin plibone plenumi niajn taskojn, krom la ampleksigo de nia vortkapablo kaj ekzercado de la inteligento.

La studo de *La Libro de la Spiritoj* estigas konon pri ĉiuj fundamentaj aspektoj de la vivo. Ĝi signifas preparigon por profiti la oportunaĵojn starigitajn de Dio, tiel sur la Tero kiel en la spiritaĵ sferoj.

Tiamaniere, ni prezentas kelkajn sugestojn por la konsulto de tiu rimarkinda verko, heredaĵo de la homaro, celante eltiri pli efikan profiton de la tempo destinita al la lernado:

a) Komenci la studon per la “Enkonduko” farita de Allan Kardec kaj poste transiri al la “Antaŭparolo”. Ĉi tiuj du disertacioj antaŭantaj la demandojn estas riĉoplenaj de informoj kaj klarigoj liveritaj de la kodiginto kaj de la plejado da Spiritoj komisiitaj por la laboro de la Tria Revelacio. La skrupula studo de tiuj partoj kunportos al la lernanto novajn lumojn por lia komprenkapablo.

b) *La Libro de la Spiritoj* estis kodigita de eminenta pedagogo – Kardec – kaj tial ĝi jam estas didaktike organizita laŭ temoj, ĉapitroj kaj partoj. La demandoj estas disponigitaj laŭ numere progresiva perspektivo kiu sekvas de la simpla al la kompleksa, de la eksperimenta al la filozofia kaj de la konkreta al la abstrakta. Ĝi jam troviĝas do en la ideala ordo por la lernado; sufiĉas ĝin studi en la ordo laŭ kiu ĝi sin prezentas.

c) Estas esence grave legi la demandon kaj provi ĝin kompreni antaŭ ol serĉi la respondon. La demandoj estas treege inteligentaj kaj valoras la penon ilin bone kompreni. La respondoj donitaj de la Superaj Spiritoj estas saĝaj kaj elmontras altnivelan konon, indaj je akurata pripensado. Oni ne devas rapide legi. Trankvileco kaj pacienco ankaŭ helpas ĉe la lernado.

ĉ) Reveni al la antaŭaj demandoj, ĉiam kiam necese, por klare asimili tion kion oni studas en ĉiu momento. Konsulti vortaron, enciklopedion kaj akcesorajn verkojn, se bezonate, por ŝeti lumon al la komprenpovo.

d) La studo povas esti entreprenata individue aŭ en grupo. En la spiritismaj domoj la bone organizitaj studgrupoj havas la avantaĝon de la interŝanĝo de spertoj, de la pliigo de la vidkapablo, de la pliriĉigo de ideoj kaj eĉ de la frata interrilato. La ritmo de la studoj dependas de la tempodaŭro de la kunveno, de la nombro kaj ankaŭ de la kultura nivelo de la partoprenantoj. Oni do ne devas fiksi la nombron da studotaj demandoj en ĉiu renkontiĝo.

e) En la specifa kazo de la studo en grupo, la kunordigantoj devos fari uzon de dinamikaj teknikoj, kiuj vekas ĉies intereson, kiaj: libera panelo, integrita panelo, inter aliaj. La utiligo de variaj rimedoj igas la kunvenon motivita, malstreĉa kaj tre profita rilate lernadon.

f) Kelkaj demandoj de *La Libro de la Spiritoj*, post la respondo donita de la Bonfarantoj, prezentas komentariojn kaj notojn, tre oportunajn kaj klarigajn, prilaboritajn de Kardec kaj kiuj multe helpas por la lernado kaj kompreno de la teksto. Cetere, estas longaj paragrafoj kiel la demandoj 222, 257 kaj 455, kiuj postulos pli ol unu kunvenon por esti plene studataj. Estas profitodone eluzi multajn studhorojn por lerni ĉion kio elmontriĝas en la paragrafo. “Ne timu skurĝi nin per viaj demandoj”, asertis Sankta Ludoviko kaj Sankta Aŭgusteno (demando 495), kaj ni ripetas: ni ne timu nin skurĝi per la studo!... Ĉe la fino de la libro, oni kompletigas la lernadon per la brila “konkludo” de la kodiginto.

## **IV. Sugesto pri Gvidilo por Prelego**

Temo: La Leĝo de Progreso

CELOJ:

Ebligi al la publiko pripensi pri:

- a) la Leĝo de Progreso kiu prezidas ĉion;
- b) la diferenco inter la morala kaj intelekta progreso;
- c) la logiko kaj la justeco de reenkarneigo en la progreso de la popoloj;
- ĉ) la kontribuo de Spiritismo por la perfektigado de la Tero;
- d) la aspektoj de la civilizacio, kiu ekregos en la renovigita mondo de la granda morgaŭo.

## ENKONDUKO

Elstarigi, ke la Progreso estas Dia Leĝo kiu agas en la Tuta Kreitaĵaro.

## DISVOLVO.

Esplori la temon, prikomentante la liston de la sugestitaj studpunktoj.

## KONKLUDO

Konkludi, emfazante la kontribuon de Spiritismo por la progreso de la homaro kaj pritraktante la tiel revitan kaj definitivan akcepton de la Evangelio de Jesuo en la koron de la homoj.

## KONSULTFONTOJ

- *LA LIBRO DE LA SPIRITOJ* – Demandoj 776 al 802;
- *LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO* – Ĉapitro XVII, paragrafoj 3 kaj 4;
- *LA GENEZO* – Ĉapitro XVIII.

## RIMEDOJ

La dek studpunktoj de la malsupre sugestita gvidlisto povos esti prezentitaj al la publiko per la utiligado de rimedoj, kiaj:

- Nigra tabulo kaj kreto;
- Afiŝoj;
- Travideblaj bildoj por epidiaskopo;
- Komputil-projekciilo.

## GVIDILO – STUDTEMOJ POR LA DISVOLVO DE LA KOMENTOJ

- 1 – La infanaĝo de la homaro.
- 2 – La homo ĉiam progresas.
- 3 – Kiu estas la plej granda obstaklo al la morala progreso?
- 4 – La morala kaj la intelekta progreso.
- 5 – La progreso de la popoloj kaj la justeco de reenkarriĝo.
- 6 – Kiu estas la rolo de la geniaj homoj?
- 7 – Kio estus kompleta civilizacio?
- 8 – Ĉu Spiritismo kontribuos por la progreso de la homaro?
- 9 – Kiu estos la plej granda kontribuo de Spiritismo por la progreso?
- 10 – Kiu estas la kvalitoj de la civilizacio, por kies starigo Spiritismo decide kontribuos?

## SINTEZO KIUN ONI SUGESTAS POR LA KOMENTARIOJ

1 – “La natura homstadio estas la infanaĝo de la homaro kaj la deirpunkto de ĝia intelekta kaj morala progreso”. Same kiel la infano kreskas kaj disvolviĝas, sur la vojo al plenaĝeco, tiel same la homaro ĉiam iras direkte al la progreso por alveni al la intelekta kaj morala matureco. La barbaraj aŭ duonbarbaraj popoloj, vivantaj nur el ĉasado kaj fiŝkaptado, ene de profundaj arbaroj, en konstanta lukto kontraŭ la fortoj de la sovaĝa naturo kaj senfine militantaj kontraŭ la same evolunivelaj konkurantoj, bone reprezentas tiun stadion de la homara infanaĝo.

2 – La marŝo de la progreso estas kontinua kaj la homo ĉiam antaŭeniras direkte al perfektigiĝado. Li neniam malprogresas, “sed ne ĉiuj evoluas samtempe kaj sammaniere”. La socia kontakto permesas, ke tiuj pli progresintaj helpu la malfruintajn. Historio estas la nediskutebla registro de la lukto de la homoj kaj de la popoloj por ellasi infanaĝon kaj aliri al matureco.

3 – La plej granda obstaklo al la morala progreso estas fiero kaj egoismo, la du “vundoj de la homaro”. Estas efektive necesa la edukado de la popolamaso, ne la edukado kiu rezultigas nur instruitajn homojn, sed tiu de la sentoj. Pri tio Spiritismo povas multon proponi, ĉar ĝi rekomendegas la praktikon de la moralo de Kristo. Nur la Evangelio, laŭ spirito kaj vero, komprenita kaj travivita, alportas la sanktan kuracilon kapablan elradikigi tiun inter la homoj ĝeneraligitan “malsanon”.

4 – Rimarkoj de Kardec al la demando 785 de La Libro de la Spiritoj: “Estas du specoj de progreso, sin reciproke subtenantaj kaj tamen ne irantaj flanko ĉe flanko: la intelekta kaj la morala progreso. Ĉe la civilizitaj popoloj, la unua ricevas, dum ĉi tiu jarcento, ĉiajn dezirindajn favorhelpojn, kiuj ĝin levis ĝis neniam antaŭe konata ŝtupo. Multo mankas al la dua, por ke ĝi atingu saman nivelon; sed, malgraŭ tio, se oni komparas la hodiaŭajn sociajn morojn kun tiuj en la pasintaj jarcentoj, oni devus ja esti blindaj por ne konfesi ties progreson”. Nuntempe, la intelekta progreso daŭre antaŭsekvas la moralan progreson; eble pro tio atendas solvon grandega kvanto da sociaj problemoj.

5 – Ni vidis, ke la progreso ĉiam antaŭiĝas. La Dia Leĝo postulas, ke ĉio ŝanĝiĝu en ion pli bonan. En tiu kazo, la leĝo pri reenkarniĝo perfekte sin apogas sur senmakula justeco. La klopodoj realigitaj en ia vivo neniam perdiĝas, ĉar ili estos utiligataj en la sekvonta. Scio kaj lernado, konoj kaj virto penige konkeritaj, ĉio ĉi fariĝos morgaŭ bonŝancoj faciligantaj al ni la vivon. La homo estas heredinto de si mem. La spiritoj ĉiam antaŭiras de la punkto kie ili haltis, en senfina sinsekva agado, sub la protekto de perfekta justeco. La teorio de la unusola ekzistado kontraŭe implicas la ideon de partia kaj maljusta Dio, kiu ĉiumomente kreas novan animon, pli perfektan ol la aliaj, por asekuri la supreniran movon de la civilizacio.

6 – La geniaj homoj, kiuj aperas de tempo al tempo, alportas la mision akceli la progreson de la homaro. Ili estas spiritoj, kiuj per siaj klopodoj dum sennombraj reenkarniĝoj prezentas nivelon

de scio kaj evoluo superan al tiu mezgrada. Ili reenkarneĝas kun la tasko impulsi la progreson kaj, por la plenumo de tio, ili havas la helpon de la Superaj Spiritoj, ĉu pere de ties inspiro aŭ dumsonĝe. Iliaj sanktaj laboroj estas rekonitaj laŭlonge de la historio, en la paso de la eraoj, portante influon sur la kampoj de scienco, filozofio, politiko, artoj kaj religio.

7 – Respondo al la demando 793 de *La Libro de la Spiritoj* pri kompleta civilizacio: “Vi ĝin ekkonas per ĝia morala evolustadio. Vi opinias vin multe progresintaj, ĉar vi jam faris grandajn eltrovojn kaj mirindajn elpenaĵojn; ĉar vi loĝas kaj portas pli bonajn vestojn, ol la sovaĝuloj; sed vi rajtos diri, ke vi estas vere civilizitaj nur tiam, kiam vi forpuŝus de via socio la malvirtojn, kiuj ĝin malhonoras, kaj kiam vi vivos kiel fratoj, reciproke praktikantaj la kristanan kariton”.

8 – Spiritismo certe jam faras al la homa familio netakseblan helpon kaj en estonto, kiun ni esperas esti ne malproksima, ĝi signos novan eraon en la historio de la homaro. La progreso tamen ne havas interrompon. “La ideoj transformiĝas nur depende de la tempo”, sen grandaj skuoj.

9 – Ĝia ĉefa kontribuo estos la detruo de materialismo. Kiam la koncepto pri la senmorteco de la animo ne plu estos obstrukcita de la dubo kaj fariĝos ĝenerala kredo, la homoj forlasos siajn egoismajn kaj vantajn poziciojn kaj serĉos tion, kio en la nuna kaj estonta ekzistado reprezentas la veran superecon. Ĉi tiu transformiĝo okazos iom post iom, ĉar ĝi postulas la agadon de la tempo por efektiviĝi. La Spiritoj ne distrustempetos por vekti la nekredemulojn. “Ne, ne estos per mirindaĵoj, ke Dio kondukos la homojn; en Sia boneco, Li volas lasi al ili la meriton memkonvinkiĝi pere de la racio.”

10 – En ĝeneralaj trajtoj, la kvalitoj de la estonta civilizacio estos la jenaj:

- manko de monavideco, egoismo, fiero kaj antaŭjuĝoj;
- pli noblaj moralaj kutimoj;

- pli efektiva alesto de boneco, bonvolemo kaj grandanimeco;
- egaleco antaŭ la leĝoj;
- senpartia justeco al ĉiuj;
- solidareco de tiuj pli fortaj al la malpli fortaj;
- respekto al aliulaj opinioj;
- elradikigo de malsato kaj mizero;
- liberiĝo el la fantomo de la milito;
- laŭspirita sinteno rilate al sekso kaj al la sanktaj familiaj ligiloj.

## **V. Konkludo: La Graveco de la Studado de La Libro de La Spiritoj**

La firma staro de konstruaĵo kuŝas en la bazo. Sen solida bazo, muroj kaj tegmentoj ne eltenos la forton de la ventoj aŭ la potencon de la tempestoj. Tio pravigas la zorgon en la elekto de plej bonkvalitaj materialoj, kiuj konsistigos la fundamenton de la konstruaĵo.

Same rilate al Spiritisma Doktrino. La tuta kompleksa strukturo de scioj kiuj formas la doktrinan edifadon devas apogiĝi sur la fundamento de la Kodigado.

La konado de la Kardec-fundamento, frukto de la revelacio de noblaj estuloj, kiuj kunhelpis ĉe la klopodoj de la Kodiginto, estas garantio por la instruita, pripensema kaj konscia adepto, kapabla konstrue kaj ekvilibre agi en la Spiritisma Movado. Konklude, sen la influo de Kardec ĉe la studoj, favoranta ĝustan agadon en la vicoj de Spiritismo, ni falos en la erarajn de fanatikeco kaj superstiĉo, hipnotigite de ombraj fortoj, kiuj nuligos niajn plej bonajn intencojn.

Nur bonvolemo ne povos garantii la sukceson de la nescia aŭ sensperta aliĝinto. Estas necesa pli funda kono por prave agi.



La verkoj de Kardec, studataj kaj sentataj, estas la garantia deirpunkto por la spirita sukceso, kiun la mondo atendas de ni. Kaj la ĉeftrabo de la Kodigado estas *La Libro de la Spiritoj*. Verdire, kiu ĝin ne konas neniel povas opinii sin spiritisto.

Tiu eksterordinara libro, mirinda kaj profunda sintezo, verkita en maniero absolute didaktika, kunigas ĉiujn gvidajn principojn de la doktrino, starigante avangardan Sciencon, klarigopovan Filozofion kaj la Religion de Amo, kies aplikado rezultigos vere justan, altigitan kaj solidaran civilizacion.

Longa kaj kompleksa estas la vojo al la spiritisma kono, ĉar ĝi koncernas ĉiajn branĉojn de la homa sciado. La prudenta vojaĝanto devos ekiri ĝin per la studo de *La Libro de la Spiritoj*. Tial li havos dum la tuta vojiro gvidan lumturon, ŝirmantan gvidilon kontraŭ la malfacilaĵoj, kiu ĉiam povos radii al li klaran kaj mildan lumon, kapablan heligi la plej obskurajn angulojn de la irado survoje al la lumaj kulminoj de la Plena Scio.

Finfine ni memoru, ke la spiritismaj principoj, donitaj al la publiko en 1857, estas daŭre solidaj kiel antaŭ 150 jaroj. La dua duono de la jarcento XIX kaj XX laŭpase signis ŝanĝojn kaj konkerojn sur ĉiaj kampoj de Scienco. La scienca elvolvado ne ŝancelis la fundamentan principaron de Spiritismo tiel bone esprimitan en *La Libro de la Spiritoj*. Vere, ĉiuj konkeroj de la moderna Scienco ekzakte kongruas kun la spiritismaj doktrinecaj bazoj. Kardec daŭras ege aktuala, atendanta esti plibone studita kaj komprenita.

## **VI. Bibliografiaj Referencoj**

*A Gênese (La Genezo)* – Allan Kardec. Rio de Janeiro: FEB.

*Allan Kardec (Bibliografia Studo kaj Interpretprovvoj)* – Zêus Wantuil kaj Francisco Thiesen. Vol. II. Rio de Janeiro: FEB.

- Guia ao Expositor Espírita (Gvidilo por la Spiritista Preleganto)* Carlos Eduardo da Silva. São Paulo: FEESP.
- Obras Póstumas (Postmortaj Verkoj)* – Allan Kardec. Rio de Janeiro: FEB.
- O Evangelho Segundo o Espiritismo (La Evangelio laŭ Spiritismo)* – Allan Kardec. Rio de Janeiro: FEB.
- O Livros dos Espíritos (La Libro de la Spiritoj)* – Allan Kardec. Rio de Janeiro: FEB.

# La Libro de la Mediumoj: Gvidilo por Mediuma Sekura Praktikado.

*Belmiro Francisco Martins Paranhos  
Florentino Gomes de Brito  
José Ruben Gomes  
Luiz Bertolucci Júnior  
Nuciete Aparecida da Cruz  
Vânia Amâncio Abdulmassih*

Membroj de la skipo de la Departemento de  
Mediuma Orientado de AME – Uberlândia.

*“Sed restis du viroj en la tendaro; la nomo de unu estis Eldad, kaj la nomo de la dua estis Medad; **kaj suriris sur ilin la spirito – ĉar ili estis inter la enskribitaj, sed ne eliris al la tabernaklo – kaj ili ekprofitis en la tendaro.** Tiam kuris junulo kaj raportis al Moseo, kaj diris: Eldad kaj Medad profetas en la tendaro. Kaj respondis Josuo, filo de Nun, kaj servanto de Moseo detempe de lia juneco, kaj diris: Mia sinjoro Moseo, malpermesu al ili. “Sed Moseo, diris al li: **Ĉu vi ĵaluzas pri mi? Estus dezirinde, ke la tuta popolo de la Eternulo fariĝu profetoj, se la Eternulo metus Sian spiriton sur ilin.**”<sup>5</sup> Malnova Testamento, Nombroj, 11:26 al 29.*

La alproksimiĝo de la spiritoj al la homoj okazis, en ĉiu tempo, pro la deziro, kiun la “mortintoj” ĉiam havis helpi nin, donante al ni konsilojn kaj orientadon, al tio nin altirante pere de mediumoj, kiuj en aliaj tempoj kaj lokoj estis nomitaj laŭ malsamaj nomoj: profetoj, orakoloj, antaŭdiristinoj, kuracemuloj, magoj, inter aliaj.

*La mediumeco estas kapablo tiel malnova, kiel la mondo. La profetoj estis mediumoj; la misteroj en Eleŭziso baziĝis sur la*

---

<sup>5</sup> transkribaĵo el la Biblio laŭ la esperanta traduko de Zamenhof.

*mediumeco; la Ĥaldeoj, la Asirianoj havis mediumojn; Sokrato estis direktata de Spirito, kiu inspiradis al li la mirindajn principojn de lia filozofio; li aŭdadis ties voĉon. (La Libro de la Mediumoj, ĉap. XXXI, XI, FEB)*

Kiam ni do, la reenkarniĝintoj, ilin perceptas per pli granda sentebleco kaj facileco, ni estas invitataj agi kiel perantoj inter nia materia mondo kaj la spirita mondo, kiu kompare kun la nia estas multe pli vasta, plena de nuancoj, detaloj kaj vivo, vibranta, pli dinamika ol nia mirinda, sed limigita, surtera mondo. Ni estas benataj de la sublima ŝanco de evoluado: esti **mediumoj**.

*– Mi sentas strangajn sensacojn... Mi vidas nebulajn figurojn, aŭdas anonimajn voĉojn, ekhavas fortajn antaŭsentojn. Kio okazas ĉe mi? Plurajn fojojn mi estas pelita diri ion, kion mi ne deziras diri, elparoli frazojn, kiuj naskiĝas el ideoj kaj pensoj kiuj ne koncernas min. Tiuj ne estas miaj vortoj! Kion mi devas fari? Kial tio okazas al mi? Ĉu mi estas ensorĉita? Kie mi serĉu helpon? Kaj kian helpon mi serĉu: ĉu medicinan, psikologian, spiritan?*

Tio estas kelkaj demandoj kiuj ĝenas tiun, al kiu prezentiĝas la valora kapablo esti mediumo: agi kiel peranto inter la Spiritoj (konataj de la spiritistoj kiel la elkarniĝintaj, ĉar ili jam ne posedas la fizikan korpon) kaj la viroj aŭ virinoj ankoraŭ katenitaj al la korpo.

Ne estas facile trakti la novan situacion en nia vivo. La intelekta, religia kaj morala instruiĝo, kiun ni havis ekde la infaneco, multe kontribuos por nia decido. Estas evidente, ke ni povos esti mediumoj eĉ ne estante religiemuloj, aŭ spiritistoj, ekzemple. Multaj kontribuoj sur la kampoj scienca, filozofia, eduka, ekonomia, politika kaj religia originas el spiritaj intervenoj, el sugestoj de la mortintoj, kiuj revenas interesiĝintaj je nia progreso aŭ ruino (kiam ili estas kontraŭuloj aŭ malamikoj), eĉ kiam ni ne rimarkas aŭ neas la strangajn sugestojn al ni venintajn.

Channing konfirmas, ke *ĉiuj homoj estas mediumoj, ĉiu havas apud si iun Spiriton, kiu lin gvidas al bono, kiam li scias tiun*

*aŭskulti. Nu, ĉu kelkaj homoj komunikiĝas senpere kun tiu Spirito per aparta mediumeco, ĉu aliaj lin aŭdas nur per la voĉo de la koro kaj de la intelekto, tio ne estas grava: tio estas iu familiara Spirito, kiu ilin konsilas. Nomu lin spirito, prudento, inteligento, ĝi estas tamen ia voĉo, kiu respondas al via animo kaj diras al vi bonajn parolojn; okazas nur, ke vi ilin ne ĉiam komprenas. (LM, ĉap. XXXI, VIII)*

Se ni elektos antaŭeniri, per studado kaj praktikado de la *Mediumeco kun Jesuo*, al ni eblos trovi en Spiritismo la necesajn elementojn por ke la mediumeco firmstare kaj feliĉe disvolviĝu kaj edukiĝu: *La Libro de la Mediumoj* aŭ “Gvidilo de la Mediumoj kaj de la Elvokantoj”, taŭgas kiel lernolibro, iu direktilo por ke la sensivulo aŭ mediumo povu koni sin kaj la aliajn, tiel la homojn al li proksimajn kiel la al li rondirantajn kaj influantajn spiritajn estulojn.

## **I. Historio de la Verko**

*La Libro de la Mediumoj* estis publikigata en la **15<sup>a</sup> de januaro 1861**, en la urbo Parizo, Francujo. Eŭropo tiam travivis historian periodon de intensa ekonomia kaj populacia disvolvo, kun forta geopolitika ekspansio, direkte al tio, kion pli poste oni konsideros kiel la eŭropan imperialismon, tio estas, Francujo plietendos sian militistan kaj politikan povon, same ankaŭ la ekonomian, al pluraj regionoj de la mondo, fondante kaj tenante koloniojn sub sia submeto. La eŭropa industriiĝo estis en plena aktiveco kaj Francujo, kune kun aliaj potencaj nacioj, nome Anglujo, Svisujo, Italujo, Hispanujo, regis la proceson de la granda industria revolucio, kiu difinis en la jardekoj proksimaj al 1900 novan politikan, militistan kaj ekonomian ekspansion de la eŭropaj landoj direktitan al Azio kaj Afriko. La eŭropa progreso stimulis la disvastiĝon de la artoj kaj de diversaj kulturaj sektoroj, akompanata de forta disvolviĝo de la presarto kaj literaturo, faciligante la dissemadon de novaj ideoj.

Parizo, ĉefurbo de Francujo, ankoraŭ estis altircentro de la mondo. Intelektuloj grandnombre tien sin direktis kun la celo disvolvi siajn studojn, teoriojn, filozofiojn, edukajn projektojn, krom akiri interŝanĝe la jam atingitajn konkerojn, kiuj poste estos disetentidaj al iliaj hejmlandoj.

Ankaŭ tie, en la unua duono de la XIXa jarcento, oftege okazis la fenomeno de la turniĝantaj tabuloj. Multfrekventitaj kunvenoj multobliĝis en la festaj parizaj salonoj, kie kuriozemuloj kaj seriozaj personoj, la unuaj en pli granda nombro, kunsidis por vidi la turniĝantaj tabulojn, kiuj piedbatis kaj cirkuladis en la ĉambro, respondantajn per frapoj kaj aliaj movoj al la damandoj, ofte frivolaj. Tiu praktikado jam estis sufiĉe konata de la eŭropanoj kaj de aliaj pli antikvaj popoloj, laŭ la rimarkoj de Magalhães (1996), kiu rehavigis parton de la verko de Edmundo G. Blanco: *Ĉe la ago komunikiĝi kun la mortintoj oni utiligis ĉenojn, cirklojn (...)* laŭ konfirmas Aristotelo, Plutarko, Plinio, Filostrato..., inter aliaj studemuloj el la antikveco cititaj de la aŭtoro.

Proksimume al la jaro 1850, la kunvenoj ĉirkaŭ la turniĝantaj tabloj ekvekis la intereson de viroj kaj virinoj, kiuj vidis ĉe tiuj fenomenoj la revelacion de nova mondo, ampleksa, ebliganta multajn studŝancojn, la *mondo de la Spiritoj*. Verdire la tablo estis simpla ilo por la manifestiĝo de la *mortintoj*, la elkarniĝintoj, kiuj, utiligante la fluidaĵojn de la ĉeestantaj medioj, sukcesis movi la tablojn kaj respondi al kelkaj pli simplaj demandoj.

Profesoro Hyppolyte-Léon Denizard Rivail, sperta pri la arto eduki la homajn karakterojn, havanta dudek du edukajn verkojn publikigitajn en Francujo, tiam aĝanta 50 jarojn, ĉirkaŭ la jaro 1854 aŭdis prikomentojn pri tiuj fenomenoj kaj nur partoprenis en kunveno por koni la aferon post invito farita de sia amiko, S-ro Fortier, studemulo pri magnetismo, temo ankaŭ altiranta la intereson de Rivail. Spertiĝinta pri la eduka kaj scienca kampo kaj post kiam li ĉeestis kelkajn el la prezentoj de la turniĝantaj tabloj, S-ro Rivail komprenis, ke tiuj simplaj okazaĵoj indikis novan kampon de esploro, kiu certe elmontros konsolan realecon: la

morto ne ekzistas, la Spiritoj daŭre vivas post la bankroto de la fizika korpo kaj povas reveni por komunikiĝi kun la homoj.

Post la publikigo de *La Libro de la Spiritoj*, la restado en Parizo faciligis tion, ke S-ro Rivail - Kardec, post la publikigado de *La Libro de la Spiritoj* (1857) - povis realigi sian laboron kiel kodiganto, organizanto de la Doktrino de la Spiritoj. Parizo ankoraŭ funkciis kiel la centro de la mondo, ĉar tien kuniĝis la grandaj kulturaj kaj teknologiaj iniciativoj, disponantaj inkluzive pri bona strukturo de presarto, ebliganta la eldonadon de libroj kaj ĵurnaloj por la pli rapida disvastigo de intelektaj kontribuoj, de novaj filozofiaj kaj sciencaj doktrinoj. En tiu dua duono de la deka-naŭa jarcento, la Lumo-Urbo fariĝis la naskiĝloko de Spiritismo.

Ekde la publikigo de *La Libro de la Spiritoj*, kiu vaste kuniĝis tra la mondo, Allan Kardec konstante ricevis skribpetojn por ke li orientu la grupojn dezirantajn praktiki Spiritismon per kunvenoj destinitaj al komunikiĝo kaj manifestiĝo de la Spiritoj.

En 1858 Allan Kardec eldonis la libron *Praktikaj Instruoj pri la Spiritismaj Manifestiĝoj*, kiu disvolvas la duan parton de *La Libro de la Spiritoj* kaj ankaŭ pritraktas la organizadon de la unuaj mediumaj grupoj sub spiritisma influo. Tiu verko ricevis tre bonan akcepton kaj la ekzempleroj disponigitaj en librovendejoj rapide elĉerpiĝis. Ĝi estis la bazo sur kiu Allan Kardec kaj la Spiritoj preparis pli ampleksan kaj kompletan verkon por klarigi ĉiujn malfacilaĵojn proprajn al la mediuma agado: *La Libro de la Mediumoj*. Allan Kardec per si mem avertas, ke la nova verko kunigas la informojn de longa spertado kaj de konsciencaj studoj kaj ke per ĝi Spiritismo estu vidata laŭ ĝia serioza karaktero kaj ne kiel objekto de frivola okupiĝo kaj amuziĝo.

Ni konsideru aldone, ke ĉe la fondiĝo de la *Pariza Societo de Spiritismaj Studoj*, sub la gvidado de Allan Kardec, mesaĝoj ricevitaj de mediumoj tra la tuta mondo estis pli ofte sendataj por ke la majstro ilin laŭvole taksu kaj profitu. Krom tio, vizitantoj el malproksimaj lokoj, sindonantaj al la mediumaj fenomenoj kaj dezirantaj koni la Spiritisman Doktrinon, pli intense vizitis la

societon, precipe post la jaro 1857. Princoj, baronoj, politikistoj, altrangaj ŝtataj oficistoj, entreprenistoj kaj komercistoj el foraj regionoj, militistaj komandantoj, same kiel simplanimaj kaj honestaj homoj vizitadis la kabineton de Allan Kardec celante ekkompreni la novan doktrinon, la Bonan Novaĵon de la Spiritoj.

Kunuloj de Allan Kardec el la PSSS raportis, ke ĉe eniro en la studĉambron de la majstro ili ĉiam renkontis grandan nombron da mesaĝoj senditaj el la tuta mondo, kiujn Kardec taksos kaj utiligos ĉe la skribado de nova verko.

Konsultante la bazajn verkojn<sup>6</sup>, ni konstatas, ke la mesaĝoj venis el malsamaj regionoj de Francujo: Havro, Mulhaŭzo, Puatiero, Sens, Liono, Bordoza, Konstantino, Marmande kaj el pli malproksimaj lokoj kiel: Ĝenevo, Bruselo, Krakovo, Argel, Karlsruhe, Sankta-Peterburgo kaj urboj de Italujo, kaj aliaj.

La franca majstro havis je sia dispono grandan amason da informoj kaj da spiritaj mesaĝoj, komentojn pri malsamaj praktikoj de la plej diversaj mediumaj laborgrupoj dissemitaj tra la mondo.

Estas atentinde, ke tiel granda estis la ĝenerala akcepto de *La Libro de la Spiritoj* kaj de *La libro de la Mediumoj*, ke Allan Kardec havis motivojn por fari vojaĝojn tra Francujo inter la jaroj 1861 kaj 1862, kolektante notojn kaj akompanante la progreson de Spiritismo, ĉiam je sia propra kosto.

La vojaĝo en 1862 estis la plej longa, kiam Kardec vizitis pli ol dudek francajn urbojn kaj ĉeestis pli ol kvindek kunsidojn. Tutcerte, multaj estis la profitodonaj observoj por la ellaboro de la spiritismaj verkoj publikigitaj en la postsekvaj jaroj. La raporto pri la vojaĝo naskigis la verkon *Spiritisma vojaĝo* en 1862, laŭ tio kion informas André Moreil<sup>7</sup>: *Tiu granda vojaĝo estis poste priskribita en speciala verko, kiu fariĝis nemalhavebla helpilo al*

---

<sup>6</sup> La Libro de la Spiritoj – 1857; La Libro de la Mediumoj – 1861; La Evangelio laŭ Spiritismo – 1864; La Ĉielo kaj la Infero – 1865; La Genezo, publikigita en 1868.



*la spiritismaj grupoj, tiel koncerne al la Doktrino, kiel respektu al la organizado kaj administrado de la spiritistaj societoj.*

Per *La Libro de la Mediumoj* ni sciiĝas, ke esti mediumo signifas havi al nia dispono la oportuno por spirita edukiĝo, kaj laŭ tio, kion atentigas la verko mem ekde sia enkonduko, estas la Spiritoj kiuj alportas la *specialan instruon rilatan al la teorio pri ĉiaj spiritaj manifestiĝoj, pri la komunikrimedoj kun la nevidebla mondo, pri la disvolvado de mediumeco, pri la malfacilaĵoj kaj embarasoj troveblaj ĉe la praktikado de Spiritismo; tiu libro estas do la daŭrigo de La Libro de la Spiritoj.*

Tiu komenca enkondukita teksto prezentita sur la kovrilpaĝo de *La Libro de la Mediumoj* sufiĉe nin ekpensis. Ni montru laŭpaŝe.

La unua paŝo: nepre necese studi *La Libron de la Mediumoj*, por ke ni konu la Spiritisman Doktrinon, ĉar kontraŭe ni ne povos kompreni la temojn pri mediumeco.

Alia observo: estis ja la Spiritoj, kiuj, pere de diversnaturaj mediumaj manifestiĝoj, diktis la enhavon esprimitan en la libro kiu destiniĝis al la mediumoj. Krom aliaj specoj de mediumeco, estis uzataj la skriba, la psikografia, la parola, nuntempe konata kiel psikofonia, en la ricevado de la spiritaj komunikaĵoj, pri kio indas memori, ke la utiligataj metodoj konsistis el spontaneaj komunikiĝoj kaj elvokoj.

*La Libro de la Mediumoj* estis organizita laŭ du partoj. En la Unua Parto, la Spiritoj kaj Allan Kardec tekstas profundan filozofian konsideradon, por ke ni povu konfirmi per studado nian spiritistan konvinkon. Estus senutile daŭrigi se ni ankoraŭ ne rekonas la ekziston de la Spiritoj kaj la eblecon je komunikiĝo inter ni kaj ili, eĉ se ni, kiel spiritualistoj, kredos je la vivo post la morto.

Tiu *Unua Parto* estas dividita en kvar partojn:

---

<sup>7</sup> Vidu la antaŭparolon de Wallace Leal V. Rodrigues al la verko Spiritisma Vojaĝo en 1862, publikigita de Casa Editora o Clarim, 2<sup>a</sup> eld. Matão/SP, 1968.

Ĉapitro I – *Ĉu ekzistas Spiritoj?* – La Spiritoj kaj Allan Kardec decidis komenci *La Libron de la Mediumoj* per serioza kaj oportuna demando, ĉar tiu kiu praktikos mediumecon bezonas esti konvinkita pri la ekzisto de la spiritaj estuloj, pri tiuj kiuj estos la veraj aŭtoroj de la mesaĝoj, pri la komunikiĝoj kaj pri la fenomenoj estiĝontaj pere de la mediumoj. Koncernas al ĉiu el ni kiuj serĉas mediumajn praktikojn demandi al ni mem: ĉu ni kredas je la ekzisto de la Spiritoj? Ĉu ni havas certecon, konvinkon pri tio? Se jes, ni daŭrigu; se ne, preferinde estas iom pli atendi nian envolvon en tiel seriozajn spertojn, kiaj la mediumaj.

Kardec proponas tri demandojn: “Ĉu vi kredas je Dio? Ĉu vi kredas, ke vi havas animon? Ĉu vi kredas je la postmorta ekzisto de la animo?” kaj, laŭ propono de la kodiginto, se la respondo estos simple: “mi ne scias; mi deziras, ke tiel estu, sed pri tio mi ne havas certecon”, ni bezonas iom pli maturiĝi antaŭ ol efektive kaj rekte involvi nin en laborojn kiuj postulos de ni grandan penon...

En la Ĉapitro II – *Tio Mirakleca kaj Tio Supernatura* – , li prezentas riĉan argumentadon de la Spiritoj pri la diferenco inter Spiritismo, kiu apogas sin sur faktoj kaj sur ilia racia klarigado, kaj tio mirakleca kaj supernatura, kio ne estus favorata de la Leĝo de la Naturo. Spiritismo ne proponas ian ajn renverson de la natura leĝo; male, ĝi montras, ke la Spiritoj estas agantoj, elementoj kiuj aktivas en la naturo, kiuj partoprenas en la naturaj fenomenoj, kaj kiuj deziras interilati, komunikiĝi kun la homoj por ke ni plibone komprenu kial ni estas en ĉi tiu mondo kaj kio atendas nin en la estonto.

Siavice, en la Ĉapitro III – *Pri la Metodo* – , la Spiritoj avertas nin pri la graveco de la metoda studo, por ke ni povu ekposedi kaj kompreni la novajn ideojn, kaj same orientas nin pri la maniero kunrilati kun malsamaj personoj kaj malsamaj Spiritoj, koncerne la religiajn elektojn: materialistoj kaj spiritistoj – kaj en ĉi tiu punkto Allan Kardec evidentigas kvar klasojn de spiritistoj pri kiuj valorus la penon pripensi: *tiuj tro ardaj, tiuj eksperimentantaj, tiuj*

*neperfektaj kaj la kristanaj aŭ veraj spiritistoj.* Ni ankoraŭ trovas en ĉi tiu ĉapitro oportunan proponon al tiuj kiuj deziras koni Spiritismon. Laŭ la propono de la Spiritoj/Kardec ni devas komenci per la verko *Kio Estas Spiritismo*, sekve per *La Libro de la Spiritoj*, poste per *La Libroj de la Mediumoj* kaj la *Spiritisma Revuo* kaj plu legadi, lernante. Tiam (1861) *La Evangelio laŭ Spiritismo* ankoraŭ ne estis publikigita, kio nur okazis en la jaro 1864, nemalhavebla verko por la daŭrigo de la studoj proponitaj de Kardec, celante nian pli profundan konon pri la instruoj de Jesuo.

*La Unua Parto de La Libro de la Mediumoj* finiĝas per la Ĉapitro IV – *Pri la Sistemoj* –, kiu pridiskutas la malsimilajn manierojn laŭ kiuj Spiritismo estis rigardata de la personoj en tiu epoko. La miopa vidado rezultis preskaŭ ĉiam de la nescio, de manko de studo de la bazaj principoj de la Spiritisma Doktrino.

En la *Dua Parto de La Libro de la Mediumoj* oni kalkulas je 32 ĉapitroj kiuj tre didaktike temas pri la manifestiĝoj de la Spiritoj. En la ĉapitro I oni trovas vastan diskuton pri la agado de la Spiritoj sur la materion, tio estas, la interago inter la du gravaj elementoj de la naturo estas komentata kaj rememorata, ĉar se oni atentos per ioma akuteco ni rimarkos, ke la spiritoj estas ĉiam influantaj nia vivon, ĉu laŭ la intelektaj kapabloj, ĉu laŭ fizikaj manifestiĝoj (movo de objektoj, ekzemple).

Kompreni la diferencojn inter la intelektaj kaj fizikaj manifestiĝoj estigataj de la Spiritoj estas io esenca por nia mediuma disvolvado. Tablomovaj fenomenoj, transporto de objektoj kaj personoj, bruoj, aperiaĵoj, Spiritoj globformaj (prilegu por kompreni) estas kelkaj el la temoj pritraktataj en la unuaj ĉapitroj de la *Dua Parto*.

Mediumoj, kiuj emanigas fluidaĵojn aŭ tiuj kiuj partoprenas en la konataj mediumaj seancoj por kuracado devas plentente studi la ĉapitron VIII – *Pri la Laborejo de la Nevidebla Mondo* –, kie demandoj rilataj al magnetaj kaj kuracaj mansurmetaj agoj estas traktataj.

Unu el la plej grandaj defioj de la mediumaj praktikoj estas saĝe analizi la komunikaĵojn ricevatajn de la diverstipaj Spiritoj. En la ĉapitro X ni lernas el la propraj Spiritoj distingi la maldelikatajn kaj la frivolajn komunikaĵojn, same kiel tiujn venintajn de trompemaj Spiritoj disde la seriozaj kaj instruaj komunikaĵoj, kiuj estas donitaj de la bonkoraj Spiritoj.

*Kian mediumecon ni havas? En kiu tipo de mediumo ni speguliĝas? Ĉu psikografiaj mediumoj? Ĉu manifestantoj de fizikaj efikoj, vidivmediumoj, kuracantoj, pneŭmatografoj (kiuj favoras la rektan skribadon de la Spiritoj sur paperfolio)?* Por klarigi tiajn demandojn ni devos studi de la ĉapitro XII-a ĝis la XVII-a. Ĉi tiu lasta aldono temas pri la perdo kaj interrompo de la mediumeco, kio eblas okazi.

Al tiuj kiuj, ĉe la mediuma praktiko, timas la laboron kun la Spiritoj, konsilindas atente studi la Ĉapitron XVIII – *Pri la Malbonaĵoj kaj Danĝeroj de la Mediumeco* –, kaj ili povos konkludi, ke, kiam serioze konsiderata, mediumeco signifas harmonion kaj sekurecon en nia vivo.

Rilate la rolon de la mediumo ĉe la komunikiĝoj, lian personan influon kaj la influon de la medio (la spiritista grupo, kiun la mediumo vizitadas, ekzemple), tio estas detale analizata en tri ekskluzivaj ĉapitroj.

*La obsedo* estas detaligita en la Ĉapitro XXIII; krome estas komentitaj la rimedoj por ĝin kontraŭbatali, kion ni nomas *malobsedo*, kaj en ĉi tiu parto de *La Libro de la Mediumoj*, elmontriĝas, kiel grava estas kunveno por malobsedado kaj kion oni atendas de ni ĉiuj, la mediumoj: bonvolemon, amon, studon kaj intiman transformiĝon, kio garantias bonan asistadon al la suferantaj spiritoj.

En la sekvanta ĉapitro, Kardec preparas nin por la identigo de la Spiritoj, por ke ni povu apartigi la bonajn disde la malbonaj kaj konvene trakti ĉiujn mortintojn kiuj ĉeestas dum la kunvenoj,

celante precipe nian lernadon. Klare estas, ke ĉe la akceptado de la malharmoniaj Spiritoj, ni lernos vivi laŭ la aserto: *For de la Karito ne estas Savo*. Tamen ni perceptas, ke la plej granda karitato devenas de la Spiritoj kiuj, komuniĝante kun ni, ĉiam avertas nin pri la estonto: - *Pliboniĝu aŭ vi morgaŭ suferos same kiel hodiaŭ mi suferas!*

Multaj el tiuj iniciĝantaj en la interŝanĝoj kun la Spirita Mondo deziras elvoki difinitajn Spiritojn, dum aliaj preferas atendi la spontaneajn komuniĝojn, tio estas, atendi la komunikaĵojn de tiuj kiuj, laŭ elekto de la Spirita Mondo, estas senditaj al nia kunveno. En la Ĉapitro XXV – Pri la Elvokoj –, ni lernos pri la utileco de la apartaj elvokoj kaj de la spontaneaj komuniĝoj, pri kio ni povos konstati ke, sen la kalkulo je solida intelekta kapableco, je multaj jaroj da studado en la plej malsamaj sektoroj de la homa scio, je konsista morala instruiĝo kaj, sen nia persona pliboniĝo kaj disciplinado, kaj ankaŭ sen la vaste akirita sperto en la rilatoj kun la Spiritoj, la plej bona paŝo de ni farota estas adopti la praktikon de la spontaneaj manifestiĝoj, kontrolataj de la bonfaraj Spiritoj kiuj gvidas el la Pli Alta Mondo nian mediuman disvolviĝon.

Se oni deziras paroli kun la Spiritoj, la Ĉapitro XXVI proponas riĉan repertuaron de demandoj, kiujn oni povas fari, tio estas, kiujn oni povas tuŝi ĉe la dialogo kun la elkarniĝintoj. Jen kelkaj ekzemple: ĉu estas konsilinde aludi al personaj kaj tutapartaj aferoj? Kiajn demandojn la Superaj Spiritoj volonte respondas? Kaj la trompemaj kaj mistifikantaj Spiritoj? Ĉu ili respondas al ajna demando al ili farita?

Ni fine, surbaze de la Ĉapitro XXIX, rezonu pri la graveco de la mediumaj kunvenoj kaj de la spiritismaj societoj. Neniu el ni, la spiritistaj laborantoj kaj direktantoj, povos ne mediti pri la valoraj informoj de tiu ĉapitro. En la Ĉapitro XXX, Allan Kardec, multe spertinta en la Pariza Societo de Spiritismaj studoj, kune kun la Spiritoj nin instruas kiel starigi spiritisman studgrupon, iun societon vere spiritisman, kiu eĉ proponu al ni regularon por pli

efika organizado kaj disciplinigo de niaj laboroj: *La regularo de la Pariza Societo de Spiritismaj Studoj*.

Finkonkludas *La Libron de la Mediumoj* la ĉapitroj kiuj temas pri la *Disertacioj de Spiritoj* kaj pri la *Spiritisma Glosaro*. Konsolajn kaj instruplenajn mesaĝojn ni povos legi, krom konatiĝi kun sufiĉa nombro da apokrifaj mesaĝoj (trompaj) celante niajn studojn, por ke ni ne fariĝu kaptaĵo de mistifikemaj Spiritoj, kiuj uzas respektindajn nomojn (Jesuo, Maria el Nazareto, Bezerra de Menezes, kaj aliaj), kondukante nin al la ridinda kredi je ajna aperanta Spirito.

*Agenera*, ĉu vi scias pri kio temas? Kio estas la diferenco inter mediumeco kaj medianimeco? Ni bezonas studi la Ĉapitron XXXII – Spiritisma Glosaro –, ĉu vi konsentas?

## **II. Helpverkoj por la Studado de La Libro de la Mediumoj**

### **Francisco Cândido Xavier / Emmanuel**

- 1) “Seara dos Médiuns” (*Kultivejo de la Mediumoj*) – entute legenda – FEB.
- 2) “Mediunidade e Sintonia” (*Mediumeco kaj Identeco de Sentoj*) – entute legenda – CEU.
- 3) “Opinião Espírita” (*Spiritisma Vidpunkto*) – Lecionoj 15, 17, 20, 22, 31, 41, 45, 47 – CEC.
- 4) “O Espírito da Verdade” (*La Spirito de Vero*) Diversaj Spiritoj – Lecionoj 5 kaj 67 - FEB.
- 5) “Religião dos Espíritos” (*Religio de la Spiritoj*) – Lecionoj 16 kaj 58 – FEB.
- 6) “No Portal da Luz” (*Ĉe la Portalo de Lumo*) – Lecionoj 11 kaj 12 – CEC.
- 7) “Roteiro” (*Gvidilo*) – Ĉapitroj 26/27) – FEB.

8) “O Consolador” (*La Konsolanto*) – FEB.

### **Francisco Cândido Xavier / André Luiz**

- 1) “Nos Domínios da Mediunidade” (*Sur la Kampo de la Mediumeco*) – FEB.
- 2) “Mecanismos da Mediunidade” (*Mekanismoj de la Mediumeco*) – FEB.
- 3) “Desobsessão” (*Malobsedo*) – FEB.
- 4) “Missionários da Luz” (*Missiistoj de la Lumo*) – FEB.

### **Carlos A. Baccelli / Diversaj Spiritoj – Odilon Fernandes**

- 1) “ABC da Mediunidade” (*ABC de la Mediumeco*) – DIDIER.
- 2) “Mediunidade e Obsessão” (*Mediumeco kaj Obsedo*) – DIDIER.
- 3) “Mediunidade na Mocidade” (*Mediumeco ĉe la Junuleco*) – DIDIER.
- 4) “Ser Médiun” (*Esti Mediumo*) – DIDIER.
- 5) “Somos Todos Médiuns” (*Ni Ĉiuj estas Mediumoj*) – DIDIER.
- 6) “Mediunidade: Perguntas e Respostas” (*Mediumeco: Demandoj kaj Respondoj*) – DIDIER.
- 7) “Conversando com os Médiuns” (*Parolante kun la Mediumoj*) – LEEPP.

### **Caibar Schutel**

- 1) “Médiuns e Mediunidade” (*Mediumoj kaj Mediumeco*) – Casa Editora o Clarim.

### **Divaldo Pereira Franco**

- 1) “Diretrizes de Segurança” (kaj Raul Teixeira) (*Gvidlinioj por Protekto*) – Editora Fráter.
- 2) “Estudos Espíritas” (*Spiritismaj Sudoj*) – Spirito Joanna de Ângelis - FEB.

- 3) “Intercâmbio Mediúnico” (*Mediuma Interŝanĝo*) – Spirito João Cleofas – LEAL.
- 4) “Médiuns e Mediunidade” (*Mediumoj kaj Mediumeco*) – Spirito Vianna de Carvalho – Editora Arte e Cultura / KEAL.

### **Elizeu Rigonatti**

- 1) “A Mediunidade Sem Lágrimas” (*Mediumeco Sen Larmoj*) – Editora Pensamento.

### **Hermínio C. Miranda**

- 1) “Que é o Fenômeno Mediúnico?” (*Kio estas la Mediuma Fenomeno*) – Editora Correio Franterno.
- 2) “Diálogos com as Sombras” (*Dialogoj kun la Ombroj*) – FEB.
- 3) “Histórias que os Espíritos Contaram” (*Historioj kiujn la Spiritoj rakontis*) - LEAL.

### **Martins Peralva**

- 1) “Estudando a Mediunidade” (*Studante la Mediumecon*) – FEB.
- 2) “Mediunidade e Evolução” (*Mediumeco kaj Evoluo*) – FEB.



### **III. Sugesto por Studgvidilo de La Libro de la Mediumoj**

La ago studi devenas de la neceso de ĉiu homo en la proceso de evoluado. Kun la paso de la tempo tio ŝanĝiĝas al ĉiutaga sinteno kun origino en la interna kontenteco. Ni do atingos plezurvekan agadon kaj subtenon al nia individueco.

Laŭ la brazilaj vivkondiĉoj, la studeblo estis ĉiam limigita al parto de la loĝantaro, precipe la aliro al la studoj kaj la ŝato je legado. Sed, laŭ tio, kion instruas la MAJSTRO de la MAJSTROJ, ĉe Johano 8,32: "... kaj vi scios la veron, kaj la vero liberigos vin", ni komprenas, ke la sciado pri la vero estas proceso propra al la SPIRITO.

Ĉe tio ni konstatas la bezonon de strategioj por stimuli kaj efektivigi la aliron al la spiritismaj verkoj, kaj speciale al la *bazaj verkoj*, kiuj faciligas la konon, la komprenon kaj, konsekvence, ilian plenan validon por pli bona sperto en la vivo.

En *La Libro de la Mediumoj*, en la Unua Parto – Ĉapitro III: *Pri la Metodo*, ĉe la paragrafo 31, ni trovas la jenan konsilon: *Mi do parolas el sperto kaj ankaŭ el sperto mi diras, ke la plej bona metodo por instruado de Spiritismo estas turni sin al la prudento antaŭ ol al la okuloj. Ĝi estas la metodo, kiun mi sekvas en miaj lecionoj kaj pri kiu mi devas nur gratuli min.* Ni kredas, ke la vekiĝo de la konscienco estas stimulo por la homa pliboniĝo en ties evolua vojirado. Tial ni venas al la konkludo, ke studi estas io esenca en ĉiu reenkarriĝa ebleco de la SPIRITO.

Kiel individue studi?

Nia celo neniel estas dikti ian recepton, sed ebligi al vi, leganto kaj studanto de la Spiritisma Doktrino, kelkajn konsilojn, kiuj, sincere taksataj, povu esti aplikataj.

Ĉe la decido elekti kiel celon fariĝi studanto de Spiritismo kaj havante kiel principon klaran kaj koncizan serĉon de konoj, konsekvence de konscienciga proceso (estigita el la neceso praktiki la kristanajn kaj spiritismajn principojn nin kondukantajn al la tiel dezirata INTERNA REFORMO), tial ni sugestas METODON por STUDIO.

### **Metodo por studo – Kiel eduki por la lernado**

La ekzisto de *pli bona maniero studi* rezultas el konstruo farita surbaze de observo kaj eksperimentado de teknikoj kaj metodoj, tamen adaptitaj al la necesbezonoj kaj sen iu ajn forgeso pri la reala situacio de la leganto/studanto.

### **Kondiĉoj**

Elektu lokon kun jenaj kondiĉoj:

- bona aerumado;
- bona lumigado;
- sen bruoj;
- kun adekvata meblaro – tablo aŭ skribotablo kaj seĝo/benke.

### **Legado**

Por akiri la *studkutimon* kelkaj zorgoj fariĝas nepre necesaj ĉe la legado:

- la difino de taga periodo, se eble, daŭranta minimume 30 minutojn;
- la ekzisto de sufiĉaj rimedoj por la kompreno de la enhavo de la teksto/verko, kiel ekzemple: vortaro, gramatika verko, kaj materialo por skribnotoj (krajono, frotgumo kaj papero);
- la legado estos direktata ekde la kovrilo de la libro kaj,

unue, oni provos fari simplan legkonsulton (kono de la tuta enhavo, ne sin okupante pri la analizo); due, oni devas fari analizan legadon (registri notojn pri la signifo de la vortoj kaj substreki interesajn partojn por eblaj pridiskutoj).

## **Registro**

La homa menso estas io mirinda, sed havas siajn limojn. Do oni devas eltrovi manieron konservi tion komprenitan. Tial ni opinias necesa la utiligo de ia registrotekniko dum la studado.

La plej uzataj teknikoj: SKEMO kaj RESUMO.

## **Skemo**

Dum la legado, oni faras kelkajn notojn aŭ substrekas partojn de la verko. Post la finlegado de ĉiu sekcio, oni havos disponeblajn elementojn por prepari skemon, laŭ la malsupra ekzemplo:

Baza verko: *La Libro de la Mediumoj*

Strukturo

- Enkonduko;
- Unua parto – 4 ĉapitroj;
- Dua parto – 32 ĉapitroj.

Unua parto – Komencaj Nocioj

- Ĉapitro I – Ĉu ekzistas Spiritoj? – paragrafoj: 1 al 6;
- Ĉapitro II – Tio mirakleca kaj tio supernatura – pagagrafoj: 7 al 17;
- Ĉapitro III – Pri la metodo – paragrafoj: 18 al 35;
- Ĉapitro IV – Pri la sistemoj – paragrafoj: 36 al 51.

# Ĉapitro I – Ĉu ekzistas Spiritoj?

## Paragrafo 1

### Memornoto

Analizo de la **faktoroj** kiuj kontribuas por la **dubo** pri la **ekzisto de la Spiritoj**.

### Sinoptika tabelo

1. Primara kaŭzo (elementa):

- Nescio pri la vera naturo (esenco: kio konsistigas la kernon – plej intiman parton de la homo).

2. Ideo – Nocio

Difino:

- Apartaj estuloj de la kreitaĵaro – ne neceso vere “elmontri” ilian ekzistadon.

Fundamentado:

- Fantastaj rakontoj – nutrado de la imagpovo sen konkretaj elementoj;
- Blinda kredo – kredi je ĉio kaj neglekti la tutajon.

3. Baza Principo – Ekzisto de la Spiritoj

Koncepto:

- La ekzisto de inteligenta principo trans la materio.

Fundamentoj:

- La ekzistado, la postvivado kaj la individueco de la animo.

Filozofia-sciencia fundamentado:

- Spiritualismo: teoria kaj dogma demonstro.

TEORIA: tiu kiu science rekonas la principojn kaj procedojn.

DOGMA: metoda sinteno antaŭ aserto aŭ neado – proceso.

- Spiritismo: pozitiva demonstro.

POZITIVA: la praktika karaktero.

Por **studgrupo**, ni havas tri sugestojn:

1) *La Libro de la Mediumoj* kaj iu helpoverko (“Rikoltejo de la Mediumoj”, de Emmanuel; “Sur la kampoj de la Mediumeco”, de Andreo Ludoviko, aŭ aliaj gravaj verkoj).

Ni rekomendas la legadon ekde la enkonduko, faritan de la partoprenantoj laŭ sinsekvaj tekstopartoj. Post kiam ĉiu legis unu paragrafon, aŭ pli ol unu (en la komenco tio povas esti proponita de la gvidanto), oni faros komenton pri tio komprenita. Se iu kungrupano trovos malfacilon, iu alia povos sin prezenti por lin helpi. Se okaze neniu tion faros, la gvidanto de la grupo povos, aŭ devos, doni la koncernajn klarigojn, liveri pli da informoj, sugesti komplementajn legaĵojn pri la elektita temo aŭ ankoraŭ rakonti pri okazintaĵoj kiuj prilumas tion jam diritan .

Estas grave, ke ĉiu legu iom el la teksto kaj faru siajn nelongajn komentojn. Oni ne devas esti pelata de urĝeco, ĉar estas necese doni la parolon al ĉiuj membroj de la grupo, por ke ili sin esprimu.

Rekomendinde estas, ke ĉiuj kunvenantoj legu en siaj hejmoj la studotajn partojn de la teksto (oni antaŭe difinu pli malpli kiom da ili, surbaze de la tempodaŭro de la studo), kontrolu la nekonatajn vortojn kaj notu la ĉefajn ideojn aŭ ilin marku sur la libro, same kiel la eblajn dubojn.

Oni studos la temojn rekte rilatantajn al mediumeco, uzante *metodologiajn teknikojn* kiuj envolvos la tutan grupon kaj kiuj pravigas la bezonon de individua antaŭprepara studo. Tia studo indikiĝas nur al studkunvenoj pri mediumeco pro la neceso de pli

longa tempo (ĝis 2 horoj) por apliko de teknikoj laŭ la temo de la studo, la enhavo, la nombro da membroj de la grupo, celoj, ktp.

En la komenco, la plej spertiĝintaj kunuloj aŭ tiuj, kiuj kutime gvidas mediumajn kunvenojn, povas kunordigi la studadon, ĝis aliaj samgrupanoj estos doktrinece kaj pedagogie preparitaj por la tasko. Se en la grupo neniu estas, kiu havas konon kaj praktikon pri teknikoj, oni devas peti la helpon de la kunuloj sindediĉantaj al ESDE (Sistema Studado de la Spiritisma Doktrino) aŭ al la spiritista unuiga organo. Ni rememorigas, ke oni bezonas seriozan kaj anticipan planadon de la studota teksto, ĉe kio la gvidanto de la kunveno devas esti en akordo kun la Direktoraro, por interŝanĝo de ideoj kaj akcepto de sugestoj. Oni ankaŭ devas konsideri la neceson de statuto por reguligi ĉiujn procedojn rilatajn al mediuma kunveno, por ke ĉi tiu estu serioza, efika kaj kohera kun la Kodigado.

3) Lernokajeroj de studo kaj edukado de la mediumeco, publikigitaj de Brazila Spiritisma Federacio (FEB), sisteme proponas bazajn konojn pri la Spiritisma Doktrino, specife pri la scienca aspekto de mediumeco. Per bone organizitaj kunvenoj, kies daŭro estu proksimume du horoj, kaj kun ĉirkaŭ 25 kunvenantoj, oni povas formi skipon por mediuma aktiveco, celante seriozan studadon. Laŭmezure kiel la proponitaj gvidplanoj de la lernokajeroj estos studataj, la lernantoj devos serĉi en *La Libro de la Mediumoj* la legaĵon pri la elektita temo kaj ankaŭ fari uzon de aliaj verkoj kiuj helpas por la pli bona kompreno, sugestitaj de la gvidplano de ĉiu aparta lernokajero.

## **IV. Sugesto pri Gvidplano por Prelego**

*Temo: Obsedado kaj Malobsedado*

### **1. MOTIVIGO.**

Prenante kiel bazon la popolan diraĵon “Diru kun kiu vi iras...”, oni komentu ĝian inversigon – “Diru al mi kiu vi estas...” – la elsendo de pensoj kiuj starigas afinecon; la sentoj kaj emocioj al ni komunaj kaj la influo de la Spiritoj.

## **2. ENKONDUKO (E).**

Obsedo: Kio ĝi estas; ĝi ne originis el Spiritismo. Kaŭzoj. Signoj. Obsedanto/obsedato – kiuj ili estas?

## **3. DISVOLVADO (D).**

Diverseco de obsedado (mallonge paroli). Agado de la obsedantoj. Rezultoj de la obsedado. Kial Dio permesas la obsedadon? (“La Konsolanto”, par. 159)

## **4. KONKLUDO (K).**

Malobsedado: kio ĝi estas, kiel ĝin atingi. Montri, ke la plej bona malobseda terapio estas la memevangelizado, kiu, asociita al fluidoterapio, edifaj legaĵoj, preĝo, laboro por la bono, kondukos al la reekvilibro. Rakonti la historieton “La Ŝirma Ombrello”, de Richard Simonetti, se estos disponebla tempo.

## **5. RIMEDOJ.**

Afiŝoj kun la difinoj de *obsedo/malobsedo*, slipoj kun la ŝlosilvortoj de ĉiu parto de la prelego, projekciaĵoj kun la bazaj rimarkoj pri ĉiu ero de la prelego (E, D, K), slipoj kun la demandoj kiuj pritraktas la apartajn erojn de la temo aŭ la plej gravajn – disdonataj al la ĉeestantoj por ke ĉi tiuj provu ilin respondi kiam la preleganto demandas. La respondoj povos esti konfirmataj aŭ kompletigataj de la parolanto, konsidere ke ili jam estis disdonataj ankaŭ pere de numeritaj slipoj enhavantaj la demandojn al la publiko. ELKTU TION KIO PLEJ KONVENOS AL VI.

## 6. FONTOJ POR KONSULTO

- a) *Desobsessão (Malobsedado)* – André Luiz/Francisco Cândido Xavier;
- b) *Mediunidade: Caminho para ser Feliz (Mediumeco: vojo por la feliĉo)* – André Luiz/Francisco Cândido Xavier;
- c) *Nos Domínios da Mediunidade (Sur la Kampo de la Mediumeco)* – André Luiz/Francisco Cândido Xavier;
- ĉ) *O Consolador (La Konsolanto)* – Emmanuel/Francisco Cândido Xavier;
- d) *O Evangelho Segundo o Espiritismo (La Evangelio laŭ Spiritismo)* – Allan Kardec;
- e) *O Livro dos Espíritos (La Libro de la Spiritoj)* – Allan Kardec;
- f) *O Livro dos Médiuns (La Libro de la Mediumoj)* – Allan Kardec;
- g) *Quem tem medo da Obsessão? (Kiu Timas la Obsedon?)* – Richard Simonetti;
- ĝ) *Recordações da Mediunidade (Rememoroj el la Mediumeco)* – Yvonne do Amaral Pereira.

## 7. RIMARKO.

Gvidilo por parolado kun daŭro de 45 al 60 minutoj. Se oni ne disponos je pli da tempo, oni devas fari la necesan adapton.

## 8. LASTAJ LINIOJ.

Ĉe la sincera deziro esti utila al tiuj kiuj ekprenas sur sin la iniciaton pri doktrina elmontrado, ni proponas bazan bibliografion, kiu povos helpi ĉe la preparo de la prelegoj.

Konsiloj al la preleganto:

8.1 – Gvidilo por doktrinecaj, evangeliaj kaj doktrinevangeliaj temoj:



- 8.1.1. – “Manual do Expositor e do Dirigente Espírita” (Manlibro por la Preleganto kaj por la Spiritista Gvidanto) – Celso Martins. EME.
- 8.1.2. – “Oratória a Serviço do Espiritismo” (Oratorarto je la Servo de Spiritismo) – Therezinha Oliveira. CEALK.
- 8.1.3 – “Guia ao Expositor Espírita” (Gvidilo por la Spiritista Preleganto) – Carlos Eduardo da Silva. FEESP.

## 8.2 – Pritemaj bibliografiaj verkoj:

- 8.2.1 – “O Espiritismo de A a Z” (Spiritismo de A al Z) – Rio de Janeiro: FEB.
- 8.2.2 – “Guia de Fontes Espíritas” (Gvidlibro pri Spiritismaj Fontoj) – Rio de Janeiro: FEB.
- 8.2.3 – “Vade Mecum Espírita” – São Paulo. Livraria Espírita Nosso Lar.
- 8.2.4 – “Prontuário da Obra de Allan Kardec” (Indiklibro por la Verkaro de Allan Kardec) – Ney da Silva Pinheiro. Sobradinho/DF: EDICEL.
- 8.2.5 – “Bibliografia Espírita” (Spiritisma Bibliografio) – 2 vol. Salvador: Grupo de Divulgação de Bibliografia Espírita.

## **V. Konkludo: La Graveco de la Studado de La Libro de la Mediumoj**

Cent kvardek tri jaroj forpasis ekde la **15-a de januaro 1861**, kiam Parizo el la XIX-a jarcento vekigis en la tago de la publikigo de La Libro de la Mediumoj, la “Gvidilo de la Mediumoj kaj Elvokantoj”, laboro realigita de la Spiritoj kaj organizita de Allan Kardec. Ĝi estis “ĉiela” donaco al la mediumoj, al tiuj sensivuloj, kiuj, perceptante la Spiritan Mondon, ne sciis kiel taksi la impresojn, voĉojn, odorojn, strangajn ideojn kaj la Spiritojn (rigardatajn kiel mortintojn), kiuj grandnombre alproksimiĝadis al la vivantoj (tiam sensciaj pri la spiritaj aferoj).

La antaŭvido el la Libro **La Aĝoj** (ĉap. II, par. 17 kaj 18) plenumiĝis:

*Kaj en la lasta tempo, diras Dio, Mi elverŝos Mian spiriton sur ĉiun karnon;  
Kaj viaj filoj kaj viaj filinoj profetos, kaj viaj junuloj havos viziojn, kaj viaj maljunuloj havos sonĝojn;  
Kaj eĉ sur Miajn sklavojn kaj Miajn sklavinojn en tiu tempo Mi elverŝos Mian spiriton, kaj ili profetos.*<sup>8</sup>

La Spiritoj sin prezentas al la vivantoj-enkarniĝintoj en la tuta mondo kaj estis “urĝe sed ne rapide” (ni rememoras Bezerra de Menezes kiam li atentigis pri la unuiĝo inter la spiritistoj), ke lernolibro, fidinda “gvidilo”, kompilejo de studoj kaj de maturaj spertoj, estu disponigita al tiuj interesiĝintaj pri la spiritisma scio kaj pri la mediuma praktikado.

En la enkonduko de la ĉikoncerna verko, Kardec sincere parolas al ni: “Oni erarus ankaŭ pensante, ke oni trovos en ĉi tiu verko ian ĝeneralan kaj nepre efikantan recepton, por fari mediumojn. [...] ĝi celas montri la rimedojn, por disvolvi mediuman kapablon laŭ la povo de ĉiu kaj precipe direkti utile tiun jam ekzistantan kapablon. Sed ne sole ĉi tion mi celas.”

Se li nur indikus la rimedojn por disvolvi la mediuman kapablon, la publikigita verko jam kunportus grandan meriton. Kiom da duboj ni havas dum la proceso de la mediuma edukado, ekde la unuaj impresoj ĝis la efektiva partopreno en spiritisma grupo por mediuma agado? Sennombraj. Skribiva mediumo, elparola, kiu vidas la Spiritojn, kiu klarigas per dialogo, tiuj ĉi estas kelkaj el la pluraj tipoj de mediumeco, kiuj postulas malsamajn tempon kaj metodojn por ekvilibra disvolviĝo. *La Libro de la Mediumoj* transdonas al ni fidindajn informojn kaj direktilojn por ke ni povu utiligi la mediumecon por nia spirita progreso, kio klare produktos, ekde nun, pozitivan influon en nia ĉiutaga vivo.

---

<sup>8</sup> Transkribita el la Esperanta versio de la Biblio.

Ankoraŭ pli, la “Gvidilo” celas la disvolviĝon de mediumeco, por ke ĝi estu bone utiligata helpe de ĉiuj kaj kunlaboru por la pliboniĝo de nia mondo, por ke ĝi atingu pacon. *La mediumeco devas esti utila, servofara, direktata al la laboro, al la neprofitema helpado. Al la konsolo.* La Promesita Konsolanto tiam materiiĝis per la mediuma agado, kiam la Spiritoj parolis al ni kaj sugestis vojiron, sintenojn, dirante pri sia aktuala situacio, ke ili estas daŭre vivantaj, agantaj.

Tamen, Allan Kardec proponas pli profundan analizon: *Krom la ĝustasencaj mediumoj, ĉiutage kreskanta multego da homoj interesiĝas pri manifestiĝoj de Spiritoj; ilin gvidi en iliaj observoj, montri al ili la embarasojn, kiujn ili eble, eĉ nepre renkontos sur tute nova kampo; ilin inici en la manieron, kiel trakti kun la Spiritoj, montri al ili, kiel ricevi bonajn mesaĝojn – jen la programo, kiun mi devas plenumi, ĉar alie mi farus laboron nekompletan.*

Oni atentigas do, ke ĉe la serioza studado de La Libro de la Mediumoj, koncerne al la mediuma kapablo ni havos:

- a) la konon pri la rimedoj por ĝia disvolviĝo;
- b) la scion por igi ĝin utila;
- c) la naturan saĝon por ĝin profite observi;
- ĉ) la paciencon alfronti la obstaklojn aperantajn sur la vojo;
- d) la plej bonan manieron paroli kun la Spiritoj;
- e) kaj fine, oni sukcesos havi bonajn komunikaĵojn.

Ne estas facile atingi ĉion ĉi. Oni bezonas tempon, dediĉon, disciplinon, amon kaj konon pri tio kion ni faras, kaj Kardec rimarkigas, ke se ni havos persiston en la laboro *la sperto montros ilian utilecon. Ĝin zorge studinte, oni pli bone komprenos la faktojn, kiujn oni ĉeestos.*

Ni ĉiuj, spiritistoj kaj komencantoj pri Spiritismo, ne povus nin taksi tiaj sen la kriteria studo de *La Libro de la Mediumoj: Kiel praktika instruilo, ĉi tiu verko koncernas ne nur mediumojn, sed ankaŭ ĉiujn homojn, kapablajn vidi kaj observi spiritismajn fenomenojn.*

Antaŭ nelonge ni aŭdis de “spertiĝinta mediumo”, ke ne necesas restudi la verkon *La Libro de la Mediumoj* kune kun la mediuma grupo: li jam estis farinta la studon izole. Tiu junulo ne komprenis la gravecon de la kuna studado, kiam ĉe la lernado en spiritisma domo oni ankaŭ havigas al si la harmonion de la grupo, eltiras la dubojn kiujn la individua studado starigis, same kiel oni tenas en ekvilibron la praktikadon de la mediumoj kiuj partoprenas en la kunveno.

Ĉe konsulto de *La Libro de la Mediumoj* ni trovas en la difino de *spertaj mediumoj* la jenon: [...] *la sperto estas la rezulto de serioza studado de ĉiuj malfacilaĵoj, kiuj montriĝas en la praktikado de Spiritismo. La sperto havigas al la mediumo la takton necesan, por taksu la naturon de la manifestiĝantaj Spiritoj, juĝi iliajn bonajn aŭ malbonajn ecojn laŭ la plej detalaj signoj, malkovri la ruzecon de la trompemaj Spiritoj, kiuj sin maskas per ŝajno de vereco. [...]* Malbone estas, ke multaj mediumoj intermiksas sperton, frukton de studado, kun kapableco, produkto de la fizika strukturo; ili opinias sin jam majstroj, ĉar ili skribas facile; ili repuŝas de si ĉiujn konsilojn kaj fariĝas do kaptiĝo de mensogemaj kaj hipokritaj Spiritoj, kiuj ilin enlogas al si, flatante ilian fierecon.

Jam pasis preskaŭ cent kvindek jaroj de la Pentateŭko de Allan Kardec kaj oni ankoraŭ aŭdas “vizitantojn de aliaj spiritismaj centroj”, kiuj opinias (kaj fakte opinias, ĉar ili neniel sin bazas sur certecoj kaj konvinkoj), ke la mediumaj praktikoj estas ne bezonataj. Kion fari? Ilin inviti al sistema studado de la Spiritisma Doktrino. Ili ne studis la *Libron de la Mediumoj*, eble apenaŭ legis ĝin kaj certe en supraĵa maniero. Ili ne atentis la mesaĝon de *La Spirito de Vero*, kiu tiom kontestas la opiniojn de tiuj, al kiuj malplaĉas la spirita komunikado: *Ilia pretendo estas la neigo de tio, kion Spiritismo havas plej belan kaj plej konsolan: la rilatoj inter la mondo videbla kaj la mondo nevidebla, inter la homoj kaj la estuloj, kiuj estas por ili karaj kaj kiuj do estus por ili senrevene perditaj. Tiuj rilatoj estas tio, kio alkonformigas la homon al lia estonteco, tio, kio disigas lin de la materia mondo; forigi tiujn*

*rilatojn estas redronigi lin en la dubon, kiu estas lia turmento, estas nutri lian egoismon.* (Ĉapitro XXVII)

En 2007, kiam oni kunmemoras la 150-jariĝon de la naskiĝo de Spiritismo, ni profite ekkomencu (aŭ rekomencu) la atentan legadon de la Kodigado, unue per: *La Libro de la Spiritoj* kaj per ĝia daŭrigo, *La Libro de la Mediumoj*.

Ni finas ĉi tiun parton memorante pri Pascal, bonkora Spirito kiu donacis al ni la belan kaj stimulan mesaĝon XIII, el la Ĉapitro XXXI, de la nun analizata verko, el kiu ni elprenis la jenan pecon:

*Nu, mediumoj, profitu el tiu kapablo, kiun Dio bonvolis konsenti al vi. Fidu la pacanimecon de nia Majstro; ĉiam praktikadu kariton; neniam laciĝu praktiki ĉi tiun superegan virton, kiel ankaŭ toleremon. Viaj agoj ĉiam harmoniuj kun via konscienco, kaj tiel vi havos senduban rimedon multobligi vian feliĉon en ĉi tiu pasema vivo kaj prepari ankoraŭ multege pli dolĉan ekzistadon.*

## **VI – Bibliografiaj Referencoj**

KARDEC, Allan. *O Evangelho segundo o Espiritismo (La Evangelio laŭ Spiritismo)*. 114. ed. Rio de Janeiro: FEB, 1997. 437p.

KARDEC, Allan. *Obras Póstumas (Posmortaj Verkoj)*, 28. ed. Rio de Janeiro: FEB, 1998. 488p.

KARDEC, Allan. *Revista Espírita (Spiritisma Revuo)*. São Paulo: Editora Edicel. Anos 1860 e 1869.

KARDEC, Allan. *Viagem Espírita em 1862 (Spiritisma Vojaĝo en 1862)*. Traduko kaj antaŭparolo de Wallace Leal V. Rodrigues. Matão/São Paulo: Editora O Clarim, 1968. 168p.

MAGALHÃES, Lybio. *Ciência da Vida à Luz do Espiritismo (Scienço de la Vivo je la Lumo de Spiritismo)*. Rio de Janeiro.CELD, 1996.

*Novo Testamento (Nova Testamento)*. Johano, 14:15-18 kaj 26.

*Pequeno Dicionário Enciclopédico Koogan Larousse (Malgranda Enciklopedia Vortaro Koogan Larousse)*. Ed. Larousse do Brasil.

WANTUIL, Zêus e THIESEN, Francisco. *Allan Kardec*.4. ed. Rio de Janeiro: FEBm 1990. Vol. I. 210p.

# La Evangelio Laŭ Spiritismo: 140 Jaroj Post Publikigo

*Isabel Gervásio de Faria*

## **I – Historio de la Verko**

*LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO* (ELS) estas la tria verko de la Kodigado de Kardec. Publikigita en **aprilo 1864** – en Parizo – ĝi kolektas en si ĉiujn moralajn instruojn de la Spiritisma Doktrino, konsistiganta, do, ties religian karakteron.

*LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO* prezentas nenian novan moralon: ĝia tuta enhavo estas la klarigo de la plej signifaj partoj de la Evangelio de JESUO, elektitaj de la Kodiginto kaj klarigitaj de la Superaj Spiritoj, kiuj respondecas pri la Kodigado, konservante ĝian originalan purecon. Ĝi enhavas profundan alvokon al la pripensado kaj fariĝas forta stimulo al la interna renoviĝo pro la dolĉaj konsoloj kaj la sublimaj esperoj, kiujn ĝi disdonas al ĉiaj suferantoj. Al la fieraj kleruloj de la mondo ĝi reprezentas veran enigmon, sed al la simplaj kaj humilaj homoj kompilaĵon de saĝeco kaj de amaj kaj justaj revelacioj.

Ĝis la tria eldono ĝi titoliĝis *IMITO DE LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO*. Laŭ la sugestoj de pluraj kunuloj kaj mentoroj, Allan Kardec reviziis la tutan verkon kaj republikigis ĝin kun la titolo per kiu oni konas ĝin hodiaŭ: *LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO*. En la organizado de la temoj, ĝi elmontras la bonegan pedagogian laboron realigitan de la Kodiginto. Ni analizu kelkajn el ĝiaj strukturaj aspektoj:

- Ĝi estas verko konsistanta el nur dudek ok ĉapitroj, kies titoloj estas vortoj enestantaj en la instruoj de JESUO, en lia Dia Evangelio;

- Ĝi havas mallongan antaŭparolon: belegan mesaĝon de la Spirito de Vero, mediume transdonitan pere de la plej juna mediumino el tiuj, kiuj kunlaboris kun Allan Kardec en la laboro de la Kodigado. Temas pri elokventa alvoko al la homo, al lia strebado por interna reformiĝo;
- Postsekvas longa enkonduko kun la necesaj klarigoj al la leganto, prilumanta la jenajn punktojn:

1- CELO DE LA VERKO – Destinata al la simplaj kaj humilaj laŭ la koro, ĝi starigas regulojn de konduto, sekuran gvidilon por la individua feliĉo kaj por la eklevo de la vualo, kiu kaŝas al ni la estontan vivon.

2 – AŬTORITATECO DE LA SPIRITISMA DOKTRINO – La Kodiginto montras al ni la metodon utiligitan en la proceso de la Kodigado: la universalan kontrolon de la instruoj de la Spiritoj.

3 – HISTORIAJ RIMARKOJ - Traduko de la bibliaj terminoj uzataj tra la verko.

4 – SINTEZO DE LA INSTRUOJ DE SOKRATO KAJ PLATONO, ANTAŬULOJ DE LA KRISTANA IDEALO KAJ DE SPIRITISMO.

Rilate la ĉapitrojn, jene organiziĝis la tuto de la verko: dudek sep el ili fundamente havas la saman strukturon: titolon, subtitolojn, transkribon de evangeliaj tekstoj de Mateo, Marko, Luko kaj Johano kaj/aŭ bibliajn citaĵojn de la Malnova Testamento. Sekvas la komentarioj de la Kodiginto, pere de mallongaj kaj celtrafaj tekstoj, kaj, ĉe la fino de ĉiu ĉapitro, la parto titolita “Instruo de la Spiritoj”. Ĉi tiu parto konsistas el mediumaj mesaĝoj ricevitaj en pluraj landoj pere de la plej malsamaj mediumoj, fremdaj inter si kaj pri kiuj estas necese reliefigi kelkajn faktojn:

1 – El la kvanto da mesaĝoj al la dispono de Allan Kardec, ĉirkaŭ 300 estis apartigitaj por plendetala studado, el kio rezultis la kolekto de tiuj 110 kiuj konsistigas la verkon;

2 - El Brazilo estis senditaj al li kelkaj kajeroj kun psikografiitaj



mesaĝoj. Sed nur la mesaĝo titolita “La egoismo”, subskribita de Emmanuel kaj enestanta en la ĉapitro IX, estis elektita de la Kodiginto: estas interese rimarkigi, ke pli poste tiu Spirito fariĝis la mentoro de nia kara Chico Xavier;

3 – Kvardek kvar Superaj Spiritoj subskribas la 110 selektitajn mesaĝojn. La plej multo el ili estis, kiam enkarniĝintaj, elstaraj figuroj de la Katolikisma Kredo;

4 – Kvankam oni rekonis ilian gravecon, neniuj medioj estis persone menciitaj dum la farado de tiu verko, kio same okazis rilate ĉiujn aliajn verkojn de la Kodigado.

Oni devas reliefigi, ke per la adopto de la sistemo ĉapitro/paragrafoj, Kardec ilin numeris ekde la evangeliaj notoj ĝis la lasta spirita mesaĝo, por faciligi ties lokalizon kaj konsulton.

La konkludo de *LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO* troviĝas en la ĉapitro 28, kiu estas kolekto da spiritismaj preĝoj. Multaj el ili estas psikografiitaj mesaĝoj, kiuj nobligas kaj valorigas la signifon de la efektivaj prezentitaj preĝoj. Ĉe ilia organizado, Kardec ilin dividis en kvin grupojn: 1<sup>a</sup> - ĝeneralaj preĝoj; 2<sup>a</sup> - Preĝoj por tiuj, kiuj fakte preĝas; 3<sup>a</sup> - Preĝoj por la enkarniĝintoj; 4<sup>a</sup> - Preĝoj por la elkariniĝintoj, kaj 5<sup>a</sup> - Preĝoj por tiuj malsanaj kaj trafitaj de spirita obsedoj. Gravus ankoraŭ rimarkigi, ke ĉiun preĝon antaŭas antaŭparolo, per kiu la koncerna temo estas klarigita sub la lumo de la Spiritisma Doktrino, tiel kontribuanta por ke la fido fariĝu racie komprenata.

Krom la Kvinverka Kodigado, ĉiuj aliaj verkoj skribitaj laŭ la Spiritisma Doktrino havas la celon ĝin ampleksigi, klarigi kaj profundigi. Tiel procedis la propra Kodiginto, kiu multe skribis, ĉar admirinda estas lia kontribuo tiurilate. Aliaj verkistoj, la klasikaj, kiel ekzemple Léon Denis, Gabriel Delanne, Camille Flammarion, ktp; la modernaj kaj la nuntempaj, precipe en Brazilo, rigardata de la Spirita Plejalta Mondo kiel “Koro de la Mondo, Patrujo de la Evangelio”, ĉiuj ili intense disvolvis ĝian moralan aspekton kaj ĝiajn konsekvencojn, ĝuste ampleksigante la religian aspekton de Spiritismo.

Rekonante kaj respektante la valoran kontribuon de ĉiuj spiritistaj verkistoj, reenkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj, kiuj, specife ĉi tie, en la lando de la Sudkrucio, donas impulson al la Spiritisma Doktrino por la plenumado de ĝia misio, oni devas evidentigi la bonfaran figuron de FRANCISCO CÂNDIDO XAVIER.

Senlaca laboranto de la mediumeco kun Jesuo, li kontribuis per 412 mirindaj verkoj, pli ol duono de ili laŭkonforme pliklarigantaj *LA EVANGELION LAŬ SPIRITISMO*, kaj por sia tiel fekunda kaj grava misio li ricevis la spiritan protekton kaj kunordigadon de la Spirito Emmanuel. El la tuto de la verkoj kiuj aldone helpas klarigi la karakteron de *LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO*, *kiel apogo al la studemulo en ties samtempa legado de aliaj verkoj, ni sugestas kelkajn titolojn malsupre listigitajn.*

## **II. Helpaj Verkoj por la Studo de La Evangelio Laŭ Spiritismo**

N-ro	HELPA VERKO	AŬTORECO	ELDONEJO
1	Kristanismo, la Forgesita Mesaĝo	Hermínio Miranda	O Clarim
2	La Mirindaj Paraboloj de Jesuo	Paulo Alves de Godoy	FEESP
3	Branĉoj de la Vinberujo	Ir. José/C.A. Baccelli	IEEPP
4	La Prediko sur la Monto	Rodolfo Calligaris	FEB
5	Iru kaj Preĝu	Newton Boechat	FEB
6	Spiritismaj Studoj	J. Ângelis/ D.P. Franco	FEB
7	Spiritisma Kandelabro	J. Ângelis/ D.P. Franco	FEB
8	Feliĉaj la Simplaj	Valerium/Waldo Vieira	FEB
9	Stariĝu	Richard Simonetti	CEAK
10	Via Fido Savis Vin	Richard Simonetti	CEAK
11	Ne Peku Plu	Richard Simonetti	CEAK
12	Sepdekoble Sep	Richard Simonetti	CEAK
13	La Prediko sur la Monto	Richard Simonetti	CEAK

14	La Voĉo sur la Monto	Richard Simonetti	FEB
15	La Libro de la Espero	Emmanuel/F.C. Xavier	CEC
16	La Spirito de la Vero	Diversos/F.C. Xavier	FEB
17	Relikvujo de Lumo	Diversos/F.C. Xavier	FEB
18	Spiritista Opinio	Diversos/F.C. Xavier	FEB
19	Spiritisma Idealo	Diversos/F.C. Xavier	FEB
20	Spiritisma Vojo	Diversos/F.C. Xavier	FEB
21	Instrumentoj de la Tempo	Emmanuel/F.C. Xavier	FEB
22	Evangelio en la Hejmo	Meimei/ F.C. Xavier	FEB
23	Pano Nia	Emmanuel/F.C. Xavier	FEB
24	Vinberujo de Lumo	Emmanuel/F.C. Xavier	FEB
25	Vojo, Vero kaj Vido	Emmanuel/F.C. Xavier	FEB
26	Viva Fonto	Emmanuel/F.C. Xavier	FEB
27	Vortoj de Eterna Vivo	Emmanuel/F.C. Xavier	FEB
28	Kristana Agendo	André Luiz/F.C.Xavier	FEB
29	Serĉu kaj Vi Trovos	André Luiz/F.C.Xavier	IDEAL
30	Verda Signalo	André Luiz/F.C.Xavier	CEC

### **III. Sugesto de Gvidilo por Studo de La Evangelio Laŭ Spiritismo**

*LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO* devas ĉiam esti ĉe-mana verko, ĉar, krom lernobjekto por metoda studado, ĝi estas valora, helpa kaj konsola rimedo. En la malfacilaj horoj de dubo, doloro aŭ disreviĝo, la Evangelio ajnpage malfermita ĉiam liveras konsolan respondon, redonante al la doloranta koro la atenditan serenecon kaj pacon. Por la studanto de Spiritismo, kiu volas pli bone koni la religian flankon de la Doktrino, la metoda studado de la Evangelio estas postulata kiel neceso. La individua studo de tiu mirinda verko, en la hejmo aŭ en grupoj en iu Spiritisma Domo, devas esti persista kaj zorge farita dum unu horo ĉiusemajne. Por ke oni profite studu, laŭ iu ajn el la supre menciitaj sugestoj,

estas necese havi kelkajn zorgojn kiuj helpos por pli bona profito de la verko.

## **1. KONDIĈOJ POR BONA LEGADO:**

- Elekti adekvatan lokon, kun bona aerumado, helan kaj malproksiman al eksteraj vekaj stimuliloj.
- Sidi komforte kaj havi ĉe-mane la necesan materialon: la tekston, bonan vortaron, krajonon, liniilon kaj paperon por notoj.

## **2. KIEL LEGI:**

- Legi malmulte sed je tiom da fojoj kiom necesaj al la plena kompreno de la studobjekto, laŭ la jena maniero:
  - a) Legi unu fojon por la ĝenerala kompreno kaj esplori la signifon de ĉiuj novaj terminoj;
  - b) Legi duan fojon, paragrafon post paragrafo, apartigante la ideojn, ĉirkaŭante aŭ substrekante la centran ideon; signi kaj noti ĉe la marĝenoj aŭ en la notkajero ĉiam kiam necese;
  - c) Legi plian fojon por konstati ĉu ĉio kompreniĝas. Malfermi sekve la komentariojn, profitante maksimume el la tempo.

## **3. KONKLUDE:**

- Fininte la legadojn kaj la komentojn, prepari malgrandan resumon, profitante tion ĉirkaŭ-substrekitan aŭ notitan.
- Post finpretigo de la resumo, kontrolu ĉu vi estas kontenta pri la studo. Se restis ia dubo, reiru al la teksto kaj ĝin denove legu.
- Metu en arkivon tiujn sintezojn. Fininte iun ĉapitron, ilin ĉiujn legu kaj vi estos surprizita pri la laborrezultoj.

Oni devas atentigi, ke *LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO* estas verko por konstanta studado kaj legado. Ĉe la fino, revenu al la komenco kaj vi konstatos kiom da novaĵoj oni malkovras dum la relego.

## **IV. Sugesto por Gvidilo por Prelego**

Temo: La Bonvolema Homo

*(ELS, Ĉap. XVII – “Estu Perfektaj” – Paragrafo 3)*

*“Vi scios la Veron, kaj la Vero vin liberigos.” –  
Jo. 8/32*

*“Amu, jen la unua admono; instruu vin, jen la dua.”  
ELS. Ĉap. 6, paragrafo 5*

### **\* Trajtoj de la vera Bonvolema Homo:**

- Plenumas la Leĝon de Justeco, Amo kaj Karito;
- Faras al la aliaj tion, kion li ŝatus ke ili al li faru;
- Havas fidon al Dio;
- Fidas la estontecon;
- La sortovicoj de la vivo estas atestoj kaj elaĉetokazoj;
- Faras la bonon ne atendante ian rekompencan;
- Lia unua ago estas pensi pri la aliaj anstataŭ pri si mem;
- Estas bonkora, humana, bonvolema, ĉar li rigardas ĉiujn homojn kiel fratojn;
- Respektas ĉies sincerajn konvinkojn;
- Lia gvida celo en ĉiaj okazoj estas la Karito;
- Pardonas kaj forgesas la ofendojn;
- Neniam evidentigas aliulajn erarojn. Sed, se al tio li estos devigita, li serĉas ĉiam la bonon kiu mildigas la malbonon;
- Luktas senĉese kontraŭ la propraj neperfektaĵoj;

- Estas modesta kaj neniam elstarigas siajn kvalitojn;
- Ne sentas vantemon pri siaj riĉaĵoj kaj personaj profitaĵoj;
- Ne trouzas la valoraĵojn al sia dispono;
- Anstataŭ aŭtoritatecon, uzas bonkorecon kaj bonvolemon;
- Kiel subulo, ĉiam konscie plenumas siajn devojn.
- La *bonvolema homo* respektas ĉiujn rajtojn de siaj similuloj tiel kiel li deziras, ke la liaj estu respektataj.

Tiu Listo ne estas kompleta. Sed, se oni ĝin sekvas, oni estos sur la vojo kiu kondukas al ĉiuj ceteraj karakteroj de la BONVOLEMA HOMO.

## 1) Diskonigante la Evangelion en la Spiritisma Domo

*Iru kaj prediku, ĉar la atentaj popolamasoj ricevos kun ĝojo viajn parolojn de konsolo, de frateco, de espero kaj de paco. (Erasto – ELS, ĉap. 20, paragrafo 4)*

La kunordiganto de la Grupo de Studoj en Spiritisma Domo havas kiel ĉefan taskon konsoli la suferantojn kaj instrui ĉiujn pri la maksimumoj de la Evangelio, sub la inspiro de Jesuo, lia Majstro kaj modelo. Per vortoj kaj figuroj konformaj al la mezgrada kultura nivelo de la partoprenantoj, donante ekemplojn pri faktoj de la reala vivo kaj per karesa kaj entuziasma instigo al ĉiuj, por ke ili alĝustigu siajn vivojn laŭ la kristanaj normoj, certe lia doktrina prelego trovos eĥon en ĉies koroj.

La plej bona gvidilo de ideoj por studo en grupo sendube estas la *EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO* mem. Preferinde oni dividu ĉiun ĉapitron laŭ la nombro da monataj prezentoj. Tie oni trovos riĉan materialon por pripensado, plenan de motivigo, dinamikeco kaj instruoj. Nur kiel ekzemplo de tiu ĉi sugesto, ni prezentos jenan monatan planon por studoj de difinita ĉapitro. Ni vidu:

## SPIRITISMA CENTRO “...”

Kunveno por Studo: lunde

Daŭro de la Prelego: 40 minutoj

Monato: januaro / 2006 – Tagoj: 5, 12, 19 kaj 26

Ĉapitro de la ELS: I – “Mi ne venis, por detruigi la Leĝon”

Numero de paragrafoj por studo: 11

<i>Prel.</i>	<i>Datoj</i>	<i>Par.</i>	<i>Ĉefaj punktoj</i>	<i>Rimedoj</i>
1 <sup>a</sup>	5/1	1 e 2	<p><b>Mateo, V: 17 kaj 18</b></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>● La misio de Jesuo kaj ĝia plenumo.</li> <li>● La tuta planedo sub la Dia Leĝo.</li> <li>● La spiritaj valoroj por la homo.</li> <li>● Moseo – 1<sup>a</sup> Revelacio: Justeco.</li> <li>● La 10 ordonoj kaj ĝia aktualeco.</li> <li>● Karaktero de la Revelacio.</li> <li>● Spiritisma Vidpunkto pri la Mosea Leĝo.</li> </ul>	<ul style="list-style-type: none"> <li>● <i>Mallongaj legadoj</i></li> <li>● <i>Ilustritaj kaj aktualaj Komentarioj</i></li> <li>● <i>Mallonga rakontado pri Moseo</i></li> </ul>
2 <sup>a</sup>	12/1	3 e 4	<ul style="list-style-type: none"> <li>● Kristo: Gvidanto kaj Modelo por la homaro.</li> <li>● 2<sup>a</sup> Revelacio: Amo</li> <li>● La Evangelio en niaj vivoj.</li> <li>● La Evangelio kaj la Spiritisma Doktrino.</li> <li>● Jesuo, La Kreinto kaj Reganto de la Tero.</li> <li>● La 1<sup>a</sup> Revelacio preparis la 2<sup>an</sup>.</li> <li>● La 2<sup>a</sup> Revelacio ne diris ĉion.</li> </ul>	<ul style="list-style-type: none"> <li>● <i>Mallongaj legadoj</i></li> <li>● <i>Ilustritaj komentarioj</i></li> <li>● <i>Mallonga rakontado pri Jesuo</i></li> </ul>

3 <sup>a</sup>	19/1	5 a 8	<ul style="list-style-type: none"> <li>● Spiritismo, nova erao por la homaro.</li> <li>● 3<sup>a</sup> Revelacio: Vero.</li> <li>● Ĝenerala Vidpunkto de la Spiritisma Doktrino.</li> <li>● Kompari la tri Revelaciojn, montrante la maturecon de la homo en ĉiu el ili.</li> <li>● Kunligo de la Scienco kaj de la Religio – Projekto por la Estonto..</li> <li>● Evoluo de la homaro: Harmonio kaj Progreso.</li> </ul>	<ul style="list-style-type: none"> <li>● <i>Disdoni kajeron de FEB (Ekkonu Spiritismon)</i></li> <li>● <i>Komentarioj kun la kunlaboro de la ĉeestantaro</i></li> <li>● <i>Prepari elmontraĵon de la tri Revelacioj kaj ĝin prezenti</i></li> </ul>
4 <sup>a</sup>	26/1	9 a 11	<ul style="list-style-type: none"> <li>● Repreni la sintezon de la lasta parolo por rememori la ĉapitron.</li> <li>● Elekti unu el la tekstoj por fini la studon.</li> <li>● Reliefigi la mision de Spiritismo Kiel progresanta Revelacio.</li> </ul>	<ul style="list-style-type: none"> <li>● <i>Gaja kaj legebla diapozitivo</i></li> <li>● <i>Projekciilo</i></li> <li>● <i>Dialogo kun la ĉeestantoj</i></li> </ul>

## **V. Konkludo: La Graveco de la Studo de La Evangelio Laŭ Spiritismo**

*La grandaj voĉoj de la ĉielo estas kvazaŭ sono de trumpeto, kaj la ĥoroj de l' anĝeloj kunvenas. Homoj, ni invitas vin al la dia koncerto; viaj manoj tenu la liron; viaj voĉoj unuiĝu, kaj en sankta himno ili etendiĝu kaj vibradu de unu al la alia ekstremo de l' universo. La Spirito de Vero – ELS, Antaŭparolo.*

La Spiritoj de la Sinjoro, kiuj estas ĉielaj virtoj, faras al la homaro sian alvokon, petegante ĉiujn pri nova erao. Por pli vasta kompreno de la Evangelio de Kristo, nura gvidilo por la venko de



la Spirito super si mem kaj definitiva konkero de la ĉiama feliĉo.

Ĝi klare estas grandega, multfoje peniga laborprogramo, sed profunde bonfara: igi la homon rigardi sin mem, post jarmiloj sur la erarigaj vojoj de personismo, vanteco kaj ribelemo. Ĝi estos titana lukto, persona kaj tutmonda, tamen kalkulanta je la kunhelpo de la Superaj Fortoj, kaj pro tio nerezistebla kaj nenuligebla.

Se ne estus la eterna favorkoreco de la PATRO, la ŝarĝo estus pli peza ol tio, kion la ŝultroj povas elteni... En ĉi tiu momento sonas la diaj vortoj: VENU AL MI ĈIUJ, KIUJ ESTAS LABORANTAJ KAJ ŜARĜITAJ, KAJ MI VIN RIPOZIGOS. (Mateo, 11:28). Jen estas Jesuo, la Dia Paŝtisto de niaj animoj, subtenanta ĉiujn, kiuj deziras stari super la malnova homo. Sufiĉus al ni tia karesa admono. Tamen tiom granda kaj vasta estas estas la Dia riĉeco, ke ĝi permesis la alvenon de *LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO*, en kiu la lecionoj de la Kristo, disigante la spiriton disde la vortoj, konsistigas novajn vojojn al la tuta homaro.

Tiu mirinda verko, kiu en aprilo de 2004 kompletigis 140 jarojn, invitas nin al Karito, al Fido, al Frateco, al Kompreno, al Toleremo, al Laboro, al la certeco pri la venko de la Vivo super la Morto! Sed ĉio laŭ la nemalhavebla individua klopodo, rilate la Amon kaj la Komprenon, kaj responde al la saĝa sugesto de la Spirito de Vero: "Spiritistoj! Amu, jen la unua admono; instru vin, jen la dua."

## **VI. Bibliografiaj Referencoj**

AŬDI, Edson. *Vida e Obra de Allan Kardec (Vivo kaj Verko de Allan Kardec)*. Niterói/RJ, Lachâtre, 1999.

JORGE, José. *Ilustrações Doutrinárias (Doktrinaj Klarigoj)*. Rio de Janeiro: CELD, 1997. Vol. I.

- KARDEC, Allan. *O Evangelho Segundo o Espiritismo* (*La Evangelio Laŭ Spiritismo*). 120. ed. Rio de Janeiro: FEB, 2003.
- KARDEC, Allan. *Obras Póstumas (Postmortaj Verkoj)*. 27. ed. Rio de Janeiro: FEB, 1995.
- XAVIER, F. Cândido / Emmanuel. *O Livro de Esperança (La Libro de Espero)*. 17. ed. Uberaba / MG: CEC, 2002.
- Pluraj Spiritoj. *O Espírito da Verdade (La Spirito de Vero)*. ed. Rio de Janeiro: FEB, 1999.
- WANTUIL, Zêus kaj THIESEN, Francisco. *Allan Kardec*. 3. ed. Rio de Janeiro: FEB, 1982, vol. II, III.

# La Ĉielo kaj la Infero

*Roberto Inocência da Paz  
Wellington Santana Ferreira*

## **Enkonduko**

### **PRI LA PUNOJ KAJ REKOMPENCOJ – LA JUĜADO**

La senmorteco ĉiam estis, konscie aŭ nekonscie, certeco kiun la homoj havas ekde siaj unuaj manifestiĝoj de racieco kaj formiĝo de la praaj primitivaj komunumoj. Dum la longa evoluo ĝis la hodiaŭaj tagoj, observante, rekonante kaj sentante la efikojn de la Leĝo pri Kaŭzo kaj Efekto, aŭ Ago kaj Reago, al la homa komprenpovo estas nenio pli natura ol tio, ke en la neŝanĝeblaj leĝoj de la kreaĵo unu (aŭ pluraj) ekzistas, kiuj starigas la sankciojn eblajn kaj justajn al niaj agoj, en la ekzercado de la vivo, ankoraŭ konsiderante la gravigojn aŭ malpligravigojn koncernajn al ĉies aparta destino. Pro la juĝkapabla, analiza kaj prudenta senso strikte ligita al la evoluo de ĉiu etnosocia grupo, ĉiam estis tiu, kiu sin proponis administri la kriteriojn de justeco, homaj kaj diaj, al ni postlasataj en ĉiuj epokoj de la Historio. La necerteco kaj nekonstanteco de tiuj kriterioj ŝuldiĝas, plejofte, al la granda timo, kiun la mizeraj “mortuloj” havis pri siaj dioj kaj pri iliaj komplikaj rilatoj kun nia mondo.

Tial la paganoj, jarcentojn antaŭ Kristo, prezentis al ni scenon de la Dia Justeco, kiu, malgraŭ ilia nescio, pliproksimiĝis al la vero: la sep ĉieloj kaj la sep inferoj, la unuaj destinitaj al tiuj kiuj iomrajte aŭ juste ilin meritis, dum la aliaj estas difinitaj al tiuj kiuj ilin atingis plenmerite, aŭ tutjuste. Tiamaniere, ke nenio estas pli dezirata ol la atingo de la sepa ĉielo; samkiel nenio estas pli

timata ol esti portata al la sepa kaj plej kruta el la inferoj. Kiu aŭ kio, tamen, difinu la leviĝon de iu animo al unu el la sep ĉielaj regnoj aŭ ĝian falon en la abismajn regionojn de la sep inferoj? Kaj kiu aŭ kio tion konfirmu al ni? Ni posedis la povon juĝi kaj regi super la vivo kaj morto de niaj similuloj, laŭ la takso de tio, kion ili prezentis por siaj defendoj. Sed, kiu povo aŭ supera forto estus kapabla duonvidi la veron por legitimi la juĝadon kaj garantii la ekzekuton de la verdikto rilata al iliaj animoj?

La popoloj, la kredoj kaj la religioj evoluis. Jesuo faligis la idolojn kaj ŝtonajn diojn kaj plifirmigis la suverenecon de Dio-Patro kaj de Lia senfina favorkoreco. Sed, nur ĉe la alveno de la Spiritisma Doktrino ni ekhavis la plej klaran, sintezan, justan kaj logikan scion pri la Dia Justeco. Jen kion ni trovas en la libro *LA ĈIELO KAJ LA INFERO*, de Allan Kardec.

## I. HISTORIO DE LA VERKO

Allan Kardec, la Kodiginto de la Spiritisma Doktrino, la apostolo de la homa renoviĝo, respondante al la demandoj de la homaro lanĉis en Parizo (Francujo), en la unua de aŭgusto 1865, unu el siaj plej mirindaj verkoj: *LA ĈIELO KAJ LA INFERO* aŭ "*LA DIA JUSTECO LAŬ SPIRITISMO*", disvolviĝo de la Kvara Parto de La Libro de la Spiritoj, kies temo estas "Pri la Espero kaj Konsoloj".

Tiu rimarkinda verko el la verkaro de la Spiritisma Kodigado estas la kvara laŭ la eldonordo kaj esprimas la profundan logikan kapablon kaj la alte didaktikan stilon de la aŭtoro.

Kardec dividis la libron en du partojn. La unua, titolita Doktrino, konsistas el dek unu ĉapitroj kaj pritraktas la demandojn pri la morto kaj pri la estonta vivo, prezentante rilate al tio, per la nerefutebla logiko de la Spiritisma Revelacio donita de la Superaj Spiritoj, komparojn pri la malsamaj religiaj kaj filozofiaj teorioj.

*Estonteco kaj nenio, Timo antaŭ la morto, Ĉielo, Infero, Purgatorio, La estontaj punoj laŭ Spiritismo, Anĝeloj, Demonoj, Pri elvokoj de mortintoj* estas temoj pritraktataj de la liona majstro, kiu montras la koherecon, la logikon kaj la naturan saĝon konstante lin inspirantajn dum liaj esplorkomunikadoj, eksperimentoj, analizoj, komparoj, selektado kaj plenpravaj konkludoj, kion li klare kaj racie komentarias, tamen sen instigo aŭ provoko al ia ajn polemiko.

En la Ĉapitro VII – *La estontaj punoj laŭ Spiritismo*, troviĝas la puna kodo de la estonta vivo, prezentanta la Dian Justecon en tridek tri paragrafoj, modelo de sintezo kaj klareco. Laŭŝajne estas malmultaj la studpunktoj pri tiom gravega temo. Elstariĝas ĝuste la simpleco kaj klareco, per kiuj Kardec elmontras kaj evidentigas, ke la diaj aferoj estas logikaj kaj simplaj, ebligante la facilan komprenon de la mekanismoj de la Leĝo pri Kaŭzo kaj Efiko.

La Dua Parto, nomata *Ekzemploj*, enhavas atestojn. Estas sesdek sep komunikadoj de diversaj evolunivelaj spiritoj, ordigitaj en ok ĉapitroj, donantaj la plej variajn detalojn pri tio, kio okazas dum kaj post la morto de la fizika korpo. Per objektiva kaj logika analizo la kodiginto klasigas la spiritajn komunikantojn laŭ ilia morala kaj intelekta progreso, ilin kungrupante en kategoriojn kiuj konsistigas ekde Spiritojn kiuj ĝuas relativan feliĉon ĝis tiuj katenitaj al surteraj elaĉetoj, pasante al tiuj suferantaj per sinmortigoj kaj krimoj.

*José Jorge*, en sia libro “Doktrinaj Ilustraĵoj” (Rio de Janeiro: CELD, 1997. Vol. I), konsideras tiujn komunikadojn “*aŭtentikaj, variaj, antaŭe nekonataj kaj instruaj*. *Aŭtentikaj* – pro la kriterio kaj skrupulo de la Kodiginto ĉe sia elektado. *Varijaj* – pro la zorgo ĉe la prezento de la plej diversaj situacioj de la elkarniĝintoj, por ke oni miru pri tioma varieco. *Antaŭe nekonataj* – ĉar je la unua fojo iu doktrino kuraĝis montri al la homoj la spiritan realecon post la elkarniĝo. *Instruaj* – ĉar el ĉiuj ili Kardec eltiras valorajn instruojn por nia morala edifo. (...) Ili estas tiel ordigitaj:

I – Feliĉaj spiritoj: 18 komunikadoj.

II – Spiritoj en mezbonaj kondiĉoj: 6 komunikaĵoj.

III – Spiritoj suferantaj: 8 komunikaĵoj.

IV – Memmortigintoj: 10 komunikaĵoj.

V – Pentintaj krimuloj: 5 komunikaĵoj.

VI – Hardiĝintaj spiritoj: 5 komunikaĵoj.

VII – Surteraj Elaĉetoj: 14 komunikaĵoj.

Resume, 48 komunikaĵoj de spiritoj al ni tre similaj kaj 18 de feliĉaj spiritoj. (...) Al ĉiu el la 66 komunikaĵoj, Allan Kardec aldonas siajn prudentajn doktrinajn rimarkojn – konsente kun la kunlaborantaj spiritoj – kio signifas riĉan kompilaĵon de instruoj, kiujn Spiritismo malŝpare disponigas al tiuj kiuj sin proponas legi ĉi tiun altvaloran verkon”.

Tiel, *LA ĈIELO KAJ LA INFERO* estas unu el la kolonoj sur kiuj elmontriĝas la vivodaŭro, la senmorteco de la animo, kaj samtempe plifirmiĝas kaj konfirmiĝas la fundamentoj de la Spiritisma Doktrino, kiu memorigas pri la instruo de Jesuo: “La Dia Regno estas interne de ni”.

Per atenta legado de ĉi tiu verko, oni vidas, ke ĝia strukturo vere similas al juĝa proceso. En la *Unua Parto* al ni montriĝas la faktoj, kiuj ĝin motivigis kaj la kriterian analizon, ĉiam serenan, de ĝiaj aspektoj, kun la koncerna reliefigo de la kazoj de malobeado de la leĝo. En la *Dua Parto*, la diraĵo de la atestantoj. Ĉiu el ili karakteriziĝas per sia ordo en la procesa kunteksto. Kaj antaŭ la necesaj komparoj, la juĝisto elparolas sian definitivan verdikton, samtempe energian kaj tuŝitan de favorkoreco. Ni estas antaŭ dia tribunalo. La homoj kaj iliaj institucioj estas akuzataj kaj pagas por tio kion ili ŝuldas, sed pligravigoj kaj malpligravigoj estas konsiderataj ĉe la lumo de ia supera kriterio.

La 30an de septembro 1863, kiel oni povas vidi en *POSTMORTAJ VERKOJ*, Kardec ricevis de la superaj spiritoj la jenan avizon: “Alvenis la horo, kiam la Eklezio devos respondi pri tio al ĝi konfidita,

pri la maniero laŭ kiu ĝi praktikis la instruojn de Kristo, pri la uzo kiun ĝi faris el sia aŭtoritateco, fine, pri la nekredemeco al kiu ĝi kondukis la spiritojn”. Ĉi tiu aljuĝo komenciĝis en la antaŭverko konsistigita de *LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO* kaj devus daŭrigi en *LA ĈIELO KAJ LA INFERO*. Tiam mankis nur *LA GENEZO* por kompletigi la verkadon de la Kodigado de la 3<sup>a</sup> Revelacio.

Estis anticipe eldonitaj du ĉapitroj de *LA ĈIELO KAJ LA INFERO* en la Spiritisma Revuo: la ĉapitro titolita *Pri la Timo pri la Morto*, forta akuzdokumento, en la numero de januaro 1865, kaj la ĉapitro *Kie estas la Ĉielo*, en la marta numero de la sama jaro. Ambaŭ aperis kvazaŭ simplaj artikoloj por la *Revuo*, sed ĉe la fino enestis noto anoncanta, ke la du apartenis al “nova verko, kiun S-ro Allan Kardec baldaŭ publikigos”.

Septembre la verko jam estis anoncita por disvendado. Kardec deklaras, ke ne rajtinte laŭdi aŭ ĝin kritiki, la *Revuo* limigis sin al la publikigo de resumo de ĝia antaŭparolo, konigante ĝian enhavon. La anticipe publikigitaj ĉapitroj aperas, la unua kun la sama titolo jam prezentita, kaj la dua kun la titolo reduktita al *LA ĈIELO*.

Estis fine donita la kompata mortbato al la fundamentaj dogmoj de la teologio de la formala kristanismo, tia neneigebla religia sinkretismo, per kiu la vera kristanismo, esenca kaj ne formala, sukcesis penetri en la malpuran paston de la mondo kaj ĝin fermenti je la kosto de grandegaj sinoferoj. Kardec reasertas la sciencan karakteron de Spiritismo. Kiel observado-scienco, la nova doktrino traesploras la problemon de la estontaj punoj kaj rekompencoj sub la lumo de la Historio, starigante komparojn inter la idealigoj pri la ĉielo kaj la infero en la antaŭkristanaj kaj kristanaj religioj, elmontrante la historiajn, antropologiajn, sociologiajn kaj psikologiajn radikojn de tiaj idealigoj kaj denuncante la absurdaĵojn al kiuj sin ligis la teologia imagado en la formulado de la kristanaj dogmoj.

En la antaŭparolo de tiu verko, fare de José Herculano Pires, de li mem tradukita kaj eldonita de LAKE, li asertas: “La unua ĉapitro de *LA ĈIELO KAJ LA INFERO* havas la titolon

Estonteco kaj Nenio. Ĉi tiu titolo elmetas antaŭ la leganto la du fundamentajn alternativojn de la spirito. Kardec montras sin samtempe kartezia kaj ŝekspira kiam li elvokas la dilemon: Esti aŭ ne esti, jen la alternativo. Sed li ankaŭ kontraŭis, antaŭ pli ol unu jarcento, la tezon de la nenio kiu estiĝos ja tie, en Francujo, per la ekzistencialisma filozofio de Jean-Paul Sartre, la teoriisto de la frustracio kaj neniigo de la homo.

Kio plej impresas en tiu juĝa proceso, tio estas la objektiveco de la akuzo. Ni ne estas antaŭ romia tribunalo, kie la reguloj de Leĝoscienco submetiĝas al la rektaj postuloj de la Imperio, sed antaŭ greka tribunalo de la sokrata mondo, kie la nefleksebla juĝisto ĉiumomente demandas: *Kio estas tio?* kaj postulas la precizan difinon laŭ la reguloj de *majeŭtiko*. Tiuj komparoj ne estas retorikaj; ili estas simple historiaj. La logika proceso de Kardec sekvas la dialektikan rezonlinion de la sokrata serĉo de la vero, laŭ la platona eksponado. La juĝisto kiu juĝregas en ĉi tiu tribunalo ne surhavas la malpuran togon de Anito, sed la tunikon de Platono.

La komparo de la pagana infero kun la kristana infero estas unu el la plej efikaj laboroj de la kompara mitologio, kiun oni konas. La kristana mitologio sin montras pli malsubtila kaj kruela ol la pagana.

Tio sufiĉus por pravigi la Renesancon. La homara mergiĝo en la mezepokan profundegaĵon kondukis la homan naturon al historia malprogreso nur komparebla al tiu de nazi-faŝismo en nia tempo. La materialismaj intelektuloj ektimis ĉe la malprogreso de la homoj en la 40aj jaroj de la antaŭa jarcento kaj ekdubis pri la teorio pri evoluado. Se ili estus legintaj la libron de Kardec ili sciis, ke la evoluado ne okazas laŭ rekta linio, sed laŭ spirala progresado. La mezepokaj teoriistoj estis racie kaj morale malprogresintaj rilate la grekajn teologojn, ĉar ili reprezentis iun tavolon de la civilizacio ankoraŭ ne trafitan de la lumoj de la helena kulturo. La surtera evoluo de la homo submetiĝas al la sortovicoj de la perioda surmetiĝo de la laŭinstrue malsuperaj tavoloj de la loĝantaro, kiuj bezonas por sia profito atingi pli



altan kulturnivelon. La falo de la Romia Imperio estis momento de surmetiĝo de la barbaroj, kiuj bezonis nutri sin de la klasika kulturo. En la ŝajne neklarigebla epizodo de nazi-faŝismo ni havis novan malmergiĝon de la bestecaj instinktoj de la homo. Tiaj instinktoj ankoraŭ regas en nia post-naziisma mondo, sed ili iom-post-iome kunmiksiĝas en la niatempa kultura bolado. Neniu imago pli bone klarigus tian situacion ol tiu de la mezepoka kaldrono, elpensita de Wilhelm Dilthey.”

Ni konstatas tiamaniere, ke tiu verko de Allan Kardec povas multe instrui, ne nur al la spiritistoj sed ankaŭ al la kleruloj de la novpagana kulturo, kiuj malŝparas sian tempon atakante Spiritismon, same kiel la grekoj kaj romianoj vane batalis kontraŭ Kristanismo. La spiritisma proceso disvolviĝas laŭ la vojlinio de la kristana proceso. La konvertiĝo de la mondo ankoraŭ ne kompletiĝis. Spiritismo devas laste kontribui en tio, kiel natura, historia kaj profeta disvolviĝo de Kristanismo en nia epoko. La legado kaj sistema studado de tiu libro estas devo de spiritistoj kaj ne-spiritistoj, de ĉiuj kiuj vere deziras kompreni la homan vivkialon sur la Tero.

Eĉ inter la spiritistoj, *LA ĈIELO KAJ LA INFERO* estas preskaŭ nekonata. La plejmulto el tiuj kiuj ĝin konas neniam tute komprenis ĝian veran signifon. Sur ĝiaj paĝoj, Kardec montras al ni la situacion de la morala kaj spirita evoluo de la homaro ĝis la nunaj tagoj. Tamen li starigas la markojn de la estonta homevoluo. La postmortaj punoj kaj rekompencoj eliras el la obskureco de la superstiĉo kaj el la dogma mistikismo al la viva lumo de la racia analizo kaj scienca esploro. Evidente tia esploro ne povas sekvi la metodon de la mezursciencoj, ĉar ĝia objekto ne estas materia, sed rigore sekvas la postulojn de la moderna kaj nuntempa scienca spirito. La grava problemo de la postmorta vivo demetas de si la mitologiajn vestojn kaj montriĝas kun la nudeco de la vero ĉe la lumo de la klarigita racio.

Kiel observado-scienco Spiritismo proponas al ni la analizon de Kardec en la *Unua Parto* de la verko. Kiel esplor-scienco ĝi proponas la *Duan Parton*, en kiu Kardec objektive

ekzamenas la situacion de la spiritoj post la morto. Laŭ tio, kion li konstante emfazas, la punoj kaj rekompencoj, naturaj sekvoj de la homa agado sur la Tero, ne estas prezentataj kiel alegorioj aŭ supozoj prilaboritaj de la menso, sed kiel rezulto de la mediuma serĉado, de la rekta esploro de la situacio de la spiritoj tra iliaj propraj informoj. Kaj tiuj informoj ne estas senbazaj, nek sencele elektitaj: ili estas stimolitaj de la eksperimentanto dum jaroj da hardiĝinta kaj pacienca laboro. Pli ol jarcento post ĝia realigo, tiu laboro estas hodiaŭe konfirmata de la aktualaj esploroj, ne nur en la spiritisma medio, sed ankaŭ sur la kampo de la parapsika studado.

La senpartieco de Kardec kaj lia amo al la esplorklaboro, lia fido pri la efikeco de la scienca serĉado travididebliĝas ĉiumomente. *Charles Richet* pravis ĉe la rekono de la scienca inklino de la kodiginto de Spiritismo. Donante al la infero kaj al la ĉielo ĝiajn realajn konturojn, surbaze de la rezultoj de sia esplorado, Kardec ne refutas la dogmon de purgatorio, la plej suspektinda el la arbitra teologia strukturo, iam poste enkondukita en la dogmegan katolikan sistemon, sed li ĝin akceptas kaj pravigas. La purgatorio estas ja la Tero, tia determinita kaj limigita loko en kiu ni, enkarniĝintaj aŭ elkarniĝintaj, nin purigas el niaj malperfektaĵoj.

La teologia doktrino de la anĝeloj kaj demonoj ankaŭ estas submetita al la duobla pruvo de la racia analizo kaj scienca esploro. La konkludo estas klara kaj certa: ni estas demonoj, kiam ni estas elirantaj el la besteca stadio survoje al la spiritaliĝo, kaj ni estas anĝeloj, kiam ni eliras el la homeco al la anĝeleco. Sed tio ĉi ne estas nura ideo, hipotezo aŭ ia produkto de mensa rezonado aŭ de arbitra interpretado de sanktaj tekstoj. Ĝi estas la rezulto de observado kaj esploro. Miloj da spiritaj estuloj demanditaj, submetitaj al la mediuma agado, liveris la evolugradajn psikologiajn kaj moralajn tipojn laŭ la spiritisma taksado, en vera psika klasigado aplikebla ne nur al la Spiritoj, sed ankaŭ al la homa tiparo.

## II. Helpoverkoj por la Studo de La Ĉielo kaj la Infero

- 1) *Post la Morto*. Léon Denis. Ed. FEB.
- 2) *Ĉu Dio punas?* – Cairbar Schutel / Helena Craveiro. Ed. PETIT.
- 3) *Spiritismaj Studoj* – Joanna de Ângelis / Divaldo P. Franco. Ed. FEB.
- 4) *Dia Justeco* – Emmanuel / Francisco C. Xavier. Ed. FEB.
- 5) *Justeco kaj Feliĉo* – Walter Barcelos. Ed. DIDIER.
- 6) *Moralaj Leĝoj de la Vivo*. Joanna de Ângelis / Divaldo P. Franco. Ed. LEAL.

## III. Sugesto pri Gvidilo por Studo de La Ĉielo kaj la Infero

La individua aŭ grupa studo de ĉia ajn verko postulas dediĉon, persiston, skipan spiriton, determinon kaj konstantecon.

Por la **individua studo**, ni notis la jenajn sugestojn:

- Elektu la tago(j)n kaj horon taŭgajn por la studo kaj faru el tio neprokrasteban konpromison.
- Izolu vin, kiom eble, en pura kaj komforta loko.
- Se plaĉas al vi studi aŭdante muzikon, elektu nur la instrumentajn muzikojn, klasikajn, serenajn, sen fortaj ritmoj.
- Aranĝu ĉe vi ĉion, kion vi bezonos dum la studado: akvon, fruktosukon, notkajeron, krajonon, globkrajonon, liniilon, vortaron kaj helpverkojn por konsulto.
- Malŝaltu vian poŝtelefonon kaj nur interrompu la studon se temos pri vera neceso, kaj se vi tion faros meze de la leciono, reiru al la komenco.

- Legu paŭze kaj laŭtvoĉe la tutan studpunkton aŭ la analizotan ĉapitron. Poste, legu ĝin malrapide, analizante ĉiun frazon, frazaron kaj paragrafon, notante viajn konkludojn, antaŭ ol eklegi la sekvan parton.
- Fininte iun ĉapitron, relegu ĝin kaj sekve la notojn, kiujn vi faris ekde la komenco de la studo.
- Neniam perdu la okazon pridiskuti tion kion vi studas kun studemaj kaj konsciaj personoj, kiuj povu helpi eltiri la dubojn kaj pliampleksigi viajn konkludojn.
- Elektu samtempan studadon de du aŭ pliaj libroj (ni konsideras tri la ideala nombro) nur se ili estas similaj laŭ la enhavo.
- Kompletigu viajn studojn per legado / esploro en periodaĵoj, revuoj, mensaĝoj kaj prelegoj, kongresoj kaj simpozioj.

Por la **studo en grupo**, ni sugestas la jenajn procedojn:

- Ĉiu studgrupo havas sian kunordiganton. Sed atentu, ke vi estas tielsame respondeca pri la grupo kaj pri la studo kiel li.
- Estas dezirinde, ke ĉiuj havu la studatan libron kaj ke oni hejme studu la programon por la sekvonta leciono.
- Estu asidua, aktiva, partoprenema kaj interesata pri ĉio kaj pri ĉiuj.
- Se vi havos pli da komprenfacileco, helpu kiomeble kaj ne anstataŭe la kunordiganton ĉe la informado al la kolegoj.
- La studo de ĉiu ĉapitro devas esti anticipe programita minimume je sesdek tagoj, dividante ĝiajn studpunktojn aŭ elektitajn temojn kun ĉiu partoprenanto de la grupo aŭ duope, triope, laŭ la eblo kaj disponebleco.

Al la anoj de la grupo, ne listigitaj por ekspliki la lernobjekton / lecionon, petu, ke ili serĉu pri la temo en helpoverkoj, oportune prezentante mallongajn raportojn aŭ komentojn, kun identigo de la eldonfonto.

Kiel ekzemplo por la supra sugesto, ni prenu la ĉapitron 1 de la Unua Parto de La Ĉielo kaj la Infero: *Estonteco kaj Nenio*.

1<sup>a</sup> leciono = Punktoj de 1 al 9

Daŭro = 60 minutoj

Disvolviĝo = La anoj de la grupo, kiuj respondas pri la elvolvado de la studpunktoj, havos individue kvin minutojn por tion fari. En la restanta tempo, aliaj grupanoj eksponos pri la malsamaj cititaj doktrinoj, surbaze de la esploroj en helpoverkoj, kiaj *La Libro de la Spiritoj*, *Post la Morto*, ktp.

2<sup>a</sup> leciono = Punktoj de 10 al 14

Daŭro = 60 minutoj

Disvolviĝo = Ĉiu prezentanto de lernobjekto havos kvin minutojn por paroli. Poste, oni petas de ĉiu partoprenanto, ke li faru mallongan konkludon pri la ĉapitro, kaj tiam la kunordiganto finas per siaj observoj.

Ĉiu paŝo de ni farita survoje al la nekonateco estas atingita venko. Tiel, ĉiu legita paĝo, ĉiu analizita paragrafo, ĉiu komprenita frazo estas nepereema lumo lumiganta al ni la evoluan vojon.

## **IV. Sugesto pri Gvidilo por Prelego**

*Temo:* Justeco de la Afliktiĝoj

1<sup>a</sup>. “Favoroj kaj privilegioj, kiuj ne estas premio pro merito, ne ekzistas; ĉio estas mezurata kaj pesata per pesilo de la rigora justeco.”

LA ĈIELO KAJ LA INFERO, 1<sup>a</sup> parto, Ĉap. 3, 13

2<sup>a</sup>. Kion la Spiritisma Doktrino neniel akceptas, tio estas la kredo pri la eterna puno, kie estas dogmo en la plejmulto el la tradiciaj religioj de la mondo.

3<sup>a</sup>. “La animo aŭ Spirito suferas en la spirita vivo la sekvojn de ĉiuj neperfektaĵoj, kiujn li ne sukcesis korekti en sia korpa vivo.”

*LA ĈIELO KAJ LA INFERO, 1<sup>a</sup> parto, Ĉap. 7, 1<sup>a</sup>*

4<sup>a</sup>. “La daŭro de la puno dependas de la pliboniĝo de la kulpa Spirito. Nenia kondamno estas al li preskribita por difinita tempo.”

*LA ĈIELO KAJ LA INFERO, 1<sup>a</sup> parto, Ĉap. 7, 13<sup>a</sup>.*

5<sup>a</sup>. “Pento kuntrenas aflikton, rimorson, doloran senton, kio estas la transiro de malbono al bono, de malsano al morala sano.”

*LA ĈIELO KAJ LA INFERO, 2<sup>a</sup> parto, Ĉap. 6.*

6<sup>a</sup>. “Pento, kvankam ĝi estas la unua paŝo por regenerado, ne sufiĉas per si mem: elaĉeto kaj riparado estas necesaj.”

*LA ĈIELO KAJ LA INFERO, 1<sup>a</sup> parto, Ĉap. 7, 16<sup>a</sup>.*

7<sup>a</sup>. “Dio ordonas enkarniĝon al la Spiritoj, por la celo igi ilin atingi la perfektecon; por unuj ĝi estas puno, por aliaj misio.”

*LA ĈIELO KAJ LA INFERO, demando 132.*

8<sup>a</sup>. PROVADO: Ĝi estas la sperto petita aŭ proponita de la spiritaj gvidantoj antaŭ ol la korpa renaskiĝo de la kandidato, post ekzameno de liaj evoluregistroj kaj taksado tiel de liaj kapabloj kaj ebloj por venko kiel de la rimedoj al lia dispono por tia faro. Ĝi sin

prezentas kiel tendencoj, kvalitoj, limoj sub kontrolo, elteneblaj doloroj kaj senekscasaj ĝojoj, kiuj kunhelpas por la plej ampleksa rikolto de edukrezultoj. Nenion oni trudas, kaj eblas ŝanĝi la sinsekvon de la eventoj.

Joanna de Ângelis: *PLENECO*, Ĉap. 3, § 9.

9<sup>a</sup>. ELAĈETO: Ĝi estas trudata, nerifuzebla, ĉar ĝi konsistigas efikan kuracadon, la plibonigan kirurgion kontraŭ la pligraviĝinta malsano. Organaj limigoj, paralizoj, specoj de frenezeco, kancerroj kaj idioteco, tio ŝuldiĝas al memmortigoj, mortigoj, adultoj, ekspluatado de la vivo (trafiko, sekso, drinkado, hazardludoj, ĉantaĝo, ktp.).

Joanna de Ângelis: *PLENECO*, Ĉap. 3, § 21 kaj 24.

10<sup>a</sup>. Perfekteco estas mia destino.

Chico Xavier: *LA SPIRITO*.

Verko: "Lecionoj de la Vivo".

## **V. Konkludo: La Graveco de la Studo de La Ĉielo kaj la Infero**

La graveco de ĉi tiu verko estas pli granda ol tio, kion oni vere pensas. Rilate la Teologion, *LA ĈIELO KAJ LA INFERO* en pli ol jarcento anticipis la ŝanĝojn kiuj nun okazas en la sino de multaj eklezioj. Se la teologoj, kiuj pretendas estis homoj plialtaj ol la homoj mem, kiel Kartezio ilin taksis, povus havi sufiĉe la humilecon ĝin konsulti, ili trovus en ĝiaj paĝoj la solvon de siaj plej angoraĵaj problemoj.

Kiu homo ankoraŭ ne maltrankviliĝis pri la afero de la morto kaj pri tio, kio estos post la tombo? Kiu ne pensis pri la eblo aŭ ekzisto de la ĉielo kaj de la infero?

Tiaj demandoj ĉiam estis al la homoj motivoj de zorgoj, ekde la plej fora antikveco, havigantaj dubojn kaj necertecojn antaŭ la estonteco, kiu tiam fariĝis vera mistero.

Ĉiuj malnovaj kaj tradiciaj religioj instruas pri paradiza ĉielo kaj same pri infero, ia regiono kun eternaj doloroj kaj suferoj, meze de nesondeblaj abismoj.

Analizante la kulturan panoramon de sia tempo, Kardec konstatis, ke tri sistemoj de ideoj provas ekspliki la sorton de la animo post la morto:

\* La unua el ili, NIHILISMO, proklamas, ke ĉio finiĝas ĉe la morto de la korpo, kaj ekzistas nenia fundamento por kredoj kaj valoroj aŭ eĉ nenia celo por la homa ekzistado.

\* La dua, PANTEISMO, asertas, ke ĉe la morto de la korpo tio, kion ni nomas animo, estos ensorbita en la universan tuton, kaj nenio plu restos el ĝia individueco kaj identeco.

\* Trie, la religiaj doktrinoj kredas, ĉiuj el ili, je la postvivado de la animo, je la konservado de ĝiaj identeco kaj individueco kaj ankaŭ je ia puna kaj rekompensa sistemo koncerne al la homaj agoj dum la enkarna vivo.

Al la nihilistaj kaj panteismaj sistemoj Kardec kontraŭmetas argumentojn nerefuteble logikajn, pruvante, ke tiuj ne respondas al la postuloj de racio kaj, krome, se ili estus adoptitaj de la plejmulto el la homoj, ili kaŭzus la dissolviĝon de la socio, ĉar kiel sekvon ili kuntrenus la forigon de la respondeco pri la praktikataj agoj dum la vivo, kaj same la forlason de la devo pri solidareco kaj frateco kaj de ĉiu stimulo por la individua kaj kolektiva progreso.

La religiaj doktrinoj, defendante la postvivadon de la animo kaj la sistemon de estontaj punoj kaj rekompencoj, estas, laŭ Kardec, pli konsentaj kun la aspiroj de la homa animo kaj kun la instinkta kredo kiun la homo havas pri la vivo post la morto. Tamen, kiel la liona majstro rimarkigas, ili enhavas grandan dozon da fantazio, multe konfliktantaj pri la naturo de la punoj kaj ĝuoj kaj precipe



pri ties determinaj kaŭzoj, el kio naskiĝas la malsimilaj kultoj kaj la malsamaj devoj difinitaj kiel necesaj por ke oni evitu la inferon kaj atingu la ĉielon.

Allan Kardec ankoraŭ rimarkigas, en la enkonduka ĉapitro de la verko, ke la religioj estas perdantaj sian forton kaj sin montrantaj “senpovaj por bari la nekredemon”. Tiel estas, ĉar io mankas al ili. *Kaj kio al ili mankas en ĉi tiu jarcento de pozitivismo, en kiu oni penas prefere kompreni ol kredi, tio sendube estas la konfirmo de iliaj instruoj per la pozitivaj faktoj, kaj ankaŭ ilia akordo kun la pozitivaj informoj de la Scienco (...).*

Pli antaŭe li diras, ke *pro ĉi tiuj cirkonstancoj Spiritismo venas por starigi baron kontraŭ disvastiĝo de nekredemo, ne nur per rezono, ne nur per antaŭvido de danĝeroj, kiujn ĝi kuntrenas, sed ankaŭ per materiaj faktoj, farante videblaj kaj tuŝeblaj la animon kaj la estontan vivon.*

Daŭrigante, li deklaras, ke la Spiritisma Doktrino pri la estonteco ne estas ia imagverko, sed la rezultato de observado de faktoj, precipe per la mediuma esplorado, kiu nin rekte kontaktigas kun la pulsanta realeco de la post-tomba vivo. Li malkovras al ni la destinon de tiuj kiuj mortis kaj kiuj venas klarigi al ni pri sia nuna kondiĉo, pri la naturo de siaj suferoj aŭ de sia feliĉo kaj pri tio, kio estigis tiun suferon aŭ feliĉon.

Fine, la Kodiginto asertas, ke la estonta vivo, laŭ la instruo de la Superaj Spiritoj, ne estas ia nura hipotezo, sed certeco, kaj ke tiu certeco pri la estonta destino de la animoj “estos la unua punkto de kontakto de la diversaj kultoj, estos ja grandega paŝo por la religia toleremo, kaj poste por la kompleta kunfandiĝo”.

# La Genezo

*Joamar Zanolini Nazareth*

## **I. Historio de la Verko**

*La Libro de la Spiritoj* estas la fundamenta verko de Spiritismo, kaj ĝia lanĉo en aprilo de 1857 signas al la homaro la daton, kiam estiĝis la Spiritisma Doktrino. La kvar partoj – aŭ la kvar libroj – en kiujn ĝi sin dividas:

*Unua Parto – Primaraj Kaŭzoj* (Dio, kreado, ĝeneralaj elementoj de la Universo, ktp.);

*Dua Parto – La mondo de la Spiritoj* (Spiritoj, enkarniĝo, plureco de la ekzistadoj, spirita vivo, ktp.);

*Tria Parto – Moralaj leĝoj* (Dia leĝo, leĝo de progreso, leĝo de justeco, amo kaj karitato, ktp.);

*Kvara Parto – Esperoj kaj Konsoloj* (Surteraj kaj estontaj punoj kaj ĝuoj). disetendiĝis en la aliajn kvar mirindajn verkojn, kiuj formas kaj kompletigas la tiel nomatan “Kardekan Pentateŭkon” aŭ la konatajn “Kvin Bazajn Verkojn de la Kodigado”. Estas ankaŭ aliaj verkoj enkondukaj al la studado de la Doktrino, kiuj baziĝas sur *La Libro de la Spiritoj*, malgraŭ ke ili ne prenis parton en la Pentateŭko, bazo de la kodigado.

La maturiĝo de la jaroj, la sperto rezultanta el la rapida kaj kuraĝa antaŭeniĝo de la spiritismaj ideoj pliprofundigis la analizojn, klarigojn kaj komprenon de la instruoj de la Spiritoj.

Unue venis al la lumo *LA LIBRO DE LA MEDIUMOJ* en la **15<sup>a</sup> de januaro 1861**, disvolviĝo de la Dua Parto – surbaze de la ĉapitro VI –; poste, naskiĝis *LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO*

en **aprilo de 1864**, rezultinta el la Tria Parto. La **1an de aŭgusto 1865**, estis lanĉata *LA ĈIELO KAJ LA INFERO* – La Dia Justeco laŭ Spiritismo – , rilatigata al la Kvara Parto, kaj en la **6<sup>a</sup> de januaro 1868** estis eldonata de Allan Kardec *LA GENEZO* – La Mirakloj kaj la Antaŭdiroj laŭ Spiritismo –, la lasta libro de la kodigado, iom post unu jaro antaŭ lia elkarniĝo.

La unua interesa fakto estas la scio, ke *LA GENEZO* estas elvolviĝo de la Unua Parto, de kelkaj ĉapitroj – IX, X kaj XI – de la *Dua Parto* kaj de diselektitaj tekstoj de la *Tria Parto*.

La dua fakto estas la konstato, ke tiu verko, deveninta de la unua parto de *La Libro de la Spiritoj*, estis ĝuste la laste skribita de la eminenta kodiganto. Kaj el la kvin verkoj konsistigantaj la bazon de la kodigado, *LA GENEZO* estas tiu, kiu disvolvas pli ampleksan sencon, tuŝante demandojn rilatajn al Dio, al la formado de la Tero, al la organa kaj spirita genezo kaj enkondukante demandojn pri la Evangelio de Kristo, pri fluidaĵoj, mirakloj kaj antaŭdiroj, ktp.

Oni trovas en la enkonduko al la unua eldono kelkajn rimarkojn de Kardec, kiuj klarigas la fakton, ke tiu estis la lasta el inter la bazaj verkoj de Spiritismo, verkita post preskaŭ dek unu jaroj de la lanĉo de la unua. Ni povas sekve citi la vortojn de la liona majstro, kiu klarigas sian elekton ellasi kiel lastan la verkon kiu prilaboras la homan penson pri tiel esencaj kaj fundamentaj demandoj:

*La materialoj jam estis pretaj, aŭ almenaŭ de longe ellaboritaj, sed ankoraŭ ne estis veninta la tempo por publikigo. Necesas unue, ke la ideoj, konsistigantaj ilian bazon, atingu la maturecon, kaj, krome, preni en kalkulon la oportunecon de la cirkonstancoj. Spiritismo enhavas nek misterojn nek sekretajn teoriojn; ĉio en ĝi devas esti malkaŝa, por ke ĉiu povu ĝin plenscie juĝi; sed ĉiu afero devas aperi ĝustatempe, por ke ĝia alveno estu sekura (in La Genezo, Allan Kardec, 25. ed., Rio de Janeiro: FEB, 1982, paĝo 11).*

La kodiginto memorigas, ke la Libro de la Spiritoj jam kompletigis sian unuan dekjaran periodon kaj ke ĝiaj fundamentaj principoj senescepte restis pravaj kaj pli vivaj ol iam antaŭe, malgraŭ sennombraj provoj ilin kontraŭdiri. Kaj alprenante bazan rolon, ili permesas sin esti serene kompletigataj kaj disvolvataj pro la progresiveco de la instruo de la Spiritoj. Tion oni ŝuldas al la tielnomata universala kontrolo laŭ la intruo de la Spiritoj, kies kolektiva saĝo plifirmigas la instruojn kaj klarigojn alprenitajn de Spiritismo. Kiel Kardec diras, *ĝuste tiu kolektiva akordo en la opinio de la Spiritoj, krome pasigata tra la kriterio de la logiko, fortigas la spiritisman doktrinon kaj garantias al ĝi ĉiamdaŭrecon, same konfirmanta ĝian specialan kvalitan sekurecon: ... ĉiu principo, kiu ne ricevis la konsenton de la plimulto, ne povas esti rigardata kiel konsista parto de tiu doktrino, sed ja kiel nura unuopa opinio, pri kiu Spiritismo ne povas respondi* (same).

Tio al ni montras komunan saĝon, racion kaj logikon, proprajn al la luma laboro de la Kristo konfidita al Prof-ro Rivail. Ĉar temis pri tiom ampleksaj kaj scienckarakteraj demandoj, Allan Kardec atendis pli efektivan maturiĝon kaj de la verko kaj de ĝiaj novaj adeptoj por fortigi tian aspekton – sciencon – kaj prepari la kredantojn, por ke ili “fronte” koniĝu kun la vero, disfaldante la spiritisman flagon laŭ ĝia triopa karaktero – scienca, filozofia kaj religia –. Ĉe la apero de la kvina kaj lasta verko el tiu klasika kvinopo, la ĵus naskiĝinta doktrino havis la necesajn ecojn por firmiĝi kiel Scienco, Filozofio kaj Religio de la Spirito.

## **II. Helpoverkoj por la Studo de La Genezo**

La studo de *LA GENEZO* devas esti kriteria kaj metoda, plene atenta al la logikaj rezonoj de la kodiginto, kiu pritraktis tiujn samajn profundajn temojn, jam en la pasinteco mise esploratajn de la religioj, kiuj celis la surteran forpaseman povon kaj kiuj el ili faris artifikojn por kontroli la seninstruajn kaj kredemajn popolamasojn ĉe ties kompreno pri la vivo kaj pri Dio.

La unua paŝo estas la studo de la libro mem. Kiam ni parolas pri studo ni ne volas diri simplan legadon.

Kiam oni realigas enketojn ĉe la frekventantoj de spiritismaj domoj kaj eĉ inter la laborantoj kaj kunhelpantoj en la spiritisma medio, oni maltrankvile konstatas, ke ne atingas 25% (dudek kvin procenton) la nombro de tiuj, kiuj jam **legis** la verkon *LA GENEZO*. Oni atentu, ke ni aludas al simpla legado. Se el inter la personoj jam ĝin legintaj, ni kalkulos la nombron de tiuj, kiuj jam **studis** ĝin, ĉu hejme, ĉu en spiritisma grupo, pli maltrankvilaj ni estos, ĉar ni konkludos, ke la nombro apenaŭ alproksimiĝos al 20% (dudek procentoj) el la legantoj. Ni fine konkludos, ke el la spiritistoj ne kalkuliĝas al 5% (kvin procentoj) la sumo de tiuj, kiuj jam studis la libron *LA GENEZO*.

Tial, la unua paŝo estas ja ĝia studado. Por kompletigi la studon aŭ eĉ helpi en tia aktiveco, ekzistas sennombraj libroj kiuj analizas kaj disvolvas ĝian enhavon, kaj ankaŭ tiuj koncernantaj nur specifan parton aŭ lernopunkton propran al ĝi. Por starigi kompletan liston oni bezonus citi multajn librojn, kiuj havas mallongajn referencojn kaj igus la adepton miksi temojn aliajn, ol tiujn trovatajn en la kvina verko el la kodigado. Ĉe sia strebo al pli da scio, la lernanto devas traserĉi kaj “elfosi” en la jam ampleksa listo de spiritismaj verkoj tiujn, kiuj povas ion aldoni al la studo de la temoj pritraktataj en *LA GENEZO*.

Ni sugestas kelkajn librojn, kiuj disvolvas la enhavon de la lasta verko de Allan Kardec aŭ partojn el ĝi. Ĉar temas pri verko, kiu elvolvas pli ampleksajn ideojn kaj pritraktas pli variajn demandojn, pri ĉi tiaj oni nature trovas librojn, kiuj esploras kaj kungrupigas la pli akordajn, lasante aliajn por aliaspekta laboro.

Helpe al la studo de *LA GENEZO*, ni povas sugesti:

- 1) *A Caminho da Luz (Survoje al la Lumo)*, de Emmanuel / Francisco Cândido Xavier. FEB;
- 2) *A Memória e o Tempo (La Memoro kaj la Tempo)*, de Hermínio C. Miranda. Edicel;

- 3) *A Reencarnação (La reenarniĝo)*, de Gabriel Delanne. FEB;
- 4) *Kolekto de la Revista Espírita (Spiritisma Revuo)*, de Allan Kardec. Edicel;
- 5) *Cristianismo e Espiritismo (Kristanismo kaj Spiritismo)*, de Léon Denis. FEB;
- 6) *Deus na Natureza (Dio en la Naturo)*, de Camille Flammarion. FEB;
- 7) *Emmanuel*, de Emmanuel / Francisco Cândido Xavier. FEB;
- 8) *Evolução em Dois Mundos (Evoluado en Du Mondoĵ)*, de André Luiz / Francisco Cândido Xavier. FEB;
- 9) *(Evolução Anímica) Anima Evoluado*, de Gabriel Delanne. FEB;
- 10) *Introdução à Filosofia Espírita (Enkonduko al la Spiritisma Filozofio)*, de J. Herculano Pires. FEESP;
- 11) *Missionários da Luz (Misiuloj de la Lumo)*, de André Luiz / Francisco Cândido Xavier. FEB;
- 12) *No Mundo Maior (En Pli Granda Mondo)*, de André Luiz / Francisco Cândido Xavier. FEB;
- 13) *O Grande Enigma (La Granda Enigmo)*, de Léon Denis. FEB;
- 14) *O Livro dos Espíritos (La Libro de la Spiritoj)*, de Allan Kardec. Pluraj Eldonejoj.

Estas multaj aliaj verkoj, en kiuj ni trovos unuopajn studojn de la temoj entenataj en tiu libro de la Kodigado. Ĝenerale grandan nombron da studobjektoj oni trovas en la libroj verkitaj de Emmanuel/Francisco Cândido Xavier, de Joanna de Ângelis/Divaldo Pereira Franco, de Herculano Pires, de André Luiz/Francisco Cândido Xavier, de Manoel Philomeno de Miranda/Divaldo Pereira Franco, de Humberto de Campos-Irmão X/Francisco Cândido Xavier, de aliaj medioj famkonataj kaj ankaŭ de kriteriaj enkarniĝintaj verkistoj. Enestas multaj klarigoj

kaj analizoj meze de aliaj temoj ekzistantaj en la ceteraj verkoj de la kodigado. Nur la studo kaj la sincera serĉo de la lernanto lin kapabligos ellerni la bazajn temojn de la Spiritisma Doktrino. Indiki multe da libroj tro plilongigus la liston kaj ni povus esti maljustaj flanken lasante kelkajn pro la simpla fakto, ke ni ilin ankoraŭ ne estus studintaj, aŭ inkludante aliajn pro ties titoloj aŭ ĉapitroj, tamen sen ĝisfunda kono pri ili, riskante pretervole rekomendi librojn, kiuj povas ne esti adekvataj kaj enhavi multajn erarojn.

### **III. Sugesto de Gvidilo por la Studado de La Genezo**

La temoj elektitaj de Allan Kardec por la verkado de lia lasta libro estas vibraj kaj kondukas al demandoj, kiuj devas preni parton en la konstantaj rezonoj de la sinceraj adeptoj de Spiritismo, kiuj havas la firman decidon sin mem renovigi kaj kunlabori por la konstruo de pli bona mondo, gloro al kiu ni estas vokitaj en ĉi tiu Tria Jarmilo.

La libro estas dividita en tri partojn: *La Genezo*, *La Mirakloj kaj La Antaŭdiroj*.

En *La Genezo*, disetendita en 12 ĉapitrojn, estas pritraktataj temoj rilataj al la ekzisto de Dio, al la bono kaj malbono; al la ekesto de la Universo, de la Tero, de la materiaj elementoj kaj al ĉeesto de la spiritaĵoj en nia planeda lernejo. Tio signas la unuiĝon de la scienco kun la spirito, kaj laŭ la vortoj de la kodiganto, skribitaj frontpaĝe de la verko: *La Scienco estas vokita starigi la Genezon laŭ la leĝoj de la Naturo*.

En *La Mirakloj*, dividita en tri ĉapitrojn, la temoj koncernas la ekziston de la mirakloj, de la fluidecaj elementoj kaj same la analizon de la tiel nomataj mirakloj de la Evangelio, ĉe kio ekzameniĝas la oftaj momentoj en kiuj Jesuo ĉiujn mirigis per fenomenoj tiuepoke neklarigeblaj.

Ĉi tie ni transkribas la jenajn vortojn de la liona majstro: *Dio pruvas sian grandecon kaj sian povon per la neŝanĝebleco de siaj leĝoj, ne per ties nuligo.*

Kaj fine, en *La Antaŭdiroj*, konsistanta el tri ĉapitroj, la temoj kunportas profundan introspektecon al ni ĉiuj, spiritistoj sindonaj al la celo renovigi tiel sin mem kiel nian planedan lernejon. Ĝuste pri tio la estimata Kodiginto pridiskutas la antaŭdirojn ekzistantajn en la Evangelio kaj tiujn alportitajn de superaj misiuloj de la Spirita Mondo, temantajn pri la novaj tempoj. Kiu estas la rolo de la tiam naskiĝanta doktrino? Fidi al la Kreinto kaj al la laboro planita de la Supera Mondo ne estas nura afero pri kredkonfeso, sed pri inteligenteco kaj komuna saĝo, laŭ tio kion ni perceptas.

Tiu fina kaj tria parto de la lasta libro de la kodigado, ĝuste prezentanta rezonojn pri la antaŭdiro, ke **la tempoj estas alvenintaj**, unu jaron antaŭ la reveno de Kardec al la spirita vivo, fermis per ora ŝlosilo la ellaboradon de la kodigado, signalante la komencon de fazo, en kiun ni eniris kaj ĉe kiu ni devas konsciĝi pri nia kondiĉo de eternaj spiritoj, kvankam aljungitaj al forpasemaj situacioj, sklavigitaj de deziroj kaj malbonaj kondutoj tute forlasendaj.

La unua kaj ĉefa standardo de Spiritismo, la renaskiĝinta Evangelio, estas la AMO. Kaj la ĉefa vojo por ĝia disfaldo estas la **interna memrenoviĝo**, la **moralaspirita renoviĝo**. Danka glorkanto al la vivo kaj al nia kondiĉo de estuloj de Dio destinitaj al la feliĉo kaj al la perfektigado.

Neprokrastebla la studo de ĉi tiu fundamenta verko – *LA GENEZO* – al ĉiuj kiuj prenis sur sin la spiritisman idealon.

*Tiuj kiuj ne studas Spiritismon fariĝas marionetoj kaj fanatikuloj, facile regataj de la malsuperaj interesoj de enkarniĝintoj kaj elkarniĝintoj.* Ili estas tiuj kiuj ravlogiĝas de la mediumeco, kiuj eldiras erarajn kaj malseriozajn konceptojn, kaj sin opinias spiritistoj, kiuj multajn jarojn laboris ne donante sin al la propra renoviĝo kaj, post tuta laborvivo ene de spiritisma centro, ankoraŭ sentas sin seniluziigintaj kaj malplenaj, transigante la



kulpon de sia spirita nekompetenteco al la Spiritisma Doktrino, al la spiritismaj domoj kaj al la gekunuloj kun kiuj ili dividis longajn jarojn da komuna laboro.

Same kiel ni agas rilate ĉiun seriozan studobjekton, la studo devas efektiviĝi laŭ du laborlinioj: unu koncernas la individuan studon kaj la alia la spiritisman grupan studon.

Per la **individua studo** – pli poste ni prezentos kelkajn sugestojn ĉe la ekzemplado pri la studo de iu temo – ni havas la okazon traesplori la verkon laŭ nia studritmo kaj kompreno, “interparolante” kun la libro, legante kaj relegante tiomfoje kiom necese, analizante, rezonante, pripensante pri la vortoj kaj konceptoj studataj, farante opinion kaj personan vidpunkton pri la demandoj tie trovataj. La parto kiun ni disvolvos ĉe individua studado ne estos esplorata en la grupa studado. Ni devas konstrui la bazon de la spiritismaj intruoj en nia menso, per konstanta kaj rafinita studo, sen malkuraĝo aŭ mallaboremo, sen malbonvolo aŭ fiera opinio, ke ni jam sufiĉe scias – vera eraro kaj terura danĝero –. Per tia bazo ni estos pli bone preparitaj por serĉi pli efektivan klarvidecon en la kolektiva studo de la spiritismaj tezoj.

La studo devas komence centriĝi en la propra verko, kun medito pri la elmontrataj ideoj, profitante la didaktitan strukturon proponitan de Allan Kardec pri la temoj, ĉiam komence de la malpli granda al la pli granda premiso, konstruante lernkondiĉojn por la simplaj ideoj ĝis la momento, kiam oni alfrontos tiujn pli kompleksajn kaj polemikajn.

Ni ne forgesu, ke al la sincera kaj sindonema spiritisto la individua studo estas esenca; tamen ĝi estas nesufiĉa por konstrui firman kaj solidan bazon de la vera laboranto por la Kristo.

*Tiuj kiuj nur individue studas nian doktrinon, forirante el la frata kontakto kun la samdoktrinanoj kaj samdoktrinanoj, evitante diskuti ĝiajn konceptojn ĉe la klara lumo de grupa analizo, estas la plej orgojlaj kaj vantaj, juĝantaj sin povosciaj pri Spiritismo, defendantoj de la doktrina pureco; tiuj kiuj alportas al*

*la spiritisma movado ĉiajn politikajn altrudojn kaj uzas malnoblajn kaj bedaŭrindajn rimedojn por havigi al si povon kaj superregi aliajn. Menso plena de kulturo, tamen misgvidata, povas pli malbone efiki ol la manko de scio. La disperdoj estas pli grandaj, la malutiloj al personoj kaj al la grupoj estas pli profundaj, kaj pli ofendas la korojn.*

Estas necese partopreni en la spiritismaj studgrupoj, kie oni respekte kaj fratece esprimas kaj diskutas la diversajn vidpunktojn, sen deziro pri superregado de ideoj kaj interpretoj. Kiam la plej diversaj personoj aktivantaj en la laborema “abelujo”, kiu estas la spiritisma centro, kunvenas por kolektive studi la instruojn de Spiritismo, kiam ĉiu kunlaboranto portas sian sperton kaj sian personan komprenon, ekvidiĝas en la grupo, ke la kolektiva intereso superstaras la individuan; la ideoj klariĝas; la interpreto ampleksiĝas kaj plilarĝiĝas, forviŝante la dogmojn kaj miskomprenojn; tiam ĉies opinio devas esti respektata kaj la plej klarvidaj ne instruas, sed, jes, helpas al la samideanoj kaj samideaninoj konstrui la propran lernadon. Tio estas la eduka kaj renoviga propono de Jesuo.

Estos pli bone se la spiritisma domo ebligos diversajn kunvenojn, konsidere al la neceso pri horaro kaj precipe *aplikante variajn metodojn* kiuj permesu atingi la celon havigi konon kaj komprenon al ĉiuj ĝiaj adeptoj. Komprenante tamen la malfacilaĵojn rilatajn al la nombro da kunlaborantoj kaj grandecon de la grupoj, ni scias, ke ni devas adaptiĝi al la cirkonstancoj. Sed tio neniam estu obstaklo por ke iu ajn institucio ne havu eĉ unu studkunvenon.

Rilate la spiritistojn, ili devas plejmulte strebi kaj provi partopreni en la kunvenoj, ĉar kontraŭe ili povos fariĝi neproduktivaj kaj senpreparaj por kontentigi la homamason alvenantan por serĉi konsolon kaj klarigon pri sia vivosperto. Cetere tiuj povos fariĝi senpreparaj por kontentigi eĉ siajn proprajn bezonojn. Ni konstante rimarkas la torenton da spiritistoj, kiuj plendas pri siaj

malfacilaĵoj: kelkaj forlasas la barkon de la kristana servado; aliaj estas deprimitaj; aliaj priploras kaj bedaŭras la barojn de la vojo... Ne erariga signo, ke ili ankoraŭ ne komprenis la atingpovon de la spiritisma revelacio kaj ties implicajn rezultojn en la vivo de la homoj favorataj de ĝia renoviga blovo. Certe la nura studado ne havigas al ili komforton kaj konsolon, sed la laboro kune kun la plej bona preparo de la laboranto ebligas pli ampleksajn ekflugojn, donante al la servanto la kondiĉon esti fidela soldato en la armeoj de la bono kaj de la amo, komandataj de nia Majstro Jesuo.

Se eblas fari liston de aktivecoj por la studo de la Spiritisma Doktrino, ni povas sugesti, ke oni kreu kunvenojn uzante malsamajn metodojn.

Ekzemple, en kelkaj institucioj jam kunekzistas pluraj studkunvenoj, kiuj alprenas malsimilajn formojn, kiaj:

- Studrondoj, ĉe kiuj la lernado baziĝas sur la sinsekvo de la studata verko, privilegianta la fundamentajn verkojn de la kodigado. Tiamaniere, oni studas *LA LIBRON DE LA SPIRITOJ* demandon post demando; *LA EVANGELION LAŬ SPIRITISMO* laŭ la ordo de la ĉapitroj kaj paragrafoj, kaj tiel plu. Tiel, la studantoj ekkonas la intimecon de la libro kaj alproprigas al si la sciofonton elpensatan de la aŭtoro. Alia avantaĝo kuŝas en la fakto, ke per tiu metodo oni preferas ĉerondtablan studon kaj ĉiuj povas laŭvole sin esprimi. En ĝi partoprenas la prezentanto, kiu prezentas la temon kaj stimulas la diskutojn. Ĉirilate ĝi diferenciĝas de la Sistema Studado de La Spiritisma Doktrino (ESDE)<sup>9</sup>;

- Publikaj studkunvenoj, per kiuj oni disvolvas aron da temoj kaj oni proponas studojn kaj prelegojn ilin pliakcentantajn. Per tia metodo oni povas enkonduki kursojn, aŭ elekti la centran temon, kiu ĉiam estos celo de la parolantoj. Elvolvante la temon per tia elekto, la parolanto priesploras diversajn verkojn de malsamaj aŭtoroj, komparante opiniojn kaj konkludojn kaj riĉigante la

---

<sup>9</sup> Portugallingve: Estudo Sistematizado de Doutrina Espírita (ESDE).

konon pri difinita lernobjekto. Tiakondiĉe, oni studas temojn pri reenkarneigo, mediumeco, familio, ktp;

- Publikaj kunvenoj specifaj por la studado de difinitaj verkoj, similaj al la studrondoj, sed malsamaj en tio, ke oni kalkulas je preleganto, kiu elvolvas kaj komentarias la temon laŭ la *lernoĉambra* ordinara stilo. Eblas al la ĉeestantoj fari komentojn, tamen la pli formala karaktero de la kunveno iom malpliigas la intervenojn. Sed tio ankaŭ gravas, ĉar estas multaj personoj kiuj sentas sin pli komfortaj meze de la publiko, sub garantio de diskreteco, dum aliaj preferas la metodon *instruanto-lernanto*;

- *Sistema Studado de la Spiritisma Doktrino*, laŭ lernokajeroj, ĉeronde de tablo, uzante bone ellaboritan lernomaterialon. Ni havas al nia dispono la lernokajerojn de la Brazila Spiritisma Federacio, de la Spiritisma Federacio de São Paulo<sup>10</sup>, kaj aliajn kursojn laŭ la sama sistemo, libroforme publikigitajn de kelkaj eldonejoj. Ekzistas bonkvalitaj publikaĵoj, el kiuj oni povas elekti iun ajn. Oni zorgu fari analizon de la lernokajeroj aŭ libroj, por ke la elekto celu verkojn pritraktantajn bazajn demandojn de la Doktrino, evitante tiujn, kiuj prezentas polemikajn temojn, iel gvidante la opiniojn de la studantoj.

Kio plej disvastiĝas kaj havas la aprobon de nia ĉefdomo, tio estas la lernokajeroj de FEB, kiu cetere realigis, antaŭ nelonge, kampanjon por ke ĉiuj brazilaj spiritismaj grupoj starigu ESDE-studgrupojn ĝis la jaro 2010. Temas pri metodo jam ĝenerale akceptita kaj kiu kunportas sennombrajn utilojn, stimulantia la studon kaj la kritikan analizon de la partoprenantoj. Ĝi ne utiligas la prelegrimedon, sed la gvidan legadon kaj konstantan partoprenon de ĉiuj por la kolektiva ellaborado de la konkludoj.

Ĉiaj supre menciitaj metodoj kaj aliaj eventuale uzataj en la institucio reprezentas flamon de amo kaj sincereco, kiun oni ekbruligas en la grupo.

---

<sup>10</sup> Ŝtato de Brazilo.

Finante ĉi tiun parton ni atentigas, ke la grupa studado ne forigas la individuan studon.

*Tiuj, kiuj ĉe la samideanoj kaj samideaninoj nur studas en grupo, multe lernas kaj pli kleriĝas, sed mankas al ili pli larĝa kritiksaĝo, ĉar ili fariĝas pli facile influataj kaj inklinaj absorbi jam pretajn aliulajn ideojn. La komenca bazo, kiun la individua studado estigas al la studanto, permesas al li pli bonan profiton kaj disvolvas lian kritiksaĝon, kiu, ĉe lia partopreno en studgrupo, naskas ian sankondutan kaj motivigan diskutkampon. Tiuj, kiuj partoprenas nur en la kolektiva studo, povas partopreni en la grupo de la “ŝajne bonaj” kaj seniniciatemaj, ĝenerale konsentemaj kun la pli studemaj kaj pli parolkapablaj. Tiuj treege plibonigas sian potencialon, sed tamen ne evitas misinterpretojn, kiuj ne postrestus ĉe pli saĝa vidpunkto. La punktoj ĉi tie specife konsiderataj iel kaŭzas malpli da problemoj, tamen kunportas tian eblecon.*

## **IV. Sugesto de Temo el La Genezo por Studo**

*Temo:* La Nova Generacio. (en la tria parto, ĉapitro XVIII, paragrafoj 27 al 35, lasta temo pritraktata en la libro).

Sugestoj por studo:

- a) Elekti adekvatan lokon en la domo, sen muziko kaj kun konvena komforto – tablo, skribmaterialo, kajeroj aŭ slipoj, ktp;
- b) Flanke lasi vortaron por konsulto de vortoj nekonataj de la studanto aŭ kies signifon li ne klare scias;
- c) Fari unuan legadon, por ekkapti la pritraktitan temon kaj por ĝenerala kono pri la intenco de la verkinto;
- ĉ) Efektivigi duan legadon, farante rimarkojn – laŭ la preferata formo de la studanto, ĉu per notado en kajero, ĉu per slipoj,

aŭ en la propra libro - , kiuj helpas la fiksadon de ideoj. Oni atentu, ke ne necesas urĝeco;

- d) Substreki konkludajn frazojn kaj ŝlosilajn vortojn por la kompreno de la teksto. Oni povas substreki per krajono aŭ globkrajono. La uzado de malsamaj koloroj helpas ĉe la elkompreno de la enhavo kaj fiksado de tio plej esenca en la teksto. Oni evitu troan substrekadon, kiu povus nuligi la utilecon de tia praktikado. Se oni tro substrekas, la baza informo fariĝos la nesubstrekitita teksto;
- e) Per tio oni kaptos la argumentan bazon de la aŭtoro. Laŭ la elektita temo oni rimarkas tion, kion Kardec reliefigis kaj oni povas prepari mallongan gvidplanon por prezento de prelego, utiligante la strukturigajn teknikojn de leciono/ prelego:

## 1) PRI LA TEMO

Titolo de la leciono: LA NOVA GENERACIO.

Rim.: ordinare la titolo de studobjekto aŭ ĉapitro ne estas tiel adekvata kiel studtitolo. Tamen, rilate ĉi tiun punkton, Kardec tre trafe kaj objektive elektis la titolon de la koncernaj studobjektoj trovataj en *LA GENEZO*.

## 2) PRI LA CELOJ

Diri al la aŭdantoj, ke la nova generacio de Spiritoj, kiuj ekloĝos la Teron dum ĉi tiuj transiraj momentoj kaj dum ĝia transformiĝo en regeneran mondon, konsistos el venontaj pli klarvidaj Spiritoj. Tamen la plejmulto konsistos el tiuj kiuj jam vivis sur la Tero kaj klopodas por pliboniĝo, akceptante la novan direktilon donitan al la planedo. Ankaŭ informi pri la elmigrado de Spiritoj hardiĝintaj en la malbono kaj pri la fakto, ke la mondŝanĝo ne okazos pere de kataklismoj kaj “kinematografaj” bruloferoj.

### 3) PRI LA STRATEGIOJ

Reliefigi la jenajn punktojn:

- nur ekzistos pli feliĉa Homaro se estos pli da edukitaj Spiritoj;
- okazos elmigrado de Spiritoj, sed nur de tiuj pli ribelemaj;
- povos okazi grandaj perturboj, sed nenio ŝajnanta la “finon de la tempoj”;
- la Spiritoj kiuj forlasos la Teron ne estos elpelataj, sed ja kondukitaj al pli adekvataj lernejoj;
- tiuj sincere dezirantaj renoviĝi kaj ŝanĝiĝi je la lumo de la Evangelio povos resti, ĉar eĉ kiam tre neperfektaj, ilia idealo estas tio, kio difinos al ili la destinon.

**Ŝlosil-vortoj en la teksto:** ELMIGRADO, RENOVIGŬO, MORALA PROGRESO, KOLEKTIVAJ ELIROJ, REGENERADO kaj REFORMIGŬO.

**Aŭdvidaj materialoj** utiligotaj: nigra tabulo (se por studrondo) aŭ album-elmonro/kartonaj folioj/travideblaĵoj (se por publika kunveno).

### 3) PRI LA STRUKTURIGO DE LA LECIONO

#### 4.1. ENKONDUKO

- Por la ekzisto de feliĉa homaro estas necese ke sur la Tero loĝu bonaj Spiritoj (enkarniĝintaj aŭ elkarniĝintaj);
- Estas necesaj profundaj ŝanĝoj en la socio, kun pli bone edukitaj homoj – enkarniĝintaj Spiritoj;
- Kiel efektiviĝi tiajn ŝanĝojn? Ĉu per estingiĝo de la nuntempe ekzistanta socio, tiel ke Dio kreos iun alian, novan?
- Ĉu estos necesa tiom granda plialtigo de la evolunivelo de la homaro? Ĉu la nun surtere loĝantaj Spiritoj estas animoj ne kapablaj pliboniĝi?

## 4.2. DISVOLVADO

- Por atingi ĉi tiun nivelon devos okazi elmigrado de ribelintaj Spiritoj, ne dezirantaj pliboniĝon; tiuj estos kondukitaĵoj al aliaj mondoj kie ili povu superi la malmoliĝon de siaj koroj;
- Nuntempe aktivas unu tia agado por aliformiĝo de la homaro;
- pli evoluintaj Spiritoj devos anstataŭi tiajn Spiritojn;
- La transformiĝo ne okazos pere de kataklismoj pereigantaj la tutan homaron. Estos perturbegoj, tamen gradskalaj kaj laŭ la ordinara sekvo de la okazaĵoj;
- En ĉiu naskiĝonta infano estos enkarniĝinta Spirito inklina al la bono, senbezone de supernaturaj faritaĵoj; nova generacio de Spiritoj laŭgrade anstataŭantaj la nunan generacion de rezistemaj animoj, kio okazigos kunvivadon inter la du generacioj dum difinita tempo;
- La nova generacio distingiĝas laŭ la inteligento kaj racio, kune kun la natura sento je la bono kaj je spiritualismaj kredoj, dum la neprogresintaj Spiritoj tenas ribeliĝon kontraŭ Dio;
- La forapartigo de tiuj obstinantaj kontraŭ la renoviĝo estas necesa por ke la homoj senobstakle vojiru al pli bona mondo;
- Elmigrado de Spiritoj ne estas forpelo, sed enskribiĝo en pli konvena lernejo en la Universo – aliaj mondoj. Krome, ili daŭre estos ricevantaĵoj asistadon kaj povos reveni al la Tero.

*La grandaj kolektivaj foriroj havas kiel celon ne nur akceli la elmigrojn, sed ankaŭ pli rapide transformi la Spiriton de la amaso, ĝin liberigante de la malbonaj influoj, kaj havigi pli da aŭtoritateco al la novaj ideoj (Ĉap. XVIII, 32).*



#### 4.3. KONKLUDO

- La novan generacion konsistigos progresemaj alvenantaj Spiritoj. Atenton, tamen, al la fakto, ke la regenerado ne plenumiĝos entute surbaze de la renoviĝo de la Spiritoj. Alvenos pli maturaj Spiritoj, sed la plejmulto el tiuj revenontaj pere de reenkarriĝo estos la jam vivintaj sur la Tero, kiuj tamen alie pensos kaj sentos;
- Per la preparo en la transtomba vivo kaj sentante la sinsekvajn ŝanĝojn de la tergloba, liberaj je la longedaŭra malbona influo de apartaj estuloj – kiuj estos resenditaj –, tiuj Spiritoj eksentos signifan pliboniĝon de siaj vivdispozicioj;
- Por tiuj materialistaj, la detruaj turmentoj estas malfeliĉegoj ne racie klarigeblaj; tamen, por tiuj kiuj interpretas la vivon kiel esprimon de la Dia saĝeco, ne estas perdo ĉe izolita aŭ kolektiva morto de homoj; tio estas la rezulto al kio alvenos la homaro;
- *La regenerado de la homaro ne nepre bezonas do la kompletan renoviĝon de la Spiritoj: sufiĉas ia ŝanĝo de iliaj moralaj dispozicioj. Tiu ŝanĝo fariĝas ĉe ĉiuj, kiuj inklinas al ĝi, se nur ili estas fortiritaj el la ruiniga influo de la mondo. Tiel, ne ĉiam la revenantoj estas aliaj Spiritoj: ili ofte estas la samaj Spiritoj, tamen pensantaj kaj sentantaj alimaniere. (Ĉap. XVIII, 33).*
- Fini la studon optimisme kaj ĝoje, sciante ke Dio profunde nin amas kaj volas la plejbonon al Siaj filoj, kaj ke Jesuo estas nia Gvidanto kaj Spirita Majstro, plenumanta la taskon nin gvidi kaj helpi sur la vojo al la feliĉo, al la paco kaj al la amo.

#### 4.4. BIBLIOGRAFIO

Laŭ la supra studkriterio, pro la karaktero de tiu ĉi laboro, ni preferis utiligi nur la libron *LA GENEZO*, omaĝe al la grandiozeco de la prikomentata verko, same kiel stimuli la leganton serĉi en la fundamentaj verkoj la bazon por liaj studoj kaj prelegoj.

## **V. Konkludo: La graveco de la Studo de La Genezo**

Ni konkludas ĉi tiun senpretendan laboron, kun la espero esti kunlaborinta por stimuli la spiritistojn studi la verkojn de la kodigado, speciale la libron *LA GENEZO*.

Restas al ni sendube la neceso enprofundiĝi en la Pentateŭkon de Kardec por pli bona kompreno de Spiritismo kaj por ke ni estu preparitaj por la novaj certe venontaj informoj, ĉar ĉi tiu estas doktrino de progreso.

Al tiuj kiuj flanken lasas la interesiĝon pri *LA GENEZO*, dirante ke ĝia terminologio estas malmoderna kaj kadukiĝinta, precipe tiu de la ĉapitro V-a ĝis X-a, kaj ke la Scienco jam multe pli antaŭeniris, ni memorigas, ke la formo ŝanĝiĝas kaj ĉiam aliformiĝos kun la paso de la jarcentoj, sed la esenco kaj bazo, kies fundamento kuŝas sur la Dia Leĝo, neniam ŝanĝiĝos. Kvankam ni hodiaŭe uzas modernajn terminojn kaj ĵargonojn, la studo de tiu verko montras al ni, ke nenio eltrovita en la homaj laboratorioj malakordas rilate tion disponigitan en tiu mirinda libro. Ĝi daŭre kaj ĉiam estos aktuala laŭ sia kerno.

Ni finas esprimante nian omaĝon al la liona majstro Allan Kardec, pro lia jam atingita Naskotaga Ducentjariĝo sur la Tero, danklaŭdante al Dio pro la boneco veki esperon ĉe ni ĉiuj kaj preĝante al la Dia Majstro Jesuo por ke ni havu la necesan humilecon kaj klarvidecon por sekvi la vojon tiel de la persona kiel de la homkolektiva renoviĝo. Uzante frazon de la saĝa Spirito Emmanuel, el unu el liaj mirindaj literaturaj verkoj, ni ĉiuj kune diru:

*- Saluton, Allan Kardec!*

## **Notoj pri la Aŭtoroj:**

*Laŭ la sekvo de la prezentitaj ĉapitroj*

- **Evandro Silva Martins:** universitata Profesoro, preleganto kaj gvidanto de la Spiritisma Centro Lucas Evangelista, loĝanta en Uberlândia-MG.
- **Sílvio Divino de Oliveira:** publika oficisto, preleganto kaj gvidanto de la Spiritisma Centro Joana d’Arc, loĝanta en Uberlândia-MG.
- **Belmiro Francisco Martins Paranhos:** instruisto, spiritista preleganto, loĝanta en Itabirito-MG.
- **Florentino Gomes de Brito:** tenikisto pri konstruado, gvidanto de la Spiritisma Centro Universala Frateco, loĝanta en Uberlândia-MG.
- **José Rubens Gomes:** protezisto, preleganto kaj gvidanto de la Spiritisma Domo Hejmo de Maria, loĝanta en Uberlândia-MG.
- **Luiz Bertolucci Júnior:** ekonomiisto, preleganto kaj asociano de la Spiritisma Centro Laboristoj de la Bono, loĝanta en Uberlândia-MG.
- **Nuciete Aparecida da Cruz:** analizistino de informatik-sistemoj, prelegantino kaj asocianino de la Spiritisma Centro Laboristoj de la Bono, loĝanta en Uberlândia-MG.
- **Vânia Amâncio Abdulmassih:** universitata profesorino, prelegantino, eldonantino de la ĵurnalo Spiritista Vivo, loĝanta en Uberlândia-MG.
- **Isabel Gervásio de Faria:** universitata profesorino, prelegantino kaj membro de la Spiritisma Grupo Bezerra de Menezes, loĝanta en Uberlândia-MG.
- **Roberto Inocêncio da Paz:** elkarniĝinta en 2005, estis preleganto kaj gvidanto de la Spiritisma Municipa Alianco (AME) kaj de la Spiritisma Centro Evoluo en Du Mondo.

- **Wellington Santana Ferreira:** pedagogo, preleganto kaj gvidanto de Spiritisma Regiona Konsilio (CRE) Pontal, loĝanta en Ituiutaba-MG.
- **Joamar Zanolini Nazareth:** advokato, ĵurnalisto, preleganto kaj membro de la Spiritisma Centro Aurélio Agostinho, loĝanta en Uberlândia-MG.
- **Said Pontes de Albuquerque:** Publika Oficisto, Esperanto-instruisto, Direktoro de la Departemento pri Esperanto de Minasa Spiritisma Unuiĝo (UEM).

La **Spiritisma Municipa Alianco de Uberlândia (AME Uberlândia)**, fondita en decembro 1960, kompletigas 44 jarojn da intensaj klopodoj por la unuiĝo de la regiona spiritisma movado. Kunigante 55 spiritismajn asociitajn centrojn el Uberlândia, krom aliaj spiritismaj institucioj kun doktrineca kaj socia karaktero, kaj ankaŭ disponigante sidejon al la Spiritisma Regiona Konsilio Norda Zono de Triângulo Mineiro, kiu kunligas Uberlândia kaj la urbojn Araguari, Indianópolis, Nova Ponte kaj Tupaciguara, kun iliaj respektivaj centroj, la AME realigas diversajn aktivecojn por la pli bona kvalifiko de la spiritismaj taskoj, ĉiam konsiderante la proponojn pri unuiĝo ellaboritajn de la federaciaj institucioj: **Minasa Spiritisma Unuiĝo** (UEM, kun sidejo en Belo Horizonte/MG) kaj **Brazila Spiritisma Federacio** (FEB, kies sidejo estas en Brasília/DF).